

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15\$ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5\$.



Editor: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

No. 20 (100)

MELBURNO

Jan. - Feb., 1961

THE FOUR EPOCHS OF ESPERANTO

Outstanding Features from 1887 to 1960 Briefly Sketched

First Period: 1887-1900.

The first adherents were drawn chiefly from ex-Volapukists, from Jews in Russia and from Tolstoyan circles. Liberal, pacifist, culture-loving, the first generation of adepts were children of a hopeful age; the hymn "La Espero" synthesised their aspirations. The language itself was intensely proved; reform theories discussed and rejected, and the basis laid for stable evolution. The "Biblioteko" of Esperanto books was carefully edited by Zamenhof, to serve as a model of style. Generally the Slav impress was strong. The first Esperanto textbook was in Russian (1887), and of the first thousand addresses more than 800 were Russians.

Second Period: 1900-1914.

This "French" period dates from the founding of "L'Esperantiste" (1898); then came "La Revuo" (1906), recruitment of professors and commercial men, the interest of the "Touring-Club" and of the publishers Hachette, &c., to the planned World Esperanto Congress in Paris—stopped by the outbreak of war.

The period was characterised by the mysticism of Zamenhof, who yearned to establish a neutral "bridge" religion parallel with Esperanto. This, in the modified form of "the inner idea", served a real purpose in stimulating a semi-religious fervor among ordinary adepts and beginners, but in its more concretised exposition aroused in the minds of many leading Esperantists fear of

dangerous deviations.

From 1906 world Esp. congresses were held; significant contributions to Esperanto literature were made by Zamenhof, Bein and Grabowski, its chief outstanding models. The hiatus of the war followed.

Third Period: 1920-1938.

The rise of the Hungarian school: Kalocsay, Baghy, Totsche, &c., the influence of their art and literary review, "Literatura Mondo". This centre published many Esperanto books. Also of the supranational Sennacieca Asocio Tutmonda, which produced the first all-Esperanto dictionary. Waves of Communist booklets were printed in Leipzig (Ekrelo) and Moscow. The Bahai movement and the Japanese sect Oomoto adopted Esperanto for their international affiliations, the latter founding a well-written Esperanto review still current.

In 1936 began the age of darkness, with the banning of Esperanto in Germany and its deepening stagnation under Stalin. The courageous Esperanto publisher Theo Jung transferred from Cologne to Holland, where he continued his valuable work for Esperanto journalism. Death and destruction came upon the world; thousands of Esperantists died; stocks of Esperanto books were burned or pulped, and the ensuing cold war sealed off the world into two blocs.

Fourth Period: 1948-

Despite the glowering world situation Esperanto took fresh heart and

paced the road again. World congresses, which had ceased with that of Bern (1939), were resumed with another in the same city (1947). New publishing houses were opened in Tenerife, Copenhagen, Limburg-Lahn, Rio de Janeiro and elsewhere. A school of British poets seized the fallen mantle of the Budapest masters, while of these Kalocsay and Baglyi returned to such active life as they could.

In the late 1950's the central organisation (Universala Esperanto Asocio) in Rotterdam, under Prof. Ivo Lapenna, reached record membership totals. At the end of 1959 the number was 32,569, an increase of over 11,000 members between 1955 and 1959. U.E.A. gained prestige at United Nations, receiving consultative membership on UNESCO. It formed a bureau of statistics and documentation that has been of significant use in the dissemination of information on Esperanto and related affairs. "Esperanto", U.E.A.'s printed organ, goes to some 80 countries.

For some years Esperanto has found easier way in Jugoslavia, Poland and Bulgaria, and there is some loosening of restriction in U.S.S.R. From China issues an all-Esperanto magazine, largely made up of articles on social structure and folk-life, as is the case with other Communist countries using the international language.

The Japanese are planning a World Congress of Esperanto for 1965 in Tokio. The first monumental volume of a Chinese Anthology has appeared in Esperanto. Original Esperanto works have been translated into other tongues, and translations in Esperanto have bridged the gap between widely dissimilar and difficult languages, say from Hungarian into English. "Marta", translated from the Polish by Zamenhof, sold several editions in Japanese, translated from his version. Similarly, it appeared in Chinese.

If the world were freed from the suspicions of the cold war, and from the artificial restrictions of nationalistic rivalries—with unhampered intercourse, social and spiritual, among the peoples—Esperanto would in very truth advance with giant strides towards its goal: an auxiliary language universally used by everyone needing it.—F.R.B.

Australia Kroniko

● **SYDNEY:** Sango, ŝvito, eĉ larmoj, laborado, klopodegoj—ĉio por Esperanto—kaj el domaĉo floras Esperanto House en Sydney. Al tiuj, kiuj tiom donis kaj faris, kaj ankoraŭ donas kaj faras kaj revas, ĉiuj Esperantistoj danku kaj helpu. Kiel maklimakso al la antaŭaj malpacaj monatoj, tre glate fluis ĉio je la solena malfermo de nia domo Decembro 17, 1960. Jurnalistoj, anoj, kaj geamikoj preskaŭ plenigis nian halon. Multaj salutleteroj kaj telegramoj venis de personoj, kiuj ne povis mem ĉeesti, kaj ni tre ĝojis ricevi tiajn bondezirojn.

S-ro Matasin bonvenigis la ĉeestantojn, kaj skizis la celojn de Esperanto Kooperativo, kaj ĝian rilaton al S.E.S.

S-ro Harry, A.E.A. Prezidanto, kiu veturis al Sydney por oficiale malfermi la domon, inspirige parolis pri la rolo de tiaj ejoj, kaj pri la bona laboro jam farita per Esperantaj Domoj en aliaj landoj.

Parlamentano de la distrikto, S-ro Dan Minogue, tiam parolis, dirante ke kvankam li ne komprenis la vortojn de la antaŭaj parolantoj, li ja komprenas niajn celojn, kaj estis feliĉa, ke ni petis lin ĉeesti. Li promesis ian helpon laŭ sia povo. Nome de la Ko-Op estraro parolis S-ro Homan, klarigante anglalingve la celojn de la laboro, kaj skize raportante pri tio jam farita kaj tio farota. F-ino Ferguson, sekretario de S.E.S., dankis la parolantojn, kaj ankaŭ tiujn, kiuj tiom da laboro, mono kaj tempo plantis en la projekton.

Sekvis la filmo "Jen Aŭstralio", bele farita skizo pri urboj, pejzaĝoj kaj vivstiloj en Aŭstralio, kun interesa Esperanta komentario. La filmo estis farita de la federacia instanco, kaj jam estis havebla kun germana, franca aŭ itala komentario. Jen grava gajno por Esperanto, ne nur en Aŭstralio, sed tutmonde. Tostoj (vinoj komplimente de McWilliam's Wines) kaj bonega festmanĝeto kompletigis plaĉan, kontentigan, kaj historian posttagmezon.

Zamenhof Vespero en la nova balo de Esperanto House: S-ro Wiltshire, survoje hejmen post tre interesa mondvojaĝo, montris lumbildojn pri sia hejmlando, pri la Varsovia Kongreso, kaj pri amikoj kaj landoj vizit-

itaj. Gesroj Wiltshire tre ĝojis esti en Sydney ĝuste je la semajno kiam ili povis partopreni la malfermon de Esperanto Domo. Pere de ili ni sendas salutojn al la Nov-zelandaj Esperantistoj.

La adreso de "Esperanto House" estas 143 Lawson Street, Redfern. Kiu volas pli da informo, aŭ kiu volas partopreni la laboron, skribu al la Ko-Op. sekretario, S-ino Sunny Perry, je tiu adreso.—E.D.

★ ★ ★

● **CANBERRA, NOVEMBRO 1:** la Sekretario gastigis membrojn kaj vizitantojn, entute 10 personojn, en sia hejmo. Post instruado de la komencantoj, S-ro Harry prezentis filmon pri Singaporo, malajaj festoj, ceremonioj, kaj historiaj okazajoj. Sekvis demandoj pri la Esperantomovado en Singaporo, kaj la taŭgeco de la internacia lingvo por azianoj. Fine oni vespermanĝis.

NOVEMBRO 8: ĉeestis 12 personoj, inter ili 5 komencantoj. S-ro Jim Davidson prezentis lumbildojn pri sia vojaĝo pasintan jaron en Eŭropo. Tre interesis la klubanojn la bildoj pri la Internacia Junulfesto en Vieno, kaj eĉ pli tiuj pri la Universala Kongreso en Varsovio. Tiklis la "hazardo" montritaj bildoj pri Parizo.

NOVEMBRO 15: ĉeestis denove 12 personoj, inter ili 7 komencantoj. La Prezidanto, D-ro Ross Robbins, kiu faris oficialan botanikan vojaĝon en Nova Gvineo dum la pasintaj ses monatoj, prezentis belajn bildojn pri la indiĝenoj, la arboj kaj floroj de tiu insulo. Inter la vojaĝantoj estis D-ro Ken Rutherford, unu el la novaj komencantoj.

NOVEMBRO 22: ĉeestis 13 personoj, inter kiuj denove 7 komencantoj. S-ro Gamble prezentis al bonhumora ĉeestantaro la filmstrion pri Novzelando, kun komentario en Esperanto. Li kuraĝis, ĉar ĉeestis ia Prezidanto, fanatika novzelandano!

NOVEMBRO 29: ĉeestis la plej multnombra grupo depost multaj monatoj—15, inter ili 9 komencantoj. Oni devis komenci novan klason gvidatan de D-ro Robbins kaj S-ro Davidson. La programo ankaŭ estis speciala—novaj magiaĵoj elpensitaj de la Prezidanto. La ĉiumonata aferkunsido decidis (1) investi £20 por provizo enspezon por la dumvivaj membroj de la Klubo (2) rajtigi la

Sekretarian lui haleton por la venonta jaro.

DECEMBRO 6: ĉeestis 16 klubanoj en la hejmo de la Sekretario. Post la klasoj S-ro Harry prezentis filmon pri Genevo kaj rakontis pri spertoj oficialaj kaj esperantistaj dum tri jaroj en Svislando kiel ĉefkonsulo de Aŭstralio. Precipe interesa oni trovis rakontojn pri kunvenoj kun la eminentuloj de nia movado—Hans Jakob, Ivo Lapenna kaj Edmond Privat.

DECEMBRO 13: la Klubo festis la 101-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof. La festo okazis en la hejmo de la Prezidanto, kaj ĉeestis 15 personoj. Laŭ peto de la klasanoj oni daŭrigis la kutiman instruadon; poste S-ro Robbins prelegis pri la idealoj de Zamenhof kaj de la Esperanta movado. Sekvis "ludoj per la nigra tabulo", kantoj kaj vespermanĝo. Kvankam ĝi estis tre simpla festeto, ĝojigis la fakto, ke el la ĉeestantoj dek estas novaj membroj!

Post libertempo kristnaska oni kunvenis **Januaro 4** en la ĉeflokejo de "Bona Najbara Konsilantaro". Kvankam multaj anoj ankoraŭ libertempis, la dek ĉeestantoj ĝuis vesperon de instruado kaj tombolo. Ĉi tiun jaron la Klubo kunvenos ĉiun merkredon je la oka horo vespere en sama loko—Good Neighbour Council Headquarters, Riverside Buildings—kontraŭ ia Repertuara Teatro.

★ ★ ★

● **PERTH:** Dec. 1 okazis nia ĉiujara ĝenerala kunveno. Ni elektis novan Prezidanton, s-ron Chris Dean, kiu studis E-on en Anglujo antaŭ ol li migris ĉi tien antaŭ 12 jaroj. Vicprezidantoj estas s-roj W. Illingworth kaj J. Hawks, kaj s-ino Palmer sekretario, s-ino Pollard kasisto, s-ino McGrath bibliotekisto, kaj s-ino Sedgley direktanto de ekzamenoj.

Dec. 4, kelkaj anoj kunvenis en la stacidomo, por adiaŭi f-inon Longson. Si vojaĝas tra Usono al Eŭropo, kaj revenos en Septembro.

Ankaŭ en Dec. ni celebris la Zamenhofan feston. 25 sam-oj, inter kiuj troviĝis vizitanto, f-ino H. Boyle el Brisbano, kunvenis por vespermanĝo en urba hotelo. Loka gazeto sendis raportiston inter nin, kaj sufiĉe bona raporto aperis sur multe legata paĝo en tiu vesperjurnalo. Post la

festoj en la hotelo, ni estis distraj per muziko, kantoj kaj koloritaj bildoj en la hejmo de d-ro kaj s-ino Einihovici.

Jan. 26 nia komitato diskutis programon por la nuna jaro. Arangitaj estas societaj kunvenoj, piknikoj, novaj kursoj kt.p. Pluan novajon pri tio ni sendos.

S-ro G. Franklin, post nur dek-semajna studo, gajnis la unuajaran atestilon. Ni gratulas lin pro lia bona sukceso!—Jack Hawks.

★ ★ ★

● **MELBOURNE:** S-ro Ryding (3/11) plue prezentis belajn, kolorplenaĵojn kaj historie interesajn lumbildojn pri Germanujo, Belgujo, Nederlando kaj Danujo. Poste s-ino Ryding montris tre kuriozajn memoraĵojn.

Instruo ne mankis al varia programo aranĝita de s-ro H. Koppel (16/11). Trafaj tradukoj de cerbumigaj esprimoj intermiksiĝis kun enigmoj, novaĵoj, kantoj kaj poemo.

Elektinte eble iom danĝeran temon —“Ĉapeloj”—s-ro McKenzie (23/11) tamen evitis atakon, tute ne aludante al virinaj kapkovraĵoj. Li parolis nur pri la modoj por la viroj, donante faktojn el la historio pri la ĉapeloj.

S-ino Koppel (30/11) prenis kiel temon—la Botaniko. Ŝi klarigis kio estas ĉelo, kaj kiel la ĉelo de planto diferencigas de la ĉelo de besto. Poste ŝi priskribis la rolon de ĉeloj en plantkonstruaĵoj.

Bildoj pri Hispanujo, Portugalujo kaj Gibraltaro konsistigis ankoraŭ unu montradon de kliŝoj fare de s-ro Ryding (7/12). Kelkfoje malbela nudeco de kamparo intermiksiĝis kun beleco kaj grandiozo. Por mencii ion apartan, oni facile sin turnas al la fama fontano de Barcelono ĉiam ŝanĝiganta laŭ desegno kaj koloroj.

Kvankam la kliŝoj de s-ro F. Taylor (14/12) same temis pri Hispanujo, tute alian intereson ili posedis, ĉar troviĝis inter ili multaj samideanaj vizaĝoj, kiuj prezentigis meze de ia familia rondo.

RENDEVUO: La Novembra kunveno estis la dua sukcesplena okazo en la Kooperativa Domo. F-ino A. Godfrey montris belajn kaj interesajn bildojn pri sia vizito al la Centro de Aŭstralio, inkluzive de unu pri si mem ĉe la supro de “Ayers Rock”, daŭra atestaĵo ke ŝi ja grimpis tien.

Poste la ĉeestantoj sin refreŝigis kiel gastoj de la Prezidanto, S-ro M. Cohen, kiu provizis tre luksajn manĝaĵojn.—F.K.

La Zamenhof-Festo okazis en la Esperanto-Domo, la 17-an de Dec., en ĉeesto de 53 personoj. Post enkondukaj vortoj de la Prezidanto (S-ro E. McKenzie), nia plej juna E-isto Kim Bastin deklamis “La Vojon”. S-ino V. Baranovich pianludis kaj poste akompanis sian edzon kiu prezentis belvoĉe rusajn popolkantojn. S-ro H. Koppel amuzis nin per poemo de Raymond Schwartz, kaj multtalenta Kim Bastin distris nin per pianludado. La kulmino de la vespero estis la festparolado de S-ro F. R. Banham pri “La 3 doloroj de D-ro Zamenhof”. Profundsente la parolanto skizis la 3 dolorojn de la Majstro pri la “eterne militanta” mondo, la batalo kaj skismo en la movado kaj pri la propra batalo kontraŭ malriĉeco kaj malsano. S-ro Banham ĉiam kapablas allogi la intereson de la aŭskultantaro, sed ĉijare lia prelego estis unu el la plej bonaj. Per granda aplaŭdo la ĉeestantaro dankis lin.

En la kadro de la festo, S-ro W. J. Drummond prezentis belan brakhorlogon al S-ro E. McKenzie pro multjara aktiva agado en la movado. Luksa manĝo finis sukcesplenan vesperon.

● **HOBART:** La klubanoj daŭras renkontiĝi ĉiuvendrede por studado kaj preparado por ekzamenoj. S-ro M. Leereveld parolis (6/11) pri la poezio de Brendan Clark. Sekvis vigla diskutado pri tradukita peco el “La Komercesto de Venecio” de Shakespeare. Poste ni ĉiuj legis poeziaĵojn, kiujn S-ro Leereveld registris sur sonbendo kaj refunkciigis ĝin por ke ni ĉiuj aŭdu niajn proprajn voĉojn. Treege instrua kaj ĝuorica vespero.

La “Zamenhof-Festo” okazis (16/12) ĉe la hejmo de Ges-roj Leereveld. La ĉeestantaro tute plenis la ĉambron. S-ro Leereveld bonvenigis nin kaj parolis pri la signifo de la tago. S-inoj G. Cooper kaj A. Douglas prezentis amuzan teatraĵeton “Auseroj”, tradukitan el la angla. Ni ĉiuj devis streĉi la cerbon pri vortludo, kiun aranĝis S-ro G. Cooper.

S-ro Meredith, kiu ĵus revenis post 4-jara deĵoro en Port Moresby, faris

interese gan paroladon pri la vivkondiĉoj en tiu urbo. Li ilustris sian paroladon per belaj kolorkliŝoj. Nome de la klubanoj S-ino Douglas dankis Ges-rojn Leereveld pro ilia gastameco kaj helpemo dum la jaro, kaj faris al ili donacon kiel signon de nia estimo kaj amo. Respondante, S-ro Leereveld dankis nin ĉiujn kaj diris ke li kaj lia familio estis fremduloj en fremda lando, sed tamen, pro la internacia lingvo kaj la amika akcepto de la Esperantistoj, ili tuj sentis sin hejme. Neforgesebla vespero finiĝis per luksa vesperrango kaj gaja babilado.—ALDO.

KATOOMBA: Dum 1960 ni kondukis E-kurson en nia lernejo por 18 geln. de la sesa klaso. Domage ili forlasis nian lernejon sed ĉiuj forportis amon al la kara lingvo. En 1961 mi daŭrigos laboron sub aŭspicio de mia lernejestro—en la kvara kaj kvina klasoj. Tri membroj de nia instruistaro lernis E-on kaj eble min helpos.—John Buki.

MELBURNANOJ EKSKURIS KUN ULK KAJ MAOR.

Dimanĉon, Nov. 27, f-ino Paling kaj S-roj Ryding kaj Cohen deĵoris, por veturigi areton da MEK-anoj al la kamparo, kie ili piknikis kun la du "Tivoli" — samideanoj, ULK kaj MAOR, kaj montris al ili la Besto-Parkon ĉe Healesville. Partoprenis entute dek ok, kies gajan humoron eĉ miskompreno kaj dividiĝo pri la lundejo ne detruis.

Du trionoj manĝis kun S-ro Uik apud bela Maroondah-Akvujego, dum la aliaj lunĉis kun S-ino Maor en la Parko mem. Tamen, poste ĉiuj denove kuniĝis por esplori la Bestejon kaj rigardi la diversajn indiĝenajn birdojn kaj bestojn.

Tiurilate oni estis vere benata de la sunplena tago, ĉar kutime en malvarmeta vetero multaj bestoj nur dormante forkaŝas sin. Speciale komplezaj estis la dromajoj, kiuj, akceptante panpecojn, sin lasis fotografiĝi kune kun la donintoj, kaj iu sinjorino Kangaruo, kiu, promenante kun ido en la poŝo, tute trankvile toleris amikajn manpremojn kaj dorlotfrapetojn. Eĉ Josef(in)o en la poŝo ne timis la rigardantojn, kaj de tempo al tempo, kiam la patrino sin klinis teren, ankaŭ ŝi etendis la kapon por mordeti la herbon.

Sendube la vizitantoj akrobatoj trovis interesa sian renkontigon kun indiĝena artisto pri saltakrobatado.

VOJAĜO PER ESPERANTO EN EŬROPO.

Dum kelkaj monatoj en 1960, la edzino kaj mi vojaĝis per aŭtomobilo en Anglujo, Francujo, Hispanujo, Svislando kaj Belgujo, kaj kontaktiĝis kun multe da samideanoj. En Hispanujo, dum Majo, ni renkontis Esperantistojn en Sabadell, Moja, Manresa, San Felice de Cordinas, Tarrasa, Cheste kaj Valencia.

En ĉiu urbo la samideanoj organizis kunvenojn, aŭ publikajn aŭ privatajn, preskaŭ sen averto pri nia alveno. Mi alparoladis en Esperanto al ĉeestantaro de dek ĝis ducent personoj pri Aŭstralia helpe de miaj 35 mm.-diapozitivaj, t.e. koloraj lumbildoj en propra projekciilo. Plej ofte oni demandis pri popolo, vivkaj laborondiĉoj en Aŭstralia. Loka samideano tradukis el mia Esperanto en la katalunan lingvon, la patrinan lingvon, kiun oni en orienta Hispanujo uzas flanke de la oficiala hispana (kastila) lingvo.

Kelkfoje ni estis gastoj en la hejmo de samideano. Komprenoble mi fotografis la samideanojn kaj poste sendis ekzemplerojn kiel memorajojn al tiuj, kiuj gastigis nin.

Jen letero, kiun mi ricevis post nia unua vizito al Hispanujo:

"Karaj geamikoj: Vi multe feliĉigis nin per via letero kaj donaco de koloraj fotoj. La fotoj estas belaj. Ni multe fieras posedi ilin; ni gardas ilin kvazaŭ juvelon. Ĝis nun ni neniam vidis tiajn kolorajn fotojn sur papero. Kun ĝojo ni atendas la tagon kiam ni povas revidi vian edzinon kaj vin."

Tiele skribis Sinjorino Teresa Mimo, la edzino de Lluís Mimo, aŭtoro de Esperanta lernolibro por hispanoj, en Sabadell apud Barcelono.

La ĝentileco kaj gastameco de samideanoj estas mirindaj. Kun ĝojo ni revenis al Hispanujo dum Oktobro. Oni bonvenigis nin en Sabadell kaj aliaj urboj en la Barcelona regiono, ankaŭ en Bilbao kaj Zaragoza. Ni spertis la dolĉan plezuron de rerenkontiĝo; ni troviĝis inter geamikoj denove. Ree kunvenoj kaj prezento de lumbildoj. Neforgeseblaj tagoj.

Vizitojn ni faris al samideanoj en Paris, Granada, Toulouse, Bezieres,

Nancy, Bern. En Biel ni restis en ia hejmo de S-ro Marcel Erbetta kaj familio. S-ro Erbetta estas aŭtoro de la lerneja servado per Esperanto "Grajnoj en Vento".—F. V. Taylor.

LA BELA SUBTERA MONDO: LIBRO PRI GROTOJ.

Leander Tell. Eld. Stafeto: J. Regulo, Tenerife. P. 120. 2 Us. dol.

Sperta Sveda speleologo kaj E-isto kondukas nin en tiun sciencfakon, klarigante la diversajn -ologiojn rilatajn al ĝi. Interesas la malrapida ritmo de la erozio. Ekz., ĉe Wells (Somerset) akvo kontinue fluis de 1300 ĝis 1895 en kalkŝtonan tubon kaj elen, dum kiu tempo erozio formordis nur 12-15 cm. de la kalka fundo. Kelkaj grotoj (ekz. en Nov-Meks'kio kaj Kentucky) havas mezuron de 100 km. Vivado en grotoj povas favori sanon. La iom pli alta atmosfera premo, la pli alta grado de karbon-acido k.t.p., vigligas la koron kaj pulmojn. Dum militaj rifuĝejoj subteraj poste ŝanĝiĝis en kuracejojn por iuj malsanoj, ekz. astmo. Ĉe Klutert kaj alie dum la milito ĝis 20,000 homoj loĝis en grotoj.

Sekvas konsilo al grotesplorantoj pri taŭga ekipo, kaj pri eventualaj danĝeroj. Priskribo de grotoj en la mondo; ekzistas dekmiloj. Homoj ankoraŭ subtere vivas disloke en Hispanujo, Italujo kaj Ĥinuĵo. En Jugoslavio troviĝas mistera amfibio—la olmo—kiu ovonaskas super 15 gradoj C. kaj rekte naskas sub tiu akva temperaturo.

Li mencias grotojn ĉe Nullarbor kaj Narracorte (Aŭstralio), sed strange ne tiujn de Jenolan kaj Buchan. Finaj ĉapitroj priskribas aventurojn de li kaj aliaj speleologoj dum esploroj.

Traktante fosiliojn, Tell opinias, ke "la homo estis homo kaj ne simio antaŭ milionoj da jaroj". En sekva paragrafo li iel modifas per: "trovaĵoj indikas **homosimilajn** estulojn vivintajn antaŭ milionoj da jaroj".

Li poste mencias, ke Sudafrikaj eltrovoj (1924) supozigas la homaran aĝon eĉ multmilionan. Plue: La homo faris ilojn el ŝtono, ligno aŭ ostoj dum milionoj da jaroj.

"En Ĥinuĵo (oni) elfosis fosilion de prahomo . . . kiu sin pravas per iloj kaj div. objektoj posedi iom da kulturo jam antaŭ 300,000 jaroj".

Laŭ li, jam antaŭ 300,000 jaroj la homo konis la fajron; antaŭ 90,000 li sciis prepari felon kaj ledon; kaj antaŭ 9000 jaroj li kapablis kulturi teron kaj bredi brutojn. La arto pentri kaj desegni datiĝas de antaŭ 60,000 jaroj.

Parte subtenas lian konstaton Sir Arthur Keith ("Pri la Origino de Homo": Esp. Pub. Co., 1928):—"Estas senutile serĉi en tavolo pli antikva ol la Miocena pri la ekesto de la homo . . . proksimume unu miliono da jaroj". Tamen H. G. Wells ("A Short History of the World", 1922):—"Dum la Kvara Glacia Epoko (antaŭ 50,000 jaroj) la unuaj homosimilaj estuloj vivis sur la tero". Ni plue resumus: La Heidelbergo homo (ia ilfara subhomo) datiĝas je antaŭ 250,000 jaroj. Proks. antaŭ 50-60,000 jaroj vivis la Neandertala "homo", besto supozinde nekapabla paroli. Fine, antaŭ 30-35,000 jaroj aperis estuloj esence samaj kiel ni—ia unuaj veraj homoj, la Cro-Magnon kaj Grimaldi, nomitaj laŭ trovlokoj de iliaj fosilioj. Wells do ne parolas pri "miliono(j) da jaroj".

Tre interesa verko, pri scienco jam pli populariĝanta en ĉiu lando.

INTERESA.

Oni tro servigas la vorton "interesa" (kaj derivaĵojn), recenzante, raportante, priskribante. En unu ne tre longa klubkronikajo "interese" estas naŭfoje uzita. Pro tiu senpensemo ĝi paliĝe perdis signifon, banaliĝis, fariĝis nur ŝablonesprimo. Svarmas pli sukaj epitetoj: atentotira, atentotena, atent-ekscita, streĉ-atentiga, penso-stimula, mens-agita, anim-loga kaj multaliaj sence similaj. Ĉu la diversaj aferoj raportitaj ne povas eksciti sentojn aliajn ol tiun de simpla intereso?

Tiu esprima malfortaĵo ne estas propra al E-o; ne volante la mensan ekzercon, trovi pli trafan epiteton, ankaŭ Anglaj skribemuloj prese parad- as tiun formale ĝentilan sensignifajn en preskaŭ ĉiu paragrafo. Supozinde tio okazas ankaŭ ĉe alilanduloj.

Dez. kor-i kaj interŝanĝi bildkartojn, monerojn, E-ajojn, insignojn, aforismojn, kontraŭ p.m., libroj, insignoj k.t.p.

Zinovij Kozn, Kaliningradskaja 6, Kv. 27, Krivoj Rög 11, U.S.S.R.

Asociaj Ekzamenoj

Regularo.

La A.E.A. starigis ekzamenojn pri lingvoscio kun la aprobo de la Aka demiestro de Esperanto rilate al la normo laŭ tri kategorioj:

- (1) Norma elementa provo (E.D.A.E.A.)*
- (2) Normo supera provo (S.D.A.E.A.)*
- (3) Norma klereca provo (K.D.A.E.A.)*

Estas konsilinde fari la tri provojn laŭvice, sed estas permesate laŭ la kapableco de la kandidatoj, fari tuj la superan aŭ la klerecan.

(*Oni uzas la literojn nur korespondante kun Esperantistoj.)

Kotizoj:

Por la Elementa Provo la kandidato devas pagi: 10/- por la skriba parto; 10/- por la parola parto; 10/- por ricevi la diplomon.

Por la Supera Provo la kandidato devas pagi samajn kotizojn kiel por la Elementa Provo.

Por la Klereca Ekzameno la kandidato devas submeti al la juĝo de Komisiono jam eldonitan tradukaĵon aŭ originalaĵon, aŭ prezenti tezon, kiu devas esti notinda kontribuajo al la literaturo de Esperanto. Li pagos £1-0-0 por la ekzamenado de la tezo. Li ankoraŭ pagos £1-0-0 por la skriba ekzameno; ankoraŭ unu pundon li devas pagi por la parola ekzameno kaj fine unu plian pundon por la diploma. Entute £4-0-0.

Komisiono Ekzamena:

Je la starigo de la ekzamenoj, oni devis elekti aron da ekzamenistoj kaj tiucele oni invitis ĉiujn esperantistojn, kiuj posedis Kapablecan Diplomon de la Brita Esperantista Asocio, sin submeti al speciala provo estrata de la Akademiestro de Esperanto, S-ro Isbrucker. En tiu provo sep el la kandidatoj sukcesis, nome: Pastro C. C. Cowling, S-ro K. G. Linton, S-ro P. Hanks, S-ro F. R. Banham, S-ro A. Fridenbergs, S-ro P. Schwerin, D-ro C. J. Caldera. Ili fariĝis dumvivaj specialaj ekzamenistoj de la Asocio. En la estonteco ĉiuj gajnintoj de la Klereca Diploma de la Asocio fariĝos siavice dumvivaj ekzamenistoj de la Asocio; la posedan-

toj de la Supera Diploma povos esti aligitaj al juĝanta komisiono por la Elementa Provo, se necese.

Komisiito por la Ekzamenoj:

Por la regado de la provoj ekzamenaj la Asocio elektas dum periodo sendifinan Komisiiton, kiu konservas ĉe si la dokumentaron por la provoj: registron, formularojn kaj specimenaĵojn paperojn. La kandidatoj devas sin turni al la Komisiito por ricevi informojn rilate al la ekzamenoj, sed ili devas rekte pagi la kotizojn al la Kasisto de la Asocio, kiu siavice informos la Komisiiton pri la ricevitaj kotizoj kaj pri la numero de la kvitancoj. La Komisiito devas klopodi pri la forsendo de la ekzamenaj paperoj jam presitaj por la Elementa kaj Supera Provoj, kaj pretigi la mandatarojn por la Klerecaj Provoj, kiuj devas esti originale pretigitaj por ĉiu kandidato. Li rajtas elekti komisionojn ekzamenajn, el kiuj li ĉiam estas partoprenanto. Tio farante, li devas peni elekti almenaŭ unu el la ekzamenistoj el loĝantoj en la sama ŝtato en kiu loĝas la kandidato, por ke li povu fari la parolan provon. Por la Elementa kaj Supera Provoj la Komisiono Ekzamena povas esti formita eĉ de nur du ekzamenistoj, sed por la Klereca Provo la Komisiono devas konsisti el tri ekzamenistoj. Ĉiuj servoj faritaj de la ekzamenistoj estas honoroficaj kaj nur la poŝtkostoj povas esti repaĝitaj je prezentado de listo de kostoj bone detalitaj.

Elekto de Komisiito:

La Komitato de la Asocio elektas novan Komisiiton* je la eksigo aŭ eksigo de la malnova, donante preferon al dumvivaj ekzamenistoj. Se ne estos eble trovi akceptanton de la ofico en tiu kategorio, oni povos elekti kompetentan Esperantiston, kiu sin deklaras preta sin submeti tuj al la Klereca Provo; nur post sukceso en tiu provo li daŭre enoficiĝos, alie li restos nur dumtempa funkciulo, ĝis oni trovos posedanton de Klereca Diploma por enoficiĝi.

*La nuna Komisiito estas Dr. C. J. Caldera, 91 Smyth Road, Nedlands (W.A.).

THE FOUR ESSENTIALS . . .

Thanks to his persistence and linguistic intuition, Zamenhof succeeded in giving to Esperanto all four postulates necessary to the effectual existence of a world auxiliary language. They are:

- (1) Simplified and rational grammar.
- (2) Internationality of language-elements.
- (3) Free evolution and development, independent of any person or persons; natural growth and direction in accordance with its own genius.
- (4) Practical application and use in the work of the world.

Before Zamenhof and after him, all artificial projects have solved only one or two of these postulates. He solved all four, and his modesty, sagacity and love for his creation combined to bring him to the decision in 1912: to withdraw from any position that could be regarded as giving him any personal control over its destiny.

FINLAND TO USE ESPERANTO AS A BASIS FOR LEARNING FOREIGN LANGUAGES

Helsinki: Following on approval by the Minister for Public Instruction, the new syllabus of an intermediate school in Somero (Finland) anticipates the teaching of Esperanto to 11-year-olds in the first grade as a basis for learning German in the higher grades. As previous experiments have already proved, knowledge of Esperanto—a completely logical language—develops in scholars understanding of the structure and vocabulary of foreign languages. The experiment in Somero is arranging for six hours' teaching of the International Language in the first year, while in the second and third scholars will learn only German. In those higher grades one school subject, e.g., Geography, will be taught directly in Esperanto. Experiments in teaching Esperanto are being made at the same time in a number of countries, among them Holland, Denmark and Britain.

★ ★ ★

EDMUND JAAN, 35-jara, kor-as germane, angle, Esperante. Abja, p.k. 11, Estonia, U.S.S.R.

1861 - 1961.

En Aprilo 1861 komenciĝis la Usona intercivitana milito. Pli ol 600,000 viroj pereis pro ĝi, el kiuj 360,000 Por-Uniaj (Nordaj) kaj 260,000 Secesiaj (Sudaj). En la armeo de la Nordo servis ĉ. 2,200,000 viroj; la Suda, ĉ. 600,000.

La lasta Por-Unia transvivinto (A. Woolton) mortis en 1956, aĝe 108. La lasta aŭtenta Secesia (W. Lunly) mortis en 1957, aĝe 109. W. Williams (Secesia), kiu asertis sin 117-jara kaj veterano de tiu milito, mortis 1959, sed liaj pretendoj pri aĝo kaj servo estas disputataj.

Ekzistas pli ol centmil libroj kaj broŝuroj pri la terura konflikto. Homoj de sama lingvo, ili tamen feroce batalis, kaj ankoraŭ en la koroj de multaj Usonanoj restas maldolĉa pens-heredo pri tiu terura tempo.

PROPRAJ NOMOJ.

Ne plu embarase grimacu, karaj, kiam vi parolas pri la sekvantaj korifeoj. Jen la prononco:

Archdeacon (arŝdik'n); Baghy (bagi); Fruitier (fruitje); Grosjean-Maupin (grojan mopen); Kalocsay (kaloĉai); Szilagyi (siladji); Waring-hien (varengjen); Totsche (toĉe).

VOICE OF AMERICA!

March 17, 24, 31, and April 7
7155 kcs. 1100-1130 GMT, 41.92m
This is 9-9.30 p.m. in Australia
Those who can, listen in!

S-ro Leif Heilberg (28-jara), 4 Cole St., San Francisco—kun nuditoj, naturistoj, pri organizado de grupoj.

(Nia anonca tarifo estas 5 ŝil. pri tri linioj.)

Hastings & St. Leonards (Eng.), Esperanta turisma folio kaj bela ĉiudono. Petu ĉe: Information Bureau (E), Verulam Place, Hastings, Sussex.

★ ★ ★

Pyke Examination. — Prize-winner: Rex Hanney (S.A.). Certificate: Peter Hill (W.A.); J. H. Norman (Q.); Winifred Sandford (Q.), H. Petley (Q.).

The Australian Esperantist

Transmission by Post as a Periodical

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15\$ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5\$.



Editor: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

No. 21 (101)

MELBURNO

Marto - Aprilo, 1961

JARO DE SUKCESOJ

(Raporto de la Prezidanto de A.E.A., 1960.)



En "Australian Esperantist", en la rubriko "Aŭstralia "Kroniko" la aliĝintaj organizadoj de nia asocio raportis pli malpli detale pri sia surloka agado dum la jaro 1960. Mi gratulas ĉiun organizadon, la ofich avantojn kaj la membrojn. Mi gratulas aparte niajn amikojn en Melbourne kaj Sidnejo, kiuj organizis kooperativojn kaj aĉetis domojn, honore al Zamenhof kaj Esperanto, centrojn el kie disfluas la kono pri nia lingvo. Sajnis al mi dezirinde tamen verki mallongan raporton pri aliaj pli tut-aŭstraliaj rezultoj de nia laboro en A.E.A. dum tiu periodo.

Tuj post la fino de Zamenhof-jaro ni komencis la kampanjon "En la Lernejojn". En tiu kampanjo mi menciis nur la ĉefajn erojn, nome:

- (1) Okazis en Hobarto la plej grava decido pri la uzo de Esperanto dum la tuta historio de A.E.A.—la decido de la Eduka Departemento de Tasmanio inkluzivi Esperanton por la lerneja Direktorio-Ekzameno (Schools Board Examination). En la manlibro por 1961 (Manual for 1961) troviĝas sep paĝoj pri la fako Esperanto—la celoj de la ekzameno, la detaloj pri la kursoj unua ĝis kvara jaro, kaj listoj de E-libroj

kaj gazetoj. En la Kvakera Lernejo S-ro Leereveld kaj liaj kunlaborantoj nun instruas multajn infanojn kiel parto de la regula laboro de tiu lernejo.

- (2) En Katoomba samideano John Buki, instruisto, persvadis sian lernejestron kaj ankaŭ la asocion de gepatroj enkonduki Esperanton en la lernejon. Li verkis tre interesan raporton pri la afero al la Sidneja Societo, kiu helpis per libroj, gazetoj k.t.p.
- (3) En Adelajdo S-ro L. Newell gvidis bonegan klason en la Teknika Lernejo.
- (4) En Melbourne klubetoj daŭre funkciis en Scotch College Skota Kolegio kaj Huntingtower School (Lernejo de la Eklezio Kristansciencista).

Je Pasko la Tutaŭstralia Kongreso de Apekskluboj (similaj al Rotario sed por junaj viroj), havis valoran diskutadon en kiu partoprenis kelkaj bone informitaj Apeksanoj. La Kongreso akceptis rezolucion kiu rekomendis al la 300 kluboj, ke ili instigu surlokan intereson pri la studado de Esperanto kiel "lingua franca". En junio la gazeto "The Apexian" (La Apeksklubano) enhavis artikolon "Esperanto is Easy" (Esperanto estas Facila) kune kun la nomoj kaj adresoj de ĉiuj Esperanto-organizadoj kaj de la delegitoj de U.E.A. en Aŭstralio. Rezulte de tio Apekskluboj en diversaj lokoj invitis niajn organizadojn sendi prelegantojn al kunvenoj. Ekzemple, la 25-an de junio s-anoj F. Mueller-Sorau kaj V. Gueltling veturis al kunveno de la Apekskluboj en Distrikto Unua kaj alparolis 80 ĝis 90 personoj.

inter ili S-ro P. E. Lucock, Prezidanto de la subkomitato pri la Unuigintaj Nacioj de la Parlamenta Komitato de Eksterlandaj Aferoj. En aliaj partoj de Novsudkimrujo, Viktorio kaj la Aŭstralia Ĉefurba Teritorio la Esperantaj Organizaĵoj ricevis similitajn invitojn. En Wagga grupeto komencis la studadon de Esperanto, en Goulburn same, eble en Woy Woy kaj aliaj lokoj ankaŭ.

Estis rezulte de la laboro de aŭstralia esperantisto, ke la fama hinda reformisto, **Vinoba Bhave**, lernis Esperanton dum la fruaj semajnoj de la jaro. Pri la laboro de la varbinto kaj de la instruisto (Tibor Sekelj) plene raportis "Esperanto", la organo de U.E.A. Grava aŭstralia ĵurnalo, "The Age", enhavis longan kaj favoran raporton. Ege gratulinda estas nia samideano John Matasin!

Kvankam la jubilea jaro fakte finiĝis, **U.N.E.S.C.O.** (UNESKO) decidis en 1961 honori D-ron Zamenhof. Tio ebligis valorajn paŝojn rilate la aŭstralian registaron, kiu faris novan filmon (detaloj aperos en alia rubriko), eldonos artikolon verkatan de Kevin Smith en la studenta gazeto "Hemisphere" (Duonsfero), kaj promesis dissendi radioprogramon pere de Radio Aŭstralia kiam ni povos sendi al ĝi taŭgan programon por speciala okazo.

La servoj de A.E.A. bone funkciis dum 1960. S-ro F. R. Banham, la Redaktoro de "Australian Esperantist" (La Rondo) revenis el Anglujo kaj rekomencis sian fidelan kaj valoran laboron, pri la gazeto kaj pri sia klaso por tradukistoj. F-ino V. Cox fidele kaj regule ekspedis nian gazeton. Gesinjoroj Milligan sperte kaj entuziasme organizis kaj evoluigis la libroservon. D-ro C. J. Caldera bonevole transprenis la gravan taskon de Komisiito por la ekzamenoj de A.E.A. S-ro Mueller-Sorau komencis novan servon pri biblioteko (libroj, diskoj kaj sonbendoj). Al ĉiu mi oferas la dankojn de nia Asocio kaj niajn bondezirojn por la nova jaro.

Mi dankas ankaŭ tre speciale al nia nelacigebla sekretario, Herbert Koppel, kaj lia "pli bona duono", Fay, al nia aŭtoro/delegito/kasisto Ken Linton, al miaj vic-prezidantoj (aparte al eksprezidanto Fred Williams) kaj al ĉiuj, nekonataj aŭ forgesitaj, kiuj faris 1960 jaro de sukcesoj.

—RALPH HARRY, Prezidanto.

Australia Kroniko

● **MANLY:** Je dimanĉo (19/2), S-in o Marjorie Duncan, instruisto de Esperanto ĉe Manly Vespera Kolegio, kunvenigis siajn gelernantojn, kun la celo fondi klubon, kiu servos kiel socia kaj kultura centro. Kvardek homoj ĉeestis la kunvenon, inkluzive de F-ino Penny Ferguson, la gastparolanto; Ĉef-konsilantino May Ambrose; kaj Ĉef-konsilanto F. S. Preacher, kiu prezidis. Oni elektis tri membrojn por pritrakti la Statuton kaj Regulojn, kaj por ilin prezenti ĉe la venonta kunveno. Tiu okazis la 19an de marto, kiam la Klubo vere fondiĝis, kun pli ol 40 anoj. La Prezidanto estas S-ro H. V. Morgan; la Kasisto, S-ro A. Heedon; kaj la Sekretarino, S-ino B. Cleminson, 20 Sturgess Av., Harbord (XF 1854). Bondezirojn sendis S-ro W. C. Wentworth, M.H.R.; S-ro D. Darby, M.L.A.; Profesoro W. F. Connell, Profesoro pri Edukado ĉe la Universitato de Sydney; kaj S-ro E. H. Furzer, Estro de la Vespera Kolegio, kie Esperanto estas instruata jam de 1959.

La Klubo kunvenas ĉiun trian dimanĉon en la monato, je 2.30 p.m., ĉe la hejmo de Ges-roj Bedwell, 5 East Esplanade, Manly. (XU 1378). Vizitantojn oni kore bonvenigas.

● **SYDNEY:** S-ro W. Chandler, kiu senĉese penadis pri Esperanto en la lernejoj, raportas, ke la jara Konferenco de la Instruista Federacio en Novsudkimrujo rekomendis la subtenon de ia propono pri enkonduko de E. en altlernejojn prepare por la studado de aliaj lingvoj. En Novembro, 1959, la Konsilantaro atentigis pri tio la Komitato por Esploro pri Pli Alta Edukado, kies rekomendon ke la evoluigo de novaj kursoj por la 4 ĝis 6-jar-plano inkluzivu ankaŭ E-kurson en altlernejoj, aprobis la Estraro (7/7/60) kaj antaŭsendis al la Direktoro de Edukado.

La Sydney E-Societo kunvenas ĉiun lundon je la 8-a vespere en "Esperanto House" (143 Lawson St., Redfern), kie vizitantoj estas ĉiam bonvenaj. Lastatempe S.E.S. estis akceptata kiel asocia membro de la Bon-Najbara Konsilantaro.

La jarkunveno okazis la 27-an de Feb. kaj la jenaj personoj estis elektitaj: Prez.: S-ro Stan Drake; Vic-

Mar. 1961

Prez.: S-roj John Matasin, F. Mueller-Sorau; Sekretario: F-ino Edna Dash; Kasisto: S-ro Frank Dash; Bibliotekisto: S-ro Emil Amann; A.E.A. reprezentanto: S-ro Volo Gueltling; Interrelata Oficisto: F-ino Penny Ferguson.

Estas esperplena signo, ke la Sydney Esperanto Society sukcesis enkonduki Esperanto-kursojn en 4 ŝtatajn vesper - lernejojn (Evening Colleges).

Kursoj okazas regule en la jenaj lernejoj: Ashfield Evening College (instruisto, S-ro F. Mueller-Sorau); Hornsby Evening College (instr., S-ro Mueller-Sorau); Manly Evening College (2 kursoj - instr., S-ino Marjorie Duncan); Mosman Evening College (instr., S-ro Kevin Smith).

Ĉiuj klasoj estas bone frekventataj kaj verŝajne ni baldaŭ devos komenci duan kurson ĉe Hornsby Evening College, ĉar jam kelke da personoj sin registrigis kun la estro de la lernejo por nova kurso.

Dum la lastaj Pasko-tagoj Okazis Pacifista Konferenco en Sydney. Ĉeestis tiun kunvenon ankaŭ D-ro Fred Williams, kiu faris tre bonan propagandon por nia afero. Malgrandan Esperanto - ekspozicion montris nia fervora s-ano Mueller-Sorau, kiu ankaŭ varbis per paroladeto por nia ideo kaj eĉ vendis kelke da lerno-libroj kaj gazetoj.

● **BRISBANE:** La Zamenhoja Festo havis lokon en la plej eminenta hotelo en Brisbano, la 15-an Dec. Estis aranĝite de S-ino Grant kaj S-ino S. E. Beck ankaŭ multe helpis multe pri la aranĝoj. Reprezentantoj de la gazetaro estis gastoj, kaj artikolo aperis en ĵurnalo "Courier-Mail".

S-inoj Norman kaj Beck bele pianludis kaj S-ro Norman kantis Esperante. F-ino Lewis deklamis poemon kaj S-ino Norman provis muzikon dum la konversacio post la manĝo. Ankaŭ ĉeestis S-ro Johnston, kiu instruas Esperanton en Townsville sub aŭspicio de Fako de Edukado por Plenaĝuloj, kaj F-ino Knight el Charters Towers kiu ankaŭ intencas instrui en la sama kadro.

Ĉeestis 24 personoj kaj la afero estis plensukcesa, efektive, laŭ opinio de la plimulto la plej bona ĝis nun. La hotelo estis Lennons.

S-ro H. N. Love, dumviva ano de la Societo, prezidis la Jarkunvenon,

kiu okazis lundon, 27-an Feb. en la kunvenejo Martin Chambers, Brisbane. Ĉar dum la pasintaj 8 jaroj S-ro S. L. Parry estis Prezidanto de la Societo, li rifuzis re-elektiĝon en iun oficon. Pro privataj kialoj S-ino Grant ne povos plu sekretarii. La jena Estraro estis elektita: Prez.: S-ro K. D. Guenster; Vic-Prez.: S-ro H. V. Petley; Sekretario: vakas; Kasisto: S-ro G. A. Grant; Kontrolo: S-ro O. H. Behncken.

● **ADELAIDE:** Kun granda plezuro ni povas informi ke fondiĝis la "Adelaide Esperanto Club" la 24-an Jan. Prezidanto estas la malnova E-isto Kolonelo David Fulton, kaj sekretario fariĝis la juna entuziasmulo Rex Hanney (34 Scott Street, Parkside), kiu samtempe ankaŭ prizorgas la postenon de kasisto. La bibliotekon kaj la A.E.A. libro-servon prizorgas S-ino Beryl Randles (5 Roslind Street, Kensington Gardens, S.A.) la kunvenoj okazas marde en la "South Australian Institute of Technology", Frome Street. A.E.A. gratulas la novan klubon kaj esperas regule ricevi raportojn pri ĝia agado. Gratulojn ankaŭ al nia malnova s-ano Newell, al kies senlaca laboro ni dankas la fondiĝon de la nova klubo.

● **PERTH:** Vespere (3/3), nia Ligo provis novan stilon de societa kunveno. Per aŭtomobiloj ni venis al la hejmo de nia Prezidanto en la urbo Kalamunda, malproksima 20 mejlojn de Perth. Tie ni babilis, kantis, trinkis kaj manĝis, kaj poste hejmeniris rondveture tra montetoj en la lunlumo, rigardante malsupren al la lumoj de la malproksima ĉefurbo.

Ni nun klopodadas havigi permeson de la Poŝta Departmento por sendi niajn monatajn avizilojn pri Ligoferoj kiel oficialajn ĵurnalojn. Tiamaniere, ni ŝparas multe da mono kutime uzita por poŝtmarkoj. Nia ĵurnaleto havas tre malnovan, jam uzitan nomon—"Nigra Cigno".

—JACK HAWKS.

● **HOBARTO:** Kun granda plezuro ni bonvenigis (3/3) S-ron Morris, kiu ĵus revenis post ferio dum kiu li marvojaĝis laŭ la bordoj de Nova Gvineo. Li parolis al granda ĉeestantaro pri sia veturado per bordoŝipo, kaj ilustris sian paroladon per belaj kolorkliŝoj.

Ĉe nia jarkunveno (5/3) ĉiuj oficistoj krom la Sekretario reelektiĝis. Nia Sekretario, S-ro A. Nightingale,

devis eksiĝi pro manko de tempo. S-ro E. Bantick konsentis preni sur sin la oficon. S-ro Leereveld raportis kontentigan progreson de Esperanto en la Kvakera Lernejo. En ĉi tiu jaro proksimume 200 geknaboj lernas la lingvon.

Nia Klubo ricevis salutojn de U.S.S.R.-klubo por Aŭstralio-tago. Ĉiuvendre niaj anoj kunvenas ĉe la hejmo de Ges-roj Leereveld por pristudi E-aferojn.—ALDO.

● **MELBOURNE:** Nova Jaro signifas novan kampanjon, novan kurson; sed nova kurso bezonas novajn studentojn. Kiel allogi tiujn al la afero? Eĉ malgrandaj reklamoj en ĵurnaloj estas multkostaj, kaj ŝajne ne multaj traegas. Preskaŭ la penoj fiaskis, sed feliĉe la sorto alportis helpon.

Tute neatendite, venis peto de ĵurnalisto pri intervjuo por vespera gazeto, "The Herald". Sekvis tre bona artikolo, kiu vekis grandan scivolon kaj allogis multajn komencantojn.

Lunde, en la nova Esperanto-Centro, kunvenas nuntempe tri grupoj da komencantoj sub gvidado de D-ro A. Fridenbergs, S-ro W. J. Drummond kaj F-ino Elsie Godfrey. Merkrede en la malnova klubejo plua grupo da komencantoj lernas sub instruo de S-ro H. Koppel, kiu ankaŭ gvidas la studadon de kelkaj progresintoj. La tradukrondo daŭrigas sian laboron kun S-ino Koppel, sed malgraŭ freŝaj vizaĝoj la nombro ne pligrandiĝis. Kun bedaŭro ni devis adiaŭi nian Bibliotekiston, S-inon Betty Jackson, kiu translokiĝis al Newcastle. Bedaŭre ni devas ankaŭ raporti foreston i.a. de multjara vizitinto, S-ro R. Cecil, pro malfavora sanstato. En Armadale, la grupo gvidata de F-ino Paling kaj D-ro F. Williams ankoraŭ kunvenas jaŭde.

Laŭkute la merkredaj kunvenoj finiĝas per unuhora programo per progresintoj al kiuj jam kontribuis: S-roj H. Koppel k. M. Cohen (11/1)—"Okazintaĵoj dum la Ferioj"; S-ro F. Taylor (18/1, 15/2 k. 22/3)—kliŝoj pri "Francujo, Svisujo k. Hispanujo", "Norfolk, Anglujo", k. "Vojaĝo al Eŭropo"; S-ro J. Ryding (25/1)—kliŝoj pri "Anglujo"; S-ro K. Linton (1/2 k. 1/3)—Poezioj de William Blake, "La Tigro", k. de T. Grey, "El La Elegio"; S-ro F. R. Banham (8/2)—du mallongaj rakontoj, kiujn

li mem tradukis; S-ro E. McKenzie (22/2 k. 29/3)—pri "Sciencisto, Michael Faraday" k. pri rakonto de amerika verkisto, O. Henry.

RENDEUVUO: Parolante ĉe la januara kunveno, D-ro Fridenbergs pri-traktis iom malestime, sed ĉiam gajhumore la hodiaŭajn gazetojn, kiuj grandubrike prezentas nur sensaciajn malgravajojn, dum mondgrava, internacie atentinda novaĵo troviĝas nur malfacile duonkaŝite en malgrandaj paraĝrafoj meze de la ĵurnalo.

Per pluaj belaj kliŝoj pri Melburno, Bruselo kaj Hispanujo, S-ro F. Taylor distris Rendeuvanojn ĉe la februara kunveno. La sama vespero estis elstara okazo pro transmaraĵ vizitantoj, ĉar ĉeestis Ges-roj Freling el Nederlando kaj niaj akrobataj geamikoj, Ulk kaj Maor. Bedaŭrinde, tiu estis ankaŭ la adiaŭo por la lastaj.

La marta kunveno, okazinta je Sankta Vendredo, tamen allogis sufiĉe da anoj. La parolanto, prezentante sub malnova titolo ĉiam novan informon, kiel ankaŭ tre belajn kolorkliŝojn, estis S-ro E. Hanks. "Vidindaĵoj rigardataj se ne observataj" inkluzivis lokojn kaj aferojn aŭstraliaj historiajn, geografiajn, botanikajn kaj zoologiajn laŭlonge de la marbordo inter Kvinslando kaj Viktorio. Samvespere ni devis malĝoje adiaŭi niajn vizitantojn el Nederlando, Ges-rojn Freling.

● **SEYMOUR:** En la kadro de vesperaj klasoj por plenaĝuloj ĉe la loko Altternejo, kurso por Esperanto komenciĝis en Marto sub gvidado de S-ro Percy Holmes. Pli ol 10 aliĝis.

GAJA PIKNIKO EN SANDRINGHAM

En bela sunplena tago, dimanĉon (5/2) multaj M.E.K.-anoj kunvenis ĉe la hejmo de Ges-roj Ryding en Sandringham por ĝui denove la kuneston de Ulk kaj Maor. Post agrabla manĝo en la hejmo de la gegastigantoj, oni povis, ĉiam babilante, tre plezure pasigi la horojn per promenado tra bela ĝardeno, per marŝado laŭ apuda strando, per naĝado en la maro kaj per posta sunbano sur la sablo, kie S-ro Ulk, per kelkaj ekzercoj, rapide allogis plurajn ravitajn, konkurvolajn knabetojn. Nur post dua manĝo je vesperiĝo la gajuloj disiĝis.

THE FILM "THIS LAND AUSTRALIA"

The 16 mm sound film "This Land Australia" with commentary in Esperanto is a production of the Australian Government Film Unit. It replaces the Esperanto version of "Australia Today", which has provided information and pleasure for scores of thousands of Esperantists and their friends throughout the world since 1953.

"This Land Australia", like its predecessor, is in full natural colour and lasts 25 minutes. It gives a general picture of Australia including scenery, flora and fauna, agriculture, the pastoral and fishing industries, mining and manufacturing, schools and sports. It shows the transportation of sheep and beef by air, a wedding ceremony in New Guinea, an Australian outpost in Antarctica, the national capital, Canberra, and the State capitals.

The commentary was adapted for Esperanto by the Sydney Esperanto Club and Mr. F. R. Banham of Melbourne. It was recorded in standard Esperanto by Mr. R. L. Harry of Canberra, President of the Australian Esperanto Association.

Copies will be available on loan to national Esperanto Associations only from:

The Australian News and Information Bureau, Australia House, The Strand, London (for organizations in Europe, Middle East and Africa).

The Australian News and Information Bureau, 636 5th Avenue, New York 20, New York, U.S.A. (for organizations in America).

The Australian News and Information Bureau, Canberra, A.C.T., Australia (for organizations in Asia and Pacific).

A.E.A. MAGNETOFONO SERVO

Peranto: F. Mueller-Sorau, 8/41 Livingstone Rd., Petersham, N.S.W.

Mendu laŭ la Bobeno-N-ro. Aldonu duan numeron, se la dezirata sonbendo momente ne estas havebla. Lukosto po bobeno monate 10ŝ plus sendkostoj per registrita poŝto. Zorge traktu la sonbendojn kaj resendu tuj post uzo per registrita poŝto.

N-ro 1: (18") 43-a Univ. Kongreso de E. Ivo Rotkvič "Traduki artverkon—ĉu utopia? (43 Min.)—Jubilea

Festprogramo 50-jara jubileo de fondaĵo de UEA (Prof. Privat, Hans Jakob, H. W. Holmes, Tibor Sekelj, Prof. Lapenna) (75 Min.).

N-ro 2: (18") E. Andersson: "Vaamlando re Selma Lagerloef kaj la Fabelo de Goesta Berling." (33 Min.) J. H. Sullivan: "La E-movado kaj la junularo." (Surbendigita dum la jarkunveno 1958 de la Society of British E-Teachers.) (30 Min.)—Prof. Giorgio Canuto: "La stratakcidentoj laŭ medicina vidpunkto." (54 Min.).

N-ro 3: (18") D-ro A. Baur: "La persono de Heinrich Pestalozzi." (Surbendigo de Svisa Radio) (5 Min.)—43-a Univ. Kongreso de E.: Solena Inaŭguro (Prof. Canuto, Prof. Privat, Ing. Zamenhof k.a.; Festparolado, Prof. Lapenna) (95 Min.)—Fakkunveno de Int. Geografia Asocio (i.a. Tibor Sekelj) (20 Min.).

N-ro 4: (18") Prof. E. Privat: "Pacaj metodoj de interŝtata kunvivado." (4 radio-prelegetoj de la Svisa Radio) (20 Min.)—C. W. M. Baans: "La vivo de Ĉajkovski kun muziko de tiu ĉi komponisto." (100 Min.)

N-ro 5: (18") Poul Thorsen: 12 poemoj el "Rozoj kaj Urtikoj" (30 Min.)—Internacia Somera Universitato: Prof. Lapenna: "La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj," (46 Min.)—Prof. Collinson: "La etimologio en naciaj kaj internaciaj lingvoj." (50 Min.)

N-ro 6: (18") Fragmentoj el 82 diversaj programoj (120 Min.).

N-ro 7: (13") Parolo de D-ro Zamenhof (1909 en Barcelona; tre malbona registrado; paroloj de hispanaj amikoj) (4 Min.); Katalunaj kantoj (6 Min.); Kataluna muziko (28 Min.); Katalunaj dancoj (6 Min.).

1961 KOMENCIĜIS BONE POR PROPAGANDA LABORO

Je invito de "Apex Club" en Seymour, S-ro Percy Holmes alparolis la anojn (26/1), rezulte de kio, ia loka Altlernejo decidis inkluzivi Esperanto-kurson en siaj vesperaj klasoj.

Enhavriĉa okazo en la nova Melburna Esperanto-Centro, sub titolo "We at The Crofts", donis al la diversaj luantoj oportunan okazon por interkonatiĝi kaj klarigi la celojn kaj idealojn de siaj organizadoj—denove okazo por E-propagando. Nomo de la Esperantistaj gastigantoj, S-ino Koppel parolis laŭ la temo, "Zamenhof, a Practical Idealist".

Rezulte de artikolo en Melburna jurnalo, "The Herald" (24/1), alvenis du aliaj invitoj pri prelegoj.

Kiel lastminuta anstataŭulo por S-ro W. J. Drummond, S-ino Koppel faris luncnoran alparolon (8/2) al la "Kooroora (Virina) Klubo", kies anoj komune laboras diversmaniere pri sociaj bezonoj; kaj S-ro H. Koppel, post 60-mejla veturado, alparolis la anojn de "Business and Professional Women's Club" en Seymour dum ties speciala jara internacia vespero. Ĉi tiu prelego estis tre oportuna por la nova kurso en tiu urbo, kaj instigis kelkajn aligintojn.



SYDNEY INVITES YOU
to the
13th AUSTRALIAN
ESPERANTO CONGRESS

1 to 7 Jan., 1962.

Congress Fee: before 1 Aug., 1961: for A.E.A. members 25/-, for others 30/-; after 1 Aug., 1961: for A.E.A. members 30/-, for others 35/-.

Make hotel reservations as early as possible (£2 deposit). Send your reservations and Congress fees to the Congress Secretary, Miss Penny Ferguson, Box 54, King Street Post Office, Sydney. Watch for further details.

POR VIN DISTRI

"Hilismo (neutrala religio aŭ Homaranismo) estas la plej grava el ĉiuj laboroj, kiujn mi iam faris aŭ faros . . . La tuta afero Esperanta estas nur parto de tiu komuna ideo, kiun mi nomas Hilismo". Leteroj 21 Feb. kaj 24 Sept., 1905. P. 339, Originala Verkaro: Z. klare skribis, ke la Homaranismo tute ne estas identa kun la "interna ideo". Vidu: Heroldo de E., 16 Dec. 1956.

★ ★ ★

Kial la Plena Vortaro uzas D por Millidge kaj N por Bennemann?

★ ★ ★

El letero de Reto Rossetti al G. B. Shaw:—Hodiaŭ, en Britujo, ŝajnas absoluta aksiomo, ke, por pritaksi Esperanton, homo devas ĝin tute ne scii. Se homo plene posedas Esperanton, por ke li povu fari juĝtakson pri ĝi, lia atesto aŭtomate senvalidiĝas, ĉar li jam fariĝis "Esperantisto"!

★ ★ ★

En sia "Leteroj", Lanti "preferas insulton en Esperanto ol laŭdon en sia denaska lingvo".

★ ★ ★

Estas en Australio (loĝ. dek milionoj) malpli ol cent homoj, kiuj povas paroli Azian lingvon.

—Melburna "Sun", 3/60.

★ ★ ★

Baza postulo por ĉia recenza laboro: "Se la verko ne tuŝas la intereson aŭ simpatian, oni prefere transdonu ĝin al alia homo. Oni devas simpatii kaj akcepti la intencon de la verkisto, kaj sur tiu bazo oni povas kritiki frukte kaj laŭplaĉe draste. Sed sen tiu komuna ligo inter aŭtoro kaj recenzanto neeble estas recenzi".—Reto Rossetti.

★ ★ ★

Inter vizitantoj al la SAT-Oficejon en Parizo venis el centra Afriko Nigeria K-do Ogwuazor, registara funkciulo, kiu tre bone parolas Esperanton. ("Sennaciulo", 2/61.)

★ ★ ★

La Universala Poŝta Unio preparas oklingvan P.T.T.-vortaron kun E-a traduko; ankaŭ deklingvan vortaron (inkluzive E-on) per la Int. Kom. por Teletekniko. La Esp-a Poŝtista Unio (Parizo) faras la E. laboron.

★ ★ ★

Dojena veterano, D-ro A. Stamatidis—jam 92-jaraĝa—aliĝis al E. en 1888 pere de franca gramatiko E-a, kiam li estis studento en Samos. La Enciklopedio de E. eraris pri sia dato (1914). Li ankoraŭ instruas E.

★ ★ ★

Recenzanto, kiu nefavore taksas libron, aŭ iom pikkritike ĝin traktas, ordinare ĝin ja legas. Favoranta recenzanto ofte ne legas ĝin, sin kontentigante per dono de supraĵa laudo garnita per kelkaj tekstoj.

★ ★ ★

La N.Z.E.A. faris inspiran sonbendon: "What does NZEA do for its Living?" Jen sugesta ideo por ankaŭ ni.

Recenzoj

La Nekonatino: R. C. Muschler. Originala novelo. Trad. L. Goppel. Eld. Limburger Vereinsdruckerei, Germanujo. P. 72. Prezo 4ŝ. 6p. broŝ., 6ŝ. 3p. bindita.

Supraĵe vidate, la rakonto estas nur simpla historio de socie ŝirmata fraŭlino, kiu, ricevinte far-sendependecon, vojaĝe renkontas titolhavan Anglon kaj al li enamigas. Ŝi reprenas tenton atenci la seksan moralon, sed, kiam jam foriris la amato, ŝi ne povas kontraŭstari la animpelon al sinmortigo.

Pli ol banala novelo ĝi estas; ĝia delikate esprimita lingvaĵo efektive pentras spirite krizan viveron per tuŝoj, kiuj donas al ĝi signifojn nerimarkeblajn por "krudmanĝaj" legantoj.

Ke la verko havas altan literaturan kvaliton, kaj apartan impresi-povon, tion atestas traduko en ok lingvoj. Servante en klarsimplaj frazoj, preskaŭ ĉiu vorto estas trafite elektita, por efiki sian rolon—plej nete esprimi la humoron, la senton, la agon.

Trifoj Akurate je la Dekdua Horo: W. Galdart, el la Germana tradukis F. Ellersiek. Sama eldonejo. P. 160. DM 4.90. Kelkaj sinmortigoj, en sama maniero, cerbumigas detektiv-ĉefojn en tri landoj. Tiuj mortoj suspektigas pri psike direktata murdmotivo. Per fantazia, sed aŭdace originala klarigo finiĝas tiu atentostreĉa krimrakonto.

La teksto provizas ekscitan legadon en nuntempa felietona lingvaĵo. Ni tamen rimarkas vortojn, kies aperon multaj rigardos nenecesa:—vinki, holi, ciki, devociulo, depozo, liedo, notico k.a. La tradukinto uzis -ija por landnoma finaĵo, laŭ la ĝenerala Rusa sistemo.

NIA HEJMO de Francisko Candido Xavier. El la portugala tradukis L. C. Porto Carriero Neto. 237p. Broŝ. Eldonis Federacao E. Brasileira, Rio de Janeiro. Prezo?

Pri ĉi tiu verko la tradukinto modeste komentas: Ne-spiritistojn laŭŝajne ĝi ne interesas; ili ĝin ne legos, aŭ legos por distro en ia senokupa horo". Li tamen aldonas "Eĉ tiel, mi asertas, ĝi portus al ili grandan pro-

fiton, ĉar ĝi estus invito al fieruloj pensi pli serioze pri la vivo."

Precize en tio, mi opinias, kuŝas la valoro de la libro. Lingve ĝi ne estas elstara, kvankam la traduko, fare de Akademiano Neto, kompreneble estas tre kompetenta.

Ĝi prezentas bildon de transtomba vivo en alte organizita "spirita kolonio", kies iom banala nomo provizas ankaŭ la titolon de la libro.—R. McG.

Jarlibro de S.A.T. 1960-1: 67 Avenue Gambetta, Paris, 150 p. Kompletta informilo pri ĉiu flanko de tiu signifa organizacio. Bone presita kaj aranĝita, ĝi certigas facilan interrilaton de membroj en 45 landoj. Plena teksto de la statuto, reguloj, libroj haveblaj, listo de bibliotekoj kun E-a sekcio k.t.p.

La praktika uzado de E. estas fundamenta por S.A.T., liberpensa, kultura movado, kies bazaj konceptoj aŭ celoj estas la homara solidaro, kaj liberecana socio ĝuanta la fruktojn de hominda civilizacio. Ĝi kontraŭas la apartigajn tendencojn de la nuda naciismo.

Toleremo en la pensokampo estas paragrafito en la statuto. Tamen membroj intence agintaj kontraŭ la "celoj, principoj aŭ interesoj" de la Asocio "estas eksigataj". (Vidu: La Rondo, Jan., 1954.)

En Aŭstralio 23 membroj troviĝas en 11 lokoj; en Francujo 269 en 513. Peranto: Mr. M. Leereveld, 41 New Town Rd., Hobart.

NEUTILE, AMIKOJ!

Ni foje ricevas petojn aperigi anoncojn pri "baldaŭ okazontaj" festoj, jubileoj k.s. de amikoj en aliaj landoj. Nia gazeto eldoniĝas nur dumonate, tial tiaj petoj estas tute vanaj. Ni bezonas avizon pri tiaj aferoj almenaŭ tri monatojn antaŭ ol ili okazos. Longaj prokrastoj ĉe la presejo ofte senvalorigas eĉ niajn proprajn ĉi-urbajn kaj landajn anoncojn pri festoj kaj kunvenoj.—Red.

ESEKONKURSO

Ĝis la 31-a de decembro 1961, la Skolta Esperantista Ligo okazigos sian unuan esekonkurson kun tri monpremioj: Usona \$25.00, \$15.00, kaj \$10.00. Ni invitas vin aliĝi al "la Skolta Esperantista Ligo po tri ŝilingoj" jare kaj partopreni en nia esekonkurso, kies ĝeneralaj temoj sugestitaj sekvas:

Kiel la skoltismo maturigas nian junularon,
 Skoltoj kiel mondĉivitanoj,
 Kiel sukcesigi la skolon trupon.
 Konkurskondiĉoj:

La konkursanto devas esti dumtempa membro de la Skolta Esperantista Ligo.

Slipo atingebla ĉe la Kasisto devas esti alfiksita al la manuskripto kaj sendata al la adreso surpresigita.

Ĉiu manuskripto devas esti originaia verkaĵo simile aŭ skvanta la ĝeneralajn temojn supremenciitajn. La manuskripto aŭ devas esti tajpita kaj duoble spacita aŭ povas esti klare manskribita enhavante minimume 250 vortojn.

Ĉiu manuskripto sendita iĝos la posedajo de la Skolta Esperantista Ligo.

Kontaktu Stan Milligan, 274 Mont Albert Rd., Surrey Hills, E.10, Victoria, Australia.

KRITIKO

Prof-o G. Waringhien en "Franca E-isto" 1936:

La Infero (trad. Kalocsay): Mi konas nur unu tradukon—tiun de Littre, en la malnova Franca lingvo—kiu rajtus kompariĝi kun ĝi.

Hamleto (trad. Zamenhof): Tiu traduko ne estis farita laŭ la Angla teksto; verŝajne Z. uzis ankaŭ Germanan tradukon de W. von Schlegel, kune kun traduko Pola aŭ Rusa. Kromdire, estas en ĝi iom da misencajoj kaj preterlasaj devojiĝoj de la originalo. Sed la stilo estas admirinda, kaj la tradukaĵo, scene tre taŭga por teatro, faras grandan efekton ĉe prezento.

Faust (trad. Bartelmes): La stilo iom ofte estas malfacila.

Sinjoro Tadeo (trad. Grabowski): Iom malsimpla kaj foje eksterkutima; tamen ĝi estas tre grava verko, kiu verdire kreis la grandan poezion E-an.

La Faraono (trad. Kabe): Modelo de stilo klara kaj logika.

Marta (trad. Zamenhof): Unu el la plej gravaj verkoj de la E-a literaturo, por studado de la lingvo konversacia kaj ĉiutaga.

Jane Eyre (trad. Bulthuis): Iom nezoze tradukita.

Waringhien ankaŭ samdate skribis pri "Petrolo" (trad. Wm. Bailey): "Traduko neriproĉebla". Tamen en "F.E.," Marto 1937, kaj en "Sennaci-

ulo", Feb. 1948, li forte kritikis la stilon kaj vortuzon de la tradukinto.

LANDNOMOJ

En la Rusa ĉiuj landnomoj finiĝas per -ija. Do absolute unuforma landnoma sistemo. En la Franca: nur 17% da regulaj formoj kun -ie Angla: 25% kun -ia; Germana: 33% kun -ien; Pola: 90% kun -ja.

SOVJETUNIO

Rimarkinda aserto en "La Informilo de Internacia E-Muzeo" (Vieno): "En preskaŭ ĉiuj kluboj de sciencistoj en USSR aktivas E-sekcioj. Granda nombro da sciencistoj favoras E-on". Ĉu tio estas vera pri iu nekomunista lando?

RECENZOTAJ

El la Vivo de Sentaŭgulo (von Eichendorff); **Sageoj kaj Rakontoj laŭlonge de l'Rejno** (J. Pagenstecher); **Niko kaj Nina** (J. Berger); **Kiel Aŭtodidakto al Pedagogia Scienco** (K. Wiczorek). Eld. Limburger Vereinsdruckerei, Limburg / Lahn, Germanujo.

Sekretoj de la Marestaĵoj (P. Guinio). Eld. Kroatia Esperanto-Servo, Zagreb. Pluk (Poul Thorsen). Eld. Dana Esperanto-Asocio.

La Patro de la Lepruloj, kaj De la Dubo al la Kredoj: Skta. Kamilo, Bierbeek, Belgium.

TEACHERS

The N.Z. Teachers' Association has been formed. As U.E.A. is making a world survey on the subject of Esperanto in schools, it would be good for Australian Esperantist teachers to maintain a similar body here. Those interested could contact Mrs. Ruth Dyne, 10 Fettes Cr., Wellington, E.5, N.Z.

Sub konstanta Esperanta rubriko The Socialist Leader (28.1.61), semajna organo de la Sendependa Laborista Partio, 48 Dundas St., Glasgow, represis el nia gazeto: "Skribe Esprimu Vian Pensadon" (The A.E., 10/60).

De s-roj Peter Hill kaj Alan Towsey ni ricevis iom longajn listojn de koresponduloj en USSR, ĈS., Finnlando, Hungarujo kaj Bulgarujo. Plaĉus al ni ilin presigi, tamen spaco mankas por tio.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15\$ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5\$.



Editor: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

No. 22 (102)

MELBURNO

Majo - Junio, 1961

MODERN MAN AND THE ESPERANTO MOVEMENT.

Social Pressures Toughen Task of Propagators.

The problem of recruiting folk for Esperanto is much the same as confronts all idealistic and cultural movements today. The crisis is vast, if not world-wide. It concerns not only the young people, but those of other ages. Leisure time, notwithstanding a shorter working week, is ever shrinking, because of the growing need to meet the claims of the "higher standard of living", which seems to be the filling of homes with electrical and other gadgetry, enjoying more sophisticated forms of outdoor entertainment—and paying for these. Thus a man works two jobs—his normal daily stint, and such profit-sideline as he can manage in hours outside this. It may be that his wife also takes paid employment, which brings in three salaries, necessary, indeed, to acquire the things desired or to meet debts for those already obtained. Many of us, then, work more than the 60-plus denounced by the old reformers.

With luck one may steal an hour or so from the rat race to gape at television so painfully acquired. This state of things results in little reading, apart from ephemeral periodicals, superficial social life, and a withering of cultural aspiration—in fine, mental and spiritual marasma.

Furthermore, in our complicated society the rash of civic, religious, benevolent, fraternal and other bodies exerts a constant drain on many who feel a duty to attend a myriad meetings and accept honorary work.

Then there is the battle for prestige positions in our technical world—the cuff-links job that rates high salary and social pay-off—so every sighing youngster and would-be executive puts all he's got into specialised study that may open the golden gates. Under such pressures, and feeling that Esperanto has no urgency, he is apt to regard it as merely a pastime for dilettanti.

Three types, however, are still fertile ground to work on. (a) The rational, logical mind that sees in Esp-o the practical solution to the language problem, and a useful, even profitable, instrument within defined limits; (b) the idealistic, humanitarian, sympathetic to the motivating nobility inherent in the language and its aims, and searching, through international fraternity, a wider exchange of thought; (c) the language-loving and the literary—the former attracted by its ingenious structure and balanced internationality of vocabulary and syntax; the latter by the flexibility and freedom that point ways to more expressive nuance and phrasing.

In spite of all, there are pleasing signs. Courses in Esp-o are well attended in parts periferal to the Soviet Union, where folk patterns may produce effects different from ours. In Japan and Brazil wide religious and metaphysical circles favor Esp-o, and municipal authorities in some lands are experimenting with it.

Under obvious handicap, the English-speaking Esp-ists have much yet to do. The average age of the members of the British Esp. Assoc. is 50-60. If the thousands of unorganised Esp-ists in Britain joined the association statistics would take on a healthier look. Non-member Esp-ists detract from the impressiveness that adhesion would give when its leaders are officially asked for figures. In the U.S.A. the faithful likewise work under the shadow of a devouring idiom, vehicle of a vast culture. In Australia there are many outside the A.E.A. who could vastly strengthen it. Their membership would give to our centre a power to influence circles whose endorsement of Esperanto would go far to ensure its general acceptance.

Man must and will master the difficulties that beset his media of life. He who now sends his satellites to join the hosts of heaven will surely come to the means of conversing freely with his fellows of other speech. How soon depends on the time it takes to match his commonsense with his marvellous technical achievement, and the sane development of this his puny planet.

LITEROFTECO.

S-ro P. Schwerin, en Sydney, studento de la deĉifra arto, sendis al ni la sekvantan:

Jen frekvencoj, post studo de 11,600 literoj (2600 vortoj) el 8 libroj:

Angla: E-T- AONRIS-H-
DLFCMU - GYPWB -
VKXJQZ.

Franca: E- ASITN -RULO - D -
CMP - VQGFBBH - JX - YZKW.
Germana (sen vokalfondifoj): E -
NI - STRAD - HUG - MLCB -
OFK - WVZP - JZYX.

Hispana: EA - OS - RNID -
LCTU - MP - BGYVQFHJX-
K.W.

Esperanto: A - IEO - N - L -
RST - K - UJ - MPD - VGFB -
CGCUZ - SHĴĤ.

Laŭ M. Boulton en "Nica Literatura Revuo" N-o 32, Kabe (Kazimir Bein) mortis en Junio, 1959. Tre strange, ke ankoraŭ ne aperis eĉ unu nekrologo pri li en la gazetoj. Vidu: La Rondo, Dec. 1956.

Australia Kroniko

● **MELBOURNE:** Multvariaj programoj dum Aprilo kaj Majo. S-ro Linton daŭrigis siajn prelegojn pri gramatiko kaj poezio (5/4, 3/5, 31/5) S-ro Ryding prezentis (12/4) lum-bildojn pri la "Wilson's Promontory" kaj nia mondvojaĝanto S-ro F. V. Taylor (17/5) montris belajn lum-bildojn pri Francujo kaj Krimujo.

Germana mondmigranto S-ano H. Ph. Gunkel paŭzis dum 10 tagoj en Melburno. La 3-an de Majo li skizis sian flugvojaĝon tra Europo, Hindujo, Japanujo kaj Indonezio kaj la 10-an li prelegis pri Israelo, kie li laboris dum pli ol jaro. Inter alie li rakontis pri la vivo en la vegetaro kolonio "Amirim" ("kibbutz"), kie krom Israelanoj ankaŭ vivas amerikaj "Septagaj Adventistoj".

En la aprila kunveno de la "RENDEVUO" S-ro E. Hearne parolis en la E-centro pri ferioj en la Snowy Montaro. Li ilustris sian prelegon per memfaritaj kolorbildoj. En Majo S-ro H. Koppel, per koloraj diapozitivaj, prelegis pri Wolfsburg, la urbo de la "Volkswagen", kiu el urbeto nekonata fariĝis mondfama centro de industrio kun modelaj loĝkvartaloj modernaj. 3,000 automobiloj forlasas ĉiutage la Volkswagen-fabrikojn.

● **PERTH:** Nia Ligo funkcias kviete kaj malrapide progresas. Ni raportas du sukcesojn: D-ro Caldera, tre agema s-ano antaŭ kelkaj jaroj, revenis al ni kaj lerte estras studrondon; pli kaj pli s-anoj venas, por ĉeesti.

Due, ni varme fieras pri nia oficiala organo, "Nigra Cigno", kiu aperas ĉiumonate kun pli bona aspekto kaj enhavo. Niaj anoj kaj studentoj vice estras ludvesperojn kaj diskutrondojn.

— J. Hawks.

● **HOBART:** En Aprilo S-ro Ralph Harry devis viziti Hobarton kaj disponis tempon por paroli al la E.-lernantoj ĉe la Kvakera lernejo. Li kunportis gramafondiskojn kiuj surhavis belajn E-kantojn. Ĉiuj klubanoj ĝuis audi la diskojn kaj ni dankas S-ron Harry pro lia daŭra intereso.

La instruado en la lernejo bone prosperas. Je 15/4, 80 geknaboj el la E.-klasoj ekskursis al monto "Direction", ĉe la orienta flanko de

la rivero Derwent. Ili transpasis la ponton per aŭtobuso kaj grimpis la krutan flankon de la monto ĝis la supro. Post abunda nutraĵo ili disiĝis por esplorado. Poste, lacaj sed feliĉaj, ili malsupreniris kaj trafis la hejmenirontan aŭtobuson. Ges-roj Leereveld kaj S-ino Shankley prizorgis la gejunulojn.

Nia klubo kunvenas ĉiumarde ĉe Ges-roj Leereveld kaj ankaŭ la 1-an dimanĉon en ĉiu monato. Krome, S-ino Cooper gvidas kurson en sia hejmo.—ALDO.

● **CANBERRA:** La Canberra E-Klubo nun regule kunvenas ĉiun merkredon. 14 membroj auskultis popularajn kantojn pere de diskoj pruntitaj de la sekretario (11/1). Dankon al Jean Harvey pro la aparato! S-ro Gamble prezentis sonbendon registritan de la Melburna E-Klubo por la E-istoj en Genevo, kiam S-ro Harry deĵoris tie kiel Aŭstralia ĉefkonsulo (18/1). Filmojn prezentis S-ro Harry pri Malajo, Borneo, Tajlando, Kambodio kaj Hongkongo, kiujn li vizitis kiel Aŭstralia Komisiito en Singaporo (25/1). La 1-an Feb. S-ro Harry prezentis sonbendon el la AEA biblioteko de Sonbendoj. Ĝi surhavis prelegon pri la vivo kaj muziko de Ĉajkovski, kaj prelegojn de Prof. Privat. Ludvespero "Besto, vegetaĵo, mineralo" (8/2) estis sekva de vespero dediĉita al la loka, tutlanda kaj internacia E-movado (15/2).

La jarkunveno okazis je la 22-a de Feb. La prezidanto (s-ro Robbins) raportis pri la revivigo de la klubo, kiu nun havas 25 membrojn. La financa stato estas bona. la novelektoj: Prez. S-ro Ralph Harry; Vic-Prez.: S-ino Joyce Torr; Sekr.: D-ro Ross Robbins; Help-Sekr.: S-ino J. Harvey; Kasisto: S-ro N. Gamble; Bibliotekisto: S-ro R. Harry; Help-bibliotekisto: S-ro W. Smith.

● **ADELAIDE:** Dum la lastaj jaroj ne estis oficiala E-klubo en Adelaido, sed E-o restis viva, dank'al al la del. de UEA, f-ino W. Addis, kaj kelkaj aliaj malnovaj E-istoj, kiuj kunvenis en unu aŭ alia el siaj hejmo kaj aranĝis festetojn.

Tiam, venis al Adelaido s-ro Len Newell, kiu antaŭ du jaroj bv. donacis unu nokton el la semajno, por instrui E-on al kelkaj interesatoj en la domo de k-lo kaj s-ino Dave

Fulton. K-lo Fulton estas foja instruanto de E., kaj li kaj lia edzino bv. disponigis sian hejmon al s-ro Newell kaj alimaniere helpis revigligi la movadon en Adelaido. Ili instigis la okazigon de "Esperanto-Semajno" en Jan., kiam ni partoprenis vespermanĝon en bona restoracio, klišan prezenton, plaĝ-piknikon k.a. Dume la klaso de s-ro Newell bone progresis, kreskis; fine la nombro iĝis tro granda por la domo de k-lo Fulton, do ni formis la Adelaidan E-Klubon kun: Prez. K-lo D. Fulton; sekr.-kas. s-ro Rex Hanney; bibliotekaj librovendistoj, s-no Beryl Randles.

La klubo kunvenis la unuan fojon Feb. 12 en sia ejo—ĉambro de Playford Bldg. de la Sud-Aŭstralia Instituto de Teknologio—feliĉe ja malalta lupago. Ni legis gratulajn mesaĝojn de AEA. La klubo kunvenas ĉiun mardon vesperon, por elementa kaj progresinta instruo, parolado kaj praktikata uzado lingva. Bonege, ke ĝi havas profesian instruiston, s-ro Newell, tre kompetenta E-isto, kiu entuziasmigas lernantojn. Estas al li honoro, ke unu el liaj lernantoj gajnis la premion Pyke por 1961. La komitato de la klubo starigas programon kaj iuj jam paroladis diversteme: Kial Homoj Lernas E-on? Decimala Mono; La Historio de E-revuoj en Aŭstralio. Klasoj progresas; la klubo kreskas kontentige.

Unu membro, s-ino Newell, baldaŭ vojaĝos vizite al Eŭropo. Aprilo 12: la klubo havis adiaŭnan feston por ŝi dome de k-lo kaj s-no Fulton. Alestis pli ol 30—inter ili tri E-aj anoj de la Ziegfeld Follies, kiuj tiam estis en Adelaido. Oni ludis, konkursis, E-kantojn voĉverŝis. S-no Butterworth tre place solkantis. Je la noktmanĝo la sek-io publike deziris al s-no Newell bonan vojaĝon kaj prezentis al ŝi donaceton. Kiam ŝi transiĝis sian kukon—"Bona Vojaĝo" sur ĝi—ĉiu kantis "Jen la Horo Nun". Si dankis ĉiun, promesante fari al ni paroladojn pri sia vojaĝo kiam ŝi revenos post kelkaj monatoj. Ĉiu ĝuis tiun unuan klubfeston; multaj demandis: "Kiam la venonta?"

—Rex Hanney.

Mi vidis florojn kreski ŝtonaloke, malriĉajn homojn helpi reciproke, ĉevalon aĉan konkursgajni ŝoke.— Ankoraŭ do mi fidas.

Lord Casey, Patron of the Australian Esperanto Association.

Our president, Mr. Ralph Harry, received the following letter from the Right Hon. Lord Casey, C.H., D.S.O., M.C., M.A.:

Commonwealth Offices,
Treasury Place,
Melbourne, C.2.
16th March, 1961.

Dear Mr. Harry,

Many thanks for your letter of March 12, and for the Commemorative Book which has since reached me.

I notice what you tell me about the decision of the Tasmanian Schools' Board, which must be an encouragement to you and your colleagues.

You were good enough to ask me, on behalf of your Committee, to continue as Patron of the Australian Esperanto Association, which I would be very glad to do.

With best wishes to you,
I am,
Yours sincerely,
(Signed) CASEY.

LA "LASTA KONFESO."

Sur p. 102 de "Vivo de Zamenhof" (E. Privat) oni legas pri "lasta manuskribo" en kiu planis Zamenhof artikolon pri senmorteco de la animo. Inter alia li asertis, ke lia patro estis ateisto. Mistera afero! Sin prezentas almenaŭ tri demandoj: (1) Kiu vidis tiun gravan manuskripton, krom Privat? (2) Kie ĝi nun kuŝas? (3) Se estas vera, ke lia patro estis ateisto, kiel klarigi, ke li, Marko, povis plenumi en sinagogo gravan funkcion. Li estis voĉlegisto el la Sanktaj Skriboj ĉiusabate en Varsovio kaj verŝajne ankaŭ en Bjalistoko.

Pri la "bruligo de la manuskriptoj" (p. 28) restas ankaŭ dubo. En la nekrologo pri Marko Zamenhof ("Pola E-isto", Jan., 1908) ne estas mencio aŭ implicio pri tio. Male: "Markus Zamenhof konvinkis sian filon ne aperigi lian projekton ĝis ĝi estos sufiĉe elprovita praktike". Jen favora nuanco! Ankaŭ Adam Zakrzewski en sia "Historio de E." (1913) ne menciis bruligon, sed nur: "Zamenhof promesis al gepatroj, ke li forlasos tiun ideon almenaŭ ĝis fino de siaj universitataj studoj".

IT DOESN'T HAPPEN HERE

BELGIUM: Julius Koeune, blind E-ist, awarded Golden Palm of the Crown Order for his Esp. activities for the blind.

HOLLAND: Queen awarded Oranje Nassau Order to F. de Jong and P. Grachten, leaders of Railwaymen's Esperanto Movement.

Amsterdam University recognises Esperanto as full examination subject for Faculty of Literature. The first exam. session of the Chair for Esp-o is listed.

FRANCE: Order of National Merit to Miss A. Vidal, Messrs. R. Gendre and Lech Walter for their Esp-o activity.

HUNGARY: Orders awarded to two Esp-o poets, J. Baghy and K. Kalocsay, for their literary achievements.

AUSTRIA: The Austrian Teachers' Esp-o Assn. received subsidy from the Ministry of Education.

TURIN: Esperanto Chair inaugurated at University. State Telephones Bologna run Esp. classes for employes.

LVOV, UKRAINE: At Technical Uni. V. Novitsky defended his thesis on telecommunication in Esperanto and was awarded highest marks for technical lingual knowledge.

ZAMENHOF EN LITOVUJO.

"Franca E-isto" (Dec.-Jan., 1961) enhavas tradukon el verko d-ro A. Dambrauskas: "La Estingigintaj Lumiloj", en kiu la aŭtoro skizas la vivon de Zamenhof en la Litova urbeton Veisiejai (aŭ Vejseje, Plock). Temas pri la jaroj 1886-7, dum kiu tempo li frue loĝis tie, kaj poste vizitadis la urbeton, kie lia fratino loĝis. De ĝi li ofte iris al Kaunas, kie li fianĉigis al Klara Silbernik. Laŭ d-ro Olsvanger, Z. scipovis la Litovan lingvon. Lingvo kaj Vivo, p. 450. Vidu ankaŭ: Dokumentoj de E.: d-ro A. Mobsz, p. 79.

INTERNACIA FOIRO EN BRNO.

Septembro 10 ĝis 24. Esperantistoj ricevas specialan inviton en ĉia komuna lingvo de la Foira Oficejo, Vystaviste 1, Brno, C.S.

This world-famed Czech Fair uses Esperanto. Send for details to Esperanto Club, Rooseveltova 13, Brno.

KVAR PRELEGOJ PRI LA ESPERANTA LITERATURO.

Drago Kralj; Slovenia E-Ligo, Mik-
loŝičeva 7, Poŝfako 239, Ljubljana,
Jugoslavia. 189 p. 1½ Us. dol.

Valora kaj ĝisdata manlibro pri la stato de nia literaturo, jam de 1887 ĝis nun, precipe la poezia. La sagace-komenta teksto estas ilustrita per poemcetoj, partaj au tutaj. Kralj faris bonan servon, nompresre rememorante pri homoj, kiuj jam de longe malaperis en la ne-plu-konatecon.

Foje li impresas per nesufiĉe drasta kritiko; estas refreŝige, kiam nur-okaze li demetas pri-taksan molecon kaj rimarkas iom pli "vinagre". Povas esti, ke li devis tro sin apogi sur recenzoj de aliaj, ne povante mem legi la verkojn. Tamen entute lia kompilo estas sana kaj ekvilibrea aprezado de la situacio.

Pri liaj diroj koncerne al Grabowski, mi aldonus, ke en "Kondukanto-Antologio" (dua eld. 1904) mi studis lian el la pola de J. Slowacki "En Svisujo". Mi trovis ĝin malfacile komprenebla, precipe pro trotordita vortordo. Ekzemple:

Ĉielarkajn sin kie vestigas en zonojn la Jungfraŭ ĉe l'ora de l'suno deklino;

Mi vetus, ke tre malmultaj aŭdantoj komprenus tiun frazon. Nur per zorga analizo mi sukcesis trovi la sencon, kiu ŝajne estas:

Kie la Jungfraŭ sin vestigas (vestas!) en ĉielarkajn zonojn ĉe la ora deklino de la suno. Plue:

Ĉu prenos anĝeloj min loĝon ĉielan? Sence: Ĉu anĝeloj prenos min (en) ĉielan loĝejon?

"Sinjoro Tadeo" estas difektita pro tro multe da elipsoj, trokoncizeco, trokompakteco, dense kunpremitaj esprimformoj. Tio estas akre ĝena, precipe ĉe la aŭdado.

Pri Sharpe mi atentigus, ke lia "bonstila (pure Zamenhofa) lingvo, kiel uzita en "Travivaĵoj", neniel estas ĉiarilateimitinda. Lia stilo estas klareprima, sed li povis erari, uzante: plenerara (anst. erarplena); situacio (anstat. ofico); mezvintre (vintro-meze); misuzo de "eventuale".

Pri Bulthuis: Lia traduko de "Robinson Crusoe" estis nur porinfana mallongigo; lia trad. de "Don Kihoto" supozinde restas en manu-

skripto. Lia trad. de "Jane Eyre" estas fuŝa, multe deviiĝinta de la angla originalo, kaj la verko transvivis la "tradukon" nur dank'al sia esence atento-katena rakont-intereso. En gravaj detaloj, multaj paraĝrafoj neniel redonas la sencon de la aŭtorino, Charlotte Bronte; mi havas liajn leterojn al mi pri tiu afero.

Kenelm Robinson kaj K. R. C. Sturmer estis unu sola homo . . . lerta artifikio, kies celon mi ne scias.

Ie-ie Kralj falas en la nebulan esprimformon de tro multaj el liaj literaturaj pri-skribantoj. Precie en kio Sidlovskaja "nemalgrande influis" nian literaturon? Tiuj malmultondirantaj vortoj lasas nin "en la aero", t.e. "cerbumantaj pri la signifo". Ies "versoĵo ehas varmane" (?); "liaj Sapfaj Odoj estas... pagane kvietaj" (?).

La Patro de la Lepruloj: Originale Arni Decorte. 46 p.

De la Dubo al la Kredoj: A. de la Fante, trad. A. Decorte. 32 p. Po 2 r.k. ĉe Krijkelberg 1, Bierbeek, Belgium.

La unua temas pri viro, kiu memvole, Di-fidante, iris en sian tombon kaj riglis la pordon. Sur insulo Molokai, Damiano servis al lepruloj kaj dividis ilian sorton, fine mortante pro la terura malsano.

"Vivoj" de Damiano ne estas facile haveblaj, kaj tiu ĉi libreto estas aparte valora. Bone kompilita, ĝi enhavas en kompakta formo ĉiajn esencajn trajtojn de lia admirinda agado. Modeste, modere Decorte vortpentras bildon de tiu elstara oferemulo, kiu estas neforgesebla ornamo al nia komuna homeco.

Li mortis en 1889. Lia kadavro aspektis bele, kaj "ĉiuj postsignoj de la lepro kvazaŭ malaperis" Li volis entombiĝi sub pandanuso, kiu ŝirmis lin dum la unua nokto sur Molokai. Tamen en 1936 la Belga popolo petis lian postrestaĵon, kiu nun ripozas en Lovenjo, en maŭzoleo el marmoro.

La dua temas pri Patro Pio en Govani (Foĝa), sankta pastro, kiu portas la stigmojn de Kristo, kiu "scias ĉion", biu havas doton de "dulokeco", kiu parolante Itale, tamen kompreniĝas al homoj de aliaj lingvoj. La originala verko havis dek eldonojn, kaj la aŭtoro ricevis kvardek mil leterojn pri ĝi.

La Sankta Godelieve: broŝuro eldonita de St. Camillus, Bierbeek, Belgium. 2 r.k.

Rakonto pri nobla kaj nobela virino, kiu edziniĝis al kruela viro, kaj, laŭ lia ordono kaŝa, estis strangolita. Ĉe Gistel ankoraŭ post ok jarcentoj, oni procesie celebras sian bonfaran vivon. Tiaj homoj estas ja la salo de la tero. La tradukintoj, kun alta eklezia aprobo, sukcesis redoni la simplan ĉarmon de la malnova historieto.

Rimarkinde, ke la homamo de la sanktulino kvazaŭ influje trafiltrigis ĝis la rakontinto, en tio, ke la murdinto, ŝia edzo, ne venis al meritita punmorto en la finiĝa paĝo. Silente, senvorite la kronikinto "lasis lin al la Dia juĝo".

Bahaismo — La Religio de Paco: Lidja Zamenhof.

Eld Bahaa Esp. Komitato, Neckarge-muend ap. Heidelberg, Germany. Unu ŝil. ink. afranko. Eseo pri tiu religio, al kiu dediĉis sin la filino de d-ro Zamenhof. Si pereis en Pola koncentrejo en la Nazia teroro. Literaturo havebla el: Baha'i Publishing Trust, 27 Rutland Gate, London, S.W.7.

Esperanta Resumo de la Stenologio kaj Stenografio: D. Dalmau. Lauria 98, Barcelona, Spain. 2 resp. kuponoj.

Ĉiu, kiu sentas intereson pri sten-sistemo taŭga interalie ankaŭ por Esp-o, kontaktu tiun adreson.

"Lingvo kaj Vivo": Gaston Waringhien. Esperantologiaj Eseo. Eld. Stafeto: J. Regulo Perez, Kanariaj Insuloj. Broŝ. 3.40 dol. usonaj; tolbindita 4 dol. Plus afranko.

Ĉi tiu monumenta verko de 432 paĝoj ne estas difinita nur por instruitaj homoj, sed ankaŭ por ĉiu inteligenta studanto, kiu celas perfektigon en sia E-isteco kaj inspiron, por atingi la celon. Kreis la kompilon franco de granda erudicio en pluraj sci-kampoj, kaj elstara kompetenteco en ĉio concernanta E-on. Li admiringe povas prezenti la internacian lingvon antaŭ publika kunveno, kaj egale impresse kontesti — kontraŭ nekredantaj kolegoj — pri subtilaj demandoj sur pens-tereno fermita por simplaj homoj.

La feliĉa posedanto de tiu libro trovas en ĝi faktan instruadon kaj

pri-teorian eksplikon, praktikan konsilon por ĉiutaga lingvuzado, tekstan analizon de la klasika E-verkaro, defendon de E-o kontraŭ tielnomataj rival-projektoj, kaj ĝeneralan rigardon al la situacio kaj perspektivoj de E-o en nia rapide evolujanta mondsocio.

La aŭtoro ne bezonas flatojn de nematuraj emociuloj. Lia ora laboro lin absolute honoras. Lia propra plumo, perinte tiel multe da vera valido en la presitajn vortojn, jam faris lian eternan testamenton.

Inter alia, la mirinda verko pri-traktas: Detala studo pri la pra-Esperanto, 1878-1887. Etimologiaj problemoj. Fundamento de E-o. Vortkonstrua signifo. La originala strukturo de E-o. La frazo. La akuzativo, avantaĝoj kaj malavantaĝoj. Kial E-o havas ĝin. Detala ekzemplo de ĝiaj diversaj uzoj. Ĝia lingvistika valoro.

Landnomoj. Historio de la problemo, kaj sugestoj por ties solvo. La pasivo. Polemiko pro -ata, -ita. Modoj post "malhelpi" kaj similaj formoj. Modo post "kvazaŭ".

-end. Nefavora al ĝia oficialigo. Dum (kiam), ĝis (kiam); des pli; post ol, post kiam; fojo, lasi.

Esperantaj literoj. Neologismoj. Editoraj demandoj. Letero al Borovko. Priteksta kritiko de "Hamleto". Same pri La Originala Verkaro, de Dietterle. Enketo pri tekstfido. La Biblio (M.T. kaj N.T.); la teksto sub la lupeo.

Lingvaj obstakloj al internacia komprenigado; sociaj, strukturaj kaj vortsencaj problemoj.

E-o kaj ĝiaj konkurantoj, i.a. kritikoj pri Occidental kaj Interlingua (D-ro Gode). Fundescia analizo.

Historia skizo de la E-movado, organiza kaj literatura.

Jen unika edukilo por ĉiu, kiu deziras kompreni la E-an komplekson, kaj lia armilo, por defendi la lingvon kontraŭ ĉia ĉikano.—F. R. Banham.

"SENDU EKZEMPLERON."

Ni ofte ricevas petojn pri sendo de "specimenaj numeroj" de nia gazeto. Sciu, ke ĉiu tia sendo kostas al ni ne malpli ol 18p. pro la alta kosto presa kaj afranka. Estonte ni ne sendos al petintoj, kiuj ne enmetas ankaŭ unu respond-kuponon por pagi nur la afrankon. Ĉiu ekzemplero kostas al ni proks. unu ŝilingon.

POR VIN DISTRI.

Iluzio, kiu min feliĉigas, pli valoras veron, kiu deprimas mian spiriton. Ni vivas per niaj iluzioj.

"Argentina E-isto" plendas pro "escepta maniero" uzi "moŝto". Oni uzas "dukino", "grafino" k.c. sed ŝajne mankas "moŝtino". Ĝi plendas por "ŝia duka moŝtino" anstataŭ "ŝia dukina moŝto" k.t.p. Cetere Waringhien (F-E vortaro) donas "moŝtuloj", de kiu oni povas formi "moŝtulinon".

"... is it physical to walk unbraced and suck up the humors of the dank morning?" "Ĉu sanige estas duonvestite iri, kaj miasmojn de malseketa frumaten' enspiri?" (Trad. de Lambert: Julio Cezaro, II, I, 261.)

Ekzistas pli da verkoj pri "Hamleto" ol pri kiu ajn alia temo, kun escepto de: Jesuo, Napoleono kaj Sekspiro mem.—"Time", 4.7.60.

Ho ve! Laŭ ĉio iam ajn de mi aŭdata, en historio, aŭ rakonte, ĉu legata, la vojo de la am' neniam restas glata.

EL "JULIO CEZARO".

Timulo multfoje mortas antaŭ fina morto;

nur unu fojon mortas hom' kuraĝa. El la aferoj por ni plej mirindaj, plej stranga ŝajnis: timo pri la morto, ĉar, pro neces' natura, venas ĝi al ĉiu hom' en siatempa horo.—Akto 2.

LEGADO.

Ĉiu homo devas trovi la librojn gustajn por si mem. Ne ĉagreniĝu, se vin ne plaĉas la verkoj aprobitaj de la longtempeco, la klasikaj verkoj, la "rekomenditaj". Elektu por vi sola, fidu al via literatura instinkto. Kio estas por vi natura, kio vin nutras kaj apetitigas, jen tio estas ĝusta por vi.

La menso kreskas, ŝanĝiĝas; sekve verkoj, kiujn vi hodiaŭ preferas, povos perdi intereson post tempopaso. Ĉesigo de intereso pri plurfoje legita libro signifas, ke la verko jam finis sian efikon sur vin; ĝi levis vin al sia nivelo kaj jam instruis al vi ĉion, kion ĝi povis.

CORRESPONDENCE SERVICE FOR NON-ESPERANTISTS.

Internacia Korespondservo has centres in 14 countries, which translate into Esperanto letters in any language and forward them to the lands concerned, where its agents retranslate them into the language of the addressee. Agents wanted. Contact: IKS, Poŝtkesto 39, Crailsheim, Germany.

En ĉiu numero de nia gazeto, Tenata kun amo sub via nazeto, Vi trovas enhavon preskaŭe naŭfutan, Kaj—ĉu supozinde?—vi sorbas ĝin tutan.

DR. FRED WILLIAMS

Nia kara veterano, vic-prezidanto de la A.E.A., subite mortis en la 15a de Junio. Aperos artikolo pri lia vivo kaj laboro.

Kiel amare ni ĉiuj sentas lian foriron!

Al lia familio ni sincere kondolencas.

13th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

1 to 7 Jan., 1962.

Congress Fee: before 1 Aug., 1961: for A.E.A. members 25/-, for others 30/-; after 1 Aug., 1961: for A.E.A. members 30/-, for others 35/-.

Make hotel reservations as early as possible (£2 deposit). Send your reservations and Congress fees to the Congress Secretary, Miss Penny Ferguson, Box 54, King Street Post Office, Sydney. Watch for further details.

NAŬ FUTOJ!

En n-ro 17, p. 89, ni eraris. Nia gazeto enhavas ne nur kvin futojn da legajo sed proks. naŭ—nome 108 colojn. Ŝajne neniu leganto tion rimarkis. La Hispana "Boletin" (Marto 1952) atentigis, ke tioman kvanton multaj pli impone aspektaj gazetoj ne havas.

ASTRONOMIO

Ni ricevis de D-ro K. Kordylewski, Kopernika ul. 27, Cracow, Poland: Eclipsing Binaries Circular kun Esp-a resumo kaj mapo de la suda ĉielo. Li petas adresojn de interesatoj.

PREMIO COMELLA-BASSOLS, Instituto de Esperanto, Montcada 12, Barcelona 3.—2,000 pesetoj por la plej bona gaja rakonto en E-o.

Po 2,000-3,000 vortoj. Maŝinskrib-itaj. Sendu 4 ekzemplerojn. Sur ĉiu konkursaĵo estu pseŭdonimo por kaŝi identon. En aparta koverto—nomon kaj adreson kun la pseŭdonimo. Kotozito, por unu aŭ pluraj rakontoj—3 resp. kuponoj. Limdato (sendu flugletere): 31 Aŭgusto 1961.

THE AUSTRALIAN ENCYCLOPEDIA (1958), vol. 3, p. 402-3. Excellent article on Esperanto, dealing chiefly with activity in Australia. Concise and correct.

Iru al monduma vesperfesto kaj aŭskultu al bontonulino, kiu tuŝas la koron, rakontante pri dumbombada kuraĝo de sia dompurigistino. Poste, sugestu reformon, kiu portus efektivan bonon al tiu servistino, kaj rimarku ŝian reagon. Flugos for ĉiom ŝia dolĉa homamemo; ŝi ŝaŭmbuŝe hurlaĉos simile al dogo kontraŭ domrabisto.

—Herbert Hodge: 'A Cockney on Main Street.'

MONO POR MILITO.

Churchill priskribis kiel, ek de la armistico, la milittempa mon-elverŝado subite ŝanĝiĝis en mon-mankon. Provizi monon por konstrui duonmilionon da domoj estas por la registaro same praktike-fareble, kiel provizi ĝin por centmil aeroplanoj, aŭ du milionoj da tunoj da busoj. Tamen, post la 11a de novembro, 1918, nova ekonomia situacio tuj ekestis. La elspezo de la nacia financo, kiun la registaro neniam konsideris faktoro kapabla limigi la provizon de armiloj, fariĝis ĝia ĉefa konsiderindaĵo jam de la horo en kiu la batalado ĉesis.

VOWELS, HOW MANY?

Privat wrote (La Suda Kruco, Sept., 1928): "Esperanto, like Italian, has only five vowels. French and English have five or six times as many, and this, of course, opens up five or six times as many paths of error."

Dorothy Sayers, in her translation of The Divine Comedy (p. 57) goes further: "English is . . . remarkably rich in vowel sounds. Of these Italian possesses seven only. . . For English, the Shorter Oxford English Dictionary list no fewer than 52 native varieties, shading into one another by imperceptible degrees."

Well may Prof. Meillet say (p. 297, Les Langues dans l'Europe Nouvelle): "There exists no language which the adult foreigner finds more difficult to pronounce than English. Difficulty of pronunciation is the strongest barrier against English becoming a world tongue."

KIEL TRADUKI?

Book-ends: librostariĝiloj; **brainstorming:** ideoserĉado; **braintrust:** cerbumkomitato; **businesslike:** negocmaniera, seriozmaniera.

Cartoon: ŝercbildo; **covered wagon:** pionirĉaro, pionir-stepĉaro; **cutrate store:** rabatmagazeno; **cut-throat:** murdbandito, fikonkuranto; **doughnut:** ringkuketo; **drive-in restaurant:** aŭtomobilist-restoracio (1); **hobby:** ŝatokupo; **hit and run:** kolizifuganto; **licence plate:** licenĉplato.

Motel: aŭtomobilista hotelo (2); **parking meter:** temp-komputilo; **poker faced:** senesprim-vizaĝa; **snorkel:** spirilo, spirtubo; **station wagon (3):** famila-aŭtobuso; **streamlined:** flulinia; **striptease:** vestdemeta danco; **teen-ager:** dek-kelk-jarulo.—"N. American E. Review."

- (1) drive-in theatre: aŭtokino.
- (2) aŭtohotelo, taghotelo.
- (3) Aŭstralie: caravan.

Always indicate approx. pronunciation of proper names in Esperanto texts, e.g., Carlyle (karlaji), Heine (hajne), Herriot (erjo). Foreign readers are complaining re lack of this.

Support the A.E.A. and its organ, without which it cannot function. Your 15/- a year, regularly paid, helps both you and the movement. K. Linton, 11 Poplar St., S. Caulfield, S.E.8, Victoria.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15\$ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5\$.



Editor: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Av., Heidelberg, N.22, Victoria.
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

No. 23 (103)

MELBURNO

Julio - Aŭg., 1961

ESPERANTO OR ZAMENHOF STREETS

134 in 18 countries: 36 in France, 16 in Poland, 13 in W. Germany and Italy, 11 in Bulgaria, 7 each in Hungary, Spain and Holland, 5 in Austria and Brazil, 4 in Czechoslovakia, 2 in Argentina, Belgium, Israel and Lithuania, 1 in England (Bournemouth), Jugoslavia and Sweden.

FIFTY YEARS OF ESPERANTO IN AUSTRALIA AND BRIEF REVIEW OF PRESENT SITUATION

The first Australian Esperanto Congress and the inaugural meetings for the first Australian Esperanto Association were held in Adelaide from 26th-28th October, 1911. The Jubilee Thirteenth will take place in Sydney next January.

What progress, it may be asked, has Esperanto made in Australia in these fifty years? The critics may go further and say, "If Esperanto is a masterpiece of logic and simplicity, why is it still not accepted by the Governments and peoples of all countries?"

In the first place Esperanto has made a tremendous advance in Australia since the pioneer enthusiasts gathered at the University of Adelaide. At that meeting there were not more than 50 Esperantists present, and of these there is no indication from the Conference report (published in English) that more than a handful could use the language. There was a large club in Melbourne, larger numerically than the present Melbourne Club. There were groups also in New South Wales and Western Australia.

GRAVA ATENTIGO!

Al ĉiuj redakcioj: Bonvolu nepre registri la novan adreson de la Redaktoro; jam de Oktobro 1.

F. R. Banham, 31 St. Andrew's Avenue, Heidelberg, N.22, Victoria, Australia.

Today the Esperanto Association links active societies in all States and the Australian Capital Territory. Individual membership of the Association is still only 200, but over 500 are enrolled in classes for 1961, including 250 at the Friends' School in Hobart. Regular biennial Congresses are now held, attended by over 100 Esperantists who conduct business sessions, and enjoy social activities, using Esperanto exclusively.

"Esperanto-Centre" in Melbourne and "Esperanto House" in Sydney stand as reminders of organisational progress. A book service, with branch offices in each State, makes immediately available a wide range of Esperanto books (some written or translated by Australians) and literature. There is a library of tape recordings of spoken Esperanto, a selection of gramophone records, and a number of individual and collective libraries, including 150 works in The National Library in Canberra. There are films, including two Australian Government films, with Esperanto commentaries. The Australian As-

sociation produces this bi-monthly journal, and conducts examinations at three levels, the highest equivalent to University standard.

The increase in numbers and improved organisation in Australia are more than matched by dozens of national Esperanto Associations. These in turn are co-ordinated by the Universal Esperanto Association, UNESCO and recently nominated in consultative relations with UNESCO and recently nominated by a large group of statesmen for a Nobel Peace Prize. Universal Congresses meet annually with 2000 or more participants. Scores of thousands of skilled Esperantists constantly use the international language for literature, correspondence and travel.

The fact remains that Governments have been slow to give official approval and, except where forward-looking authorities like the Tasmanian Schools Board have accepted Esperanto, it is taught mainly as an extra-curricular subject.

Professor Edmond Privat in a talk recorded for the Melbourne Esperanto Club has suggested that, however disappointing for the enthusiasts, it is a blessing that Esperanto has developed steadily and thoroughly, rather than as a "mass" movement. This has meant that the dedicated pioneers have been able to produce systematically the grammars, dictionaries and technical vocabularies required for mass dissemination. They have been able to build up a translated and original literature of several thousand volumes covering almost every field of human endeavour and experience. Moreover they have established a truly international style, accent and usage, which is standard in Tokyo, Rio de Janeiro or Zagreb, as well as in London, Paris and Rotterdam.

As the Australian Esperanto Association approaches its Thirteenth Congress at the beginning of its second fifty years it can look back with satisfaction at the sound foundations which have been laid and forward with confidence in its ability to expand and eventually to train enough teachers to make Esperanto a second language for all.

—R. L. Harry (Canberra).

Australia Kroniko

● **BRISBANE:** En Aprilo S-ro Guenster, prezidanto, faris 2 vojaĝojn al la Ora-Marbordo kaj alparolis kelkajn personojn pri Esperanto. Li ankaŭ organizis kurson tie, kaj intencas intense instrui personojn kiuj farigis gvidantoj en tiu loko.

En Majo eks-sekretario S-ino V. Fraser forvojaĝis al Anglujo, kie ŝi partoprenos la Univ. Kongreson kaj ankaŭ vizitos gefilojn tie. Poste, ŝi intencas vojaĝi tra Eŭropo. Plia ano, F-ino A. Scaroni, ekvojaĝis Londonon, kie ŝi intencas resti dum eble pli ol 2 jaroj, samtempe laborante en iu oficejo.

En Junio la nombro da lernantoj estis 24 kaj ilin instruas S-ino Beck, F-ino Sandford kaj S-roj Guenster kaj Grant. La tutaj vesperhoroj estas nun dediĉitaj al instruado. Al Ges-roj G. A. Grant naskiĝis filino kaj ili ĉiuflanke ricevis gratulojn pro tio.

La novaĵo pri la morto de D-ro Williams estis anoncita kaj la ĉeestantaro ĉiuj staris silente dum unu minuto honore al la forpasinto. Tia granda ŝoko skuis ĉiujn, kaj ili konsentis ke ni suferis grandegan perdon.

—S.L.P.

● **PERTH:** Amata amikino, S-ino Pollard, denove estas paciento en la "Royal Perth Hospital". Ni ĉiuj deziras al ŝi baldaŭnan resaniĝon.

Post longa vojaĝo tra diversaj landoj Ges-roj Fidock revenis hejmen. Nia fidela membro Jack Hawks forlasos komence de Septembro Aŭstralion por alia mondvojaĝo.

S-rino (15/6) Pollard gvidis diskutvesperon "Kiel komparigas la nova metodo de veturado kun la malnova." La temo donis al ĉeestantoj multon por diskuti. La Lud-Vespero estrata de S-inoj Ames kaj Malcolm estis tre ĝojplena. La Vortludoj estis incitetaj por la cerboj, kaj Esperanta Menuo donis al ni "Mangajon por pensado".

● **CANBERRA:** Spite de la vintra vetero la klubo kunvenis ĉiumerkrede en la salono de la Bonnajbara Konsilantaro. Tri grupoj daŭrigas sian studadon: elementa sub S-ino Torr, mezgrada sub D-ro Robbins kaj progresinta, kiu kune legis kaj diskutis "La Eta Princo", unue en la traduko de S-ro Harry, kaj poste en la nova traduko de Paul Délaire.

Elstaraj kunvenoj estis: Prelego de S-ro Gamble pri la Subakvigistoj de Kanbero (kun koloraj diapozitivaj). Interesa prelego de D-ro Robbins pri "Jamaiko", kun belaj diapozitivaj pri tiu ĉarma insulo. Prelego de S-ro Harry pri la franca aŭtoro Antoine de St. Exupéry, kies libron li tradukis en Esperanton. Vizito de Franc Franjic el Sidnejo (3/5) novenmigrinto, kiu prelegis pri siaj spertoj en Eŭropo. Prelego de S-ro R. H. C. Loof, sekretario de la aŭstralia Senato (31/5) pri vizito al Japanujo, kie li partoprenis la 49-an Konferencon de la Interparlamentara Unuiĝo. S-rino Jean Harvey, kiu komencis lerni Esperanton antaŭ nur 8 monatoj, legis rakonton tradukitan de si mem (7/6).

S-ro R. H. C. Loof, sekretario de la aŭstralia Senato, kaj S-ro Frank Chamberlain, estro de la Kanbera oficejo de gazeto SUN — Melbourne, farigis Patronoj de nia klubo. (Vidu apartan artikolon "Vespero en Esperantujo".)

● **SYDNEY:** En internacia vespero (13/3) kelkaj anoj parolis iomete pri siaj hejmlandoj, kaj la pli spertaj aŭ kuraĝaj kantis kaj dancis. Ĉeestis ĵurnalisto, Elizabeth Riddell. Prelegis—F. Francjic, fantazie pri Blanka Makulo sur la Luno, kaj serioze pri la Ekonomia Stato de Jugoslavio (6/3); M. Sudec, pri sia infaneco en Zagreb (20/3); kaj E. Amman pri La Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj (10/4). Ses anoj debatis la temon, Prefereinde estas, esti 20-jara ol 50-jara (17/4), kiam la kontraŭuloj decide venkis. Kant-vespero okazis (27/3); oni ludis tombolon (24/4); kaj dum kelkaj dimanĉoj la fervoruloj laboris por plibonigi la Esperantan domon.

Interese estis la vizito de la Manly klubanoj (15/5), kiuj faris ĝuindan muzikvesperon. La aferkunveno (1/5) diskutis nur banalajn. Prelegis—J. Matasin, pri sia vizito al Maroko (8/5); S-ro Gunkel, vizitante el Germanujo, pri Japanujo (22/5) kaj Israelo (12/6); la Ges-roj Hanks, vizitante el Melburno, pri aŭstraliaj temoj (29/5) (1/6) (5/6); F. Dunn, pri Sarawak (19/6); kaj S-ro Keep, angle, pri sia vizito al Sudameriko (26/6). Oportunvendado enspezis £35 (20/5).—F. M. Dunn.

● **MELBOURNE:** La ĉi-jara Amerika Teo okazis je 14/6. La ĉambro estis plenplena de homoj, kiuj alportis grandan kvanton da donacoj, kiuj estis aŭ venditaj aŭ lotumitaj. La rezulto estis elstara rekordo: £29, kiun la klubo uzas por aĉeti akciojn por la Ko-operativa Domo.

Dum 2 vesperoj (7/6 kaj 21/6) sonbendoj el la AEA "sonbiblioteko" estis prezentitaj. S-ro Ken Linton diskutis E-tradukon de poemo de Lordo Byron (5/7); S-ro F. R. Banham (12/7) legis tradukitajn rakontojn kaj S-ro E. McKenzie (19/7) parolis pri "Ĉu niaj kontinentoj estas nur fluantaj landamasoj?". Pri "Heron-Insulo kaj Snowy-Montaro" montris belajn diapozitivajn S-ro F. Taylor (26/7).

Sabate (22/6) okazis posttagmeze en la Esperanto-Centro solena Memor-Servo por nia mortinta membro D-ro Fred Williams. Post pianludado de Kim Bastin, S-ro E. McKenzie bonvenigis la ĉeestantojn, inter kiuj ankaŭ estis S-rino Williams, al la Solenajo. S-ro Koppel laŭlegis profundsentajn leterojn de la A.E.A. Prezidanto, S-ro Ralph Harry kaj de F-ino Edna Dash, nome de la Sydney E-Societo. S-roj Drummond, Cohea, Banham kaj Fridenbergs skizis la multajn interesojn kaj agadojn de nia kara mortinto. Per "La Espero" finiĝis digna solenajo al la memoro de D-ro Fred Williams, kies morto estis granda perdo por la tutaŭstralia movado.

En la junia kunveno de la RENDEVUO S-ro Linton parolis pri "Koloroj". Per diagramo li montris ĉiujn kolorojn de la spektro kaj klarigis la rilatojn de unu koloro al alia kaj kiel diversaj miksaĵoj rezultigas aliajn kolorojn.

Depost kelkaj jaroj (pro akcidento) nia amiko S-ro J. Gottlieb kuŝas en hospitalo, sed por la julia kunveno D-ro Fridenbergs venigis lin per aŭtomobilo al la E-Centro. S-ro Gottlieb parolis pri diversaj ĉapitroj de La Biblio.

● **WARRAGUL:** Pro spacomanko ni nur hodiaŭ povas raporti pri eksterordinare bona radiointervjuo, kiun donis en Marto nia agema membro S-ro I. Maddern en la radiostacio 3UL (Warragul). Dum 20-minuta intervjuo S-ro Maddern, kiu nun estas direktoro de altlernejo en Morwell,

prezentis kompletan bildon pri la simpleco, internacieco kaj utileco de nia lingvo.

● **ADELAIDE:** Unue ni devas anonci, kun bedaŭro, la morton de la Adelajda Esperantisto S-ro Harold Fidge, la 30an de aprilo. F-no Win Addis, de la Adelajda Esperanto-Klubo, sendis florkronon al la privata funebro. S-ro Fidge eklernis Esperanton antaŭ proksimume 6 jaroj, kaj dum la jaroj li iĝis tre kompetenta. Li korespondis kun pluraj alianduloj, kaj helpis, laŭ sia maniero, disvastigi Esperanton. Kondolencoj al lia familio.

Ni eksciis ankaŭ, kun bedaŭro, pri la morto de la vicprezidanto de la A.E.A., D-ro Fred Williams, kaj sentas simpatie kun siaj familio kaj amikoj.

Antaŭ kelkaj semajnoj, S-ro Len Newell faris paroladon al lunĉo de la Rotary Club pri la lingvo, kaj (20/9) li estos intervjuata en televida programo. Ni esperas, ke tiuj okazoj interesos kelkajn pri Esperanto.

S-ro Newell, nia instruisto, ĵus ricevis la novaĵon, ke li sukcesis en lia provo de la klereca ekzameno de la A.E.A. Ni ĉiuj kore gratulas al li!

Niaj klasoj ankoraŭ progresas bone, kaj ni ankoraŭ rikoltetas novajn membrojn por la klubo.

Ni ricevis poŝtkarton de S-ro Addy Newell, kiu nun ferias en Padola, Italujo. Si tre ĝuas la sunon kaj la montojn, kaj sendas siajn bondezirojn.
—Rex Hanney.

● **PERTH:** Kun granda plezuro ni gastigis du vizitantojn en Julio. Unue venis s-ro P. Holmes de Seymour. Li anoncis sian alvenon telefone al s-ino McGrath kaj ŝi klarigis por li kiel trovi nian ligĉambrojn. Bedaŭrinde en tiu vespero nia prez-o, s-ro Dean, difinis al ni taskon, ordigi la enhavon de kelkaj ŝrankoj en la ligĉambro; Pro tio, amasoj da libroj, folioj, dokumentoj kaj rubaĵo kovris la tablojn, seĝojn kaj parton de la planko, kiam nia vizitanto surprize enpaŝis. Feliĉe li akceptis la situacion bonhumore, kaj ni kune trinkis teon kaj manĝis biskvitojn.

La alia vizitanto estis s-ino Bennett el Sidnejo, kiun enkondukis d-ro kaj s-ino Einihovici. Ŝi parolis al ni pri la Universala Kongreso en Bruselo kaj ankaŭ pri la progreso de E-o en Sidnejo.

Dum kelkaj monatoj la Ligo sentis la foreston de la sam-oj kiuj vojaĝis eksterlande. Ankoraŭ ni atendas la revenon de f-ino Longson. S-ro Illingworth, kiu vizitis Japanujon, jam revenis, sed tuj iris al parencoj en la kamparo. Ankoraŭ ni atendas lin bonvenigi. Kelkaj aliaj sam-oj anoncis, ke ili baldaŭ iros eksterlanden. Ge-sroj Strassberg vizitos Japanujon; f-ino Leach—Eŭropon; f-ino Gamon—Japanujon. Lerta juna studento s-ro Peter Hill vizitos Europon kun la familio, kaj s-ro Timmerman reiros al la patrujo, Nederlando.

Do, frontas nin periodo malfacila, tamen ni ankoraŭ laboras. D-ro Caldera estras studrandon kaj s-ino Pollard, spite de malsano, gvidas junajn studentojn.—J. Hawks.

“VESPERO EN ESPERANTUJO”

La Kanbera E-Klubo aranĝis (12/4) en la domo de sia Prezidanto (S-ro R. Harry) specialan propagandvesperon, kiu estis tiel unika, ke sendube ĉiuj kluboj tra la aŭstralia kontinento ŝatus aŭdi pri ĝi. La sukceso montras, ke oni povas eĉ en malgranda urbo interesigi homojn pri nia lingvo, kondiĉe ke tiespeca vespero estas zorge antaŭe preparita. Konsilinde estas, ke ankaŭ la aliaj kluboj organizu similan vesperon, prefere en Januaro antaŭ la komenco de novaj kursoj.

La domo de S-ro Harry estis, por ĉi tiu vespero, transformita en “Esperantolandon”, kompreneble kun permeso de sia “pli bona duono”. Tri-dek kvin personoj kunvenis kaj vizitis en 4 grupoj la diversajn ekspoziciojn.

Unue, S-ro Harry bonvenigis ĉiun grupon kaj klarigis la bazajn faktojn pri nia lingvo. Ĉiuj vizitantoj subskribis siajn nomojn en la “Oran Libron” de la Canberra E-Klubo, kiun donacis S-ro H. Koppel dum la 1956-a kongreso. Nomkarto kun verda stelo estis pingle fiksita sur ĉiu vizitanto. Tiam, la grupoj laŭvice observis klason instruatan de S-ro Jim Davidson per grandaj bildoj de S-ro Adamson.

Poste akceptis ilin en la biblioteko S-ino Torr, kiu prelegis pri nia literaturo kaj montris pli ol 100 librojn kaj 50 diversajn gazetojn.

De tie ĉiu grupo iris al alia ĉambro, k'e S-ro Harry prezentis ekspozicion de korespondado, de flugfolioj kaj de informado registara kaj internacia.

Post tiu "vojaĝo" la virina komitato donis luksan vespermanĝon dum ĉiuj aŭskultis al Esperanto-diskoj. Belegan kukon kun verda stelo donacis Ges-roj Davidson. Fine, la magiisto de la klubo (D-ro Ross Robbins) prezentis tiklajn misterojn kaj elmontris kiel facile oni rememoras Esperantajn vortojn.

LANTI PRI SENNACIISMO

15 p. prezo 1.30 Fr. f. Eld. S.A.T.

"Vortoj de Lanti" (1931 j., 192 p.) estas elĉerpita. Jen kelkaj paĝoj el ĝi, kiuj avidigos simpatiajn legantojn al baldaŭa represo de la kompleta kompilaĵo. Kun la preskaŭ elĉerpiginta "Leteroj de Lanti" (1940j, 280 p.) S.A.T. planas reeldoni "Vortoj" en unu volumo—minus kelkaj ĉapitroj jam ne aktualaj.

Mirigas nin, ke sennacieca asocio ne uzas monindikon sennaciecan—nome la "stel"-sistemon (U.E.A.-jarl. 1958). Enigmaj por multaj interesatoj estas dolaroj kaj frankoj diverslandaj.

RECENZOTAJ.

Malsupra Silezio, ul. Dubois 3, Wrocław, Poland.

Faktoj pri Germanujo, Informoficejo, Federacia Registaro, Bonn, Welckerstrasse 11.

Tragedio en la Universo, Ilica III, 16, Zagreb, Jugoslavia.

Bulgara Prozo, Eldonejo de Fremdlingva Literaturo, str. Levski 1, Sofia.

JUAN REGULO PEREZ

sendis prezliston de 20 verkoj (Stafeto) ankoraŭ mendeblaj.

Li konsilas, ke oni menu rekte ĉe li, pagante per ĉeko al lia konto ĉe B.E.A., U.E.A. aŭ al li mem en La Laguna. Kontakto niajn agentojn. Kvar volumoj estas sub presoj: inter ili "Pri -ata/ita"; "La Proverbaro" Esp-a de Zamenhof; laŭalfabete ordigita kaj detale indeksita.

"ARBOJRANDO"

S-ro E. Ockey en "British E-ist", Apr. 1961, nomas lingvaj eksperimentoj formojn uzitajn de John Francis—arbojrando, a r b o j m a r o. Zamenhof uzis ĉe "La Rabistoj", p. 16, "librojrimeno" (rimeno per kiu oni portas librojn). Grabowski ofte uzis similajn en "Sinjoro Tadeo", kaj ne ĉiufoje kun klara senco.

SYDNEY INVITES YOU

to the

13th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

1 to 7 Jan., 1962.

Congress Fee for A.E.A. members 30/-, for others 35/-.

Make hotel reservations as early as possible (£2 deposit). Send your reservations and Congress fees to the Congress Secretary, Miss Penny Ferguson, Box 54, King Street Post Office, Sydney. Watch for further details.

First List of Congress Members:

1. Mr. Herbert Koppel (Melbourne)
2. Mrs. Fay Koppel (Melbourne)
3. Miss Penny Ferguson (Sydney)
4. Mr. F. Muller-Sorau (Sydney)
5. Mr. Volo Guelting (Sydney)
6. Mr. Milan Sudec (Sydney)
7. Miss J. Feldmayr (Sydney)
8. Miss J. Feldmayr (Sydney)
9. Mrs. M. Parker (Sydney)
10. Mr. A. Feldmayr (Sydney)
11. Mrs. A. Feldmayr (Sydney)
12. Miss Frieda Smith (Sydney)
13. Mr. Ken Linton (Melbourne)
14. Mr. J. Matasin (Sydney)
15. Mrs. J. Matasin (Sydney)
16. Mr. F. Dunn (Sydney)
17. Miss R. v. Ryswyk (Sydney)
18. Mrs. M. Bedwell (Sydney)
19. Mr. F. V. Taylor (Melbourne)
20. Mrs. F. V. Taylor (Melbourne)
21. Miss A. Godfrey (Melbourne)
22. Dr. A. Fridenbergs (Melbourne)
23. Mr. H. M. Cohen (Melbourne)
24. Dr. Fred Williams (Melbourne)
25. Mrs. C. Callaghan (Melbourne)
26. Mr. S. Drake (Sydney)
27. Miss K. Morrison (Sydney)
28. Mrs. D. Sweeny (Sydney)
29. Mrs. D. Grace (Sydney)
30. Mr. B. Amies (Sydney)
31. Mrs. I. Fink (Mt. Waverley, Vic.)
32. Miss C. Macey (Sydney)
33. Mr. V. Bourlin (Sydney)
34. Miss D. F. Smith (Sydney)
35. Mr. L. C. Willis (Sydney)
36. Mrs. N. A. Willis (Sydney)
37. Miss S. Willraih (Sydney)
38. Mrs. Y. M. Canty (Auckland, N.Z.)

The Rt. Hon. The Lord Mayor of Sydney, Alderman H. F. Jensen, will receive Interstate visitors at a Civic Reception at the Town Hall, Sydney, on Tuesday, January 2, at 3 p.m.

FRED WILLIAMS.

Li naskiĝis 1893 en Moonee Ponds, Viktorio, kaj mortis la 15an de Julio, 1961. E-isto jam de 1913-14, Kvakero, li penade servis kiel kuracisto en Ĉinujo, Nov-Hebriidoj, Fiĝio kaj Papuo. Poste li specialiĝis en okulkuraco. Ĝis la tago antaŭ sia morto nia veterano fidele faris por Esperantistoj sian plezurajn devon.

Homo de universala simpatio, li estis ano de kelkaj organizoj inter ili pense kaj mense neakordaj—jam de S.A.T. ĝis pure Kristana konsisto. Por li gravegis ĉiam pli vasta uzado de E-o, pli granda diskonigado de la personeco kaj idealismo de Zamenhof.

En ĉiu tempo, iufoje en tempoj malfacilaj, li senhezite elverŝis el sia havo kaj energio en tiun taskon tiel amatan de li—ĉiam bonhumore, ĉiam amikeme. Lia korespondado, fruktaj de amanta koro, englobis la tutan teron.

Li estis modesta kuracisto, kiu laŭ sia plejbla povo honeste faris la devon en sia vicmedio. Li estis bona homo, sed laŭ la mezuro de la sensaci-ama mondo li ne estis granda socia figuro. Tamen ni, liaj amikoj, vidis en li veran grandecon; kaj povas esti, ke en la okuloj de la Eterna Saĝo Fred, kiu bone kapablis regi la propran spiriton kaj triumfi ĝin kontraŭ multa malfacilo, estis pli granda ol homoj, kiuj regas naciojn kaj priordonas la sorton de popoloj.

Plaĉas la bela revo, ke li jam sin trovas inter siaj sampensanoj, animoj de simile nobla strebemo, simile altaj vivmotivoj. Ke kun ili li parolas komunan lingvon, la lingvon de la pura homo, de senmorta aspiremo.

Ĉu ne dolora la koncepto, ke lia personeco ne plu ekzistas—ke lia laboro nur restas en la pasema memoro de efemeraj homoj? Por multaj, malfacile estas kredi, ke la Granda Inteligento, kiu vokis lin en la vivon kaj evoluigis lin ĝis tiomege da amindeco, jam lasis lin neniigi el la Realo.

Tennyson sopiris:

Fariĝi polvo Vi ne lasos nin:

Vi faris homon: Kial? Li ne scias ĝuste.

Ni pensas, tamen, ne por formortigi—

Cas VI nin faris, saĝe, ame, juste.

Tamen, ne grave, ĉu ni rigardas lin dormanta eternan dormon, ĉu, male, ankoraŭ portanta lumon, sanon,

helpon al fratoj en transtomba sfero—ni ĉiam memoras lin kiel fidelan amikon al nia sankta afero, kaj ankaŭ al ĉiu, kiu konis lin sur la tero.

Funebri lian morton—ho doloro!

Lin koni dum la vivo—jen honoro.

EL LA VORTARO DE S. GRENKAMP (1937).

Pike, amike, sed ne pontifike, Kritikas ni liajn indikojn.

Dubindas la ĝusto de ties logiko;

Ridindus ĝi ja en komuna praktiko.

Bezonas ĝi flikon por taŭga apliko

—jen sentesprimet' de pedanta pediko:

(Nia komento en krampoj)

Abomeno: malinklina sento. (Ekz: mi abomenas for-meti bonan cigaron:)

Adreso: surskribaĵo enhavanta la nomon kaj ĝiajn precizan loĝlokon. (Kio estas la loĝloko de nomo?)

Borderi: kunfaldi kaj kunkudri randon de vesto. (Sed sub "bulvardo"—larĝa strato borderita per arboj!)

Buŝo: kavaĵo de la homa kaj besta vizaĝo, tra kiu ili sin nutras. (Al kio rilatas la vorto "ili"? Ĉu vere la vizaĝoj, ankaŭ la kavaĵo (!) sin nutras?)

Ĉasta: libera de seksaj deziroj. (Drasta difino por geedzoj!)

Ekvatoro: imaga linio pasanta tra la centro de la tero. (Ĉu por trairi ĝin oni bezonas enrampi sub la teron?)

Feminismo: movado celanta havigi al virino (legu: la virinoj) egalecon kun viro (legu: la viroj) laŭ ĉiuj vidpunktoj. (Anatomie monstra.)

Salti (fig.): kreski rapide. (Ĉu do la fungoj saltas?)

Ŝmaci (fig.): fumi pipon.. (Ĉu ne bone, afiŝi en vestiblo: malpermesate ŝmaci?)

THE REASON . . .

Why did Zamenhof succeed, while the authors of other projects, among them professional philologists, failed?

Because he was first and foremost a man who consciously practised his humanity, and was only secondarily a lover of language as such. He invested Esperanto with a spiritual element; he gave it a humanistic background, an atmosphere of brotherhood.

By its structure and genius Esperanto is fitted to serve all men, educated or not. Its neutrality and ease enable the user to say: "This is my language, which I share in common

with you all." Learning it, one senses an ennobling influence lacking to all other tongues.—Dr. G. F. Makkink, a Dutch scientist, in "Memorlibro".

MEMORLIBRO.

Eldonita okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. Redaktoro, Prof-o Ivo Lapenna. Eldonita de Centro de Esploro kaj Dokumentado U.E.A.), Londono, Prezo 50 steloj (stelo: 7½p. Aŭstralia).

Nederlanda presejo Zwagers cv. honoris la kreinton de E-o, kaj mem ricevis honoron, prezentante al la movado 120-paĝan grandioze imponan verkompilon pri ĉia faceto de lia diamanta karaktero.

Komence ni trovas detalan biografian informaron pri lia vivo kaj liaj vojaĝoj. Sekvas pri personaj studoj fare de Waringhien, Privat, Lapenna, Albault; la lingvistikaj rilatoj de E-o (Collinson, Bokarev, Setala); Tolstoj, Zamenhof kaj E-o (Kolobanov); fila tributo, de Adam Zamenhof.

Studesploras lian poezion talenton kaj produkton Marjorie Boulton; John Francis pritraktas lian poezion kaj prozon, post paragrafoj pri la integra kaj latentaj naturo de la E-a lingvostukturo, kaj la senfina variado de ĝiaj elementoj.

Wm. Auld tre dokumente ekzamenas la kapablojn de E-o kiel tradukilo, i.a. dulingve komparante la tekstojn de L'Albatros (Baudelaire) kaj Anĉar (A. S. Puŝkin). The Tiger (W. Blake) estas trilingve analizata—angle, Esp-e, france. Riĉe prinitita, la longa eseo estas frukto de vasta legado en la pritradukista literaturo.

Aliaj prilingve literaturaj artikoloj estas de: D-rino C. Conterno, J. Regulo-Perez. Pri la mondlingva problemo ĝenerala verkas Prof-o P. Ravila. La sciencan flankon priskribas Prof-o G. Canuto, D-ro S. Nishi, D-ro H. Sirk kaj C. Stop-Bowitz.

Pri la komunikado kontribuas P. Davis, D-ro G. F. Makkink; kaj la rolon de E-o kaj la infanoj detale raportas D. Kennedy; E-o kiel familia lingvo okupas la penson de Rev. F. Moravec, kiu emfazas la neceson de hereda lingvo familia.

Julia Isbrucker kaj G. C. Fighiera respektive sin okupas pri Mond-

federalismo kaj la organizo movado.

Inter la artikoloj plaĉas poemoj de Poul Thorsen, K. Kalocsay kaj F. Szilagy, kaj inspire enbloviĝas elektitaj pensoj de la Majstro mem, kvazaŭ ankaŭ li kunulecas ĉe la spirita festen-tablo kun siaj fidelaj disĉiploj.

Bone masonita monumento al animo nobla, la libro ankaŭ servas kiel brila lumo, por dispeli ignoron kaj nescion pri nia afero. Inspira, instiga kaj ĉiel helpa, ĝi longe nutros la menson kaj koron de ĉiu, kiu sincere strebas al la fina triumfo.—F.R.B.

VITRALO: J. I. Francis. Beletraj Kajeroj 4. Eld. Stafeto, Tenerife. 135 p.

En "Kvarope" Francis sin montris poeto kapabla verki en la malfacila medio de la eposo. Li nunl elvidigas prozan virtuozon, riĉe uzante la rimecojn de tiu verkformo. Per la filtrilo de sia glatmova cerbo, gaje kaj serioze, piksatire kaj patose, lin nun vestas la humorojn, paradas la pensojn, esprimas la impresojn, kiuj flirtflugas en lia multflanka animo.

Ĉi noveloj meritas atenton, unue pro la fabelo formo de kelkaj, kaj due pro la vasta temdiverseco. En iuj la satiro akre pikas; aliaj elspiras neatenditan sentimentan molecon; aliaj emfazas la influon de l' destino sur homajn eventojn.

"La Klera Despoto" vipas la korteganan flatemon, ĉiam pretan laŭdi la stultajn ideojn de potenculo, kiu komencas regadon kun intenco patroni la beletron, sed, pro vantamo, fanfaronas kiel beletra gvidanto, ĝis fine la morto lin trafas per ponardo de kortegano, sub instigo de la filo de la despoto mem.

"La Tuŝo de Morto": militaviadistoj vivece dialogas dum noktbombado sur malamikan teritorion. Ĝi emfazas la terurecon de la ago kaj nudigas la verajn sentojn de la partoprenantoj—timon kaj nervstreĉon regatajn nur de la fera volo plenumi la ordonitan taskon, eĉ se la organismo reagas per nesubpremebla vomemo.

"La Bela Reĝino" kontrastas karakterojn de aspirantoj al reĝina mano, emfazante influon de l' sorto sur la vivon.

"La Vidvino Pirson", per delikata sentimento, priskribas la vivon de soleca maljunulino bonkora kaj malriĉa.

Ce pluraj legantoj li aŭdigis plendon pro sporada jangle nekutima vortuzo kaj kelkfraze iom peniga stilo; aliaj aprobos lian eksperimentemon, admirante lin pro sentima provado, ekspluati la latentajn fortojn de la lingvo.—C.C.C.

KVAR TERMINARETOJ.

Eldonita de Esperanto Press, Oakville, Ontario. Prezo po 4 steloj (2/6). 21 ĝis 35 p. Represitaj.

Ili aperis aldonaje al la jarlibroj de IEL/UEA en antaŭaj jaroj, sed estas jam elĉerpigitaj: pro ilia valora materialo la Kanada prelisto ricevis permeson re-eldoni ilin.

Infanludoj: Societo de Britaj E-Instruistoj, 1942.

Radio-Terminaro: A. Venture, 1943.

Muzika Terminaro: Butler kaj Merrick, 1944.

Kudra kaj Trika Terminaro: M. kaj V. Verda, 1947.

Ili estu ĉekubute de ĉiu serioza uzanto de E-o.. Agentoj ricevas trionan rabaton.

PRI LA VOKALOJ.

"Vowels, How Many?" (Maj-Junio) entenas malprecizajojn.

Lingvistikemulo ne povas juĝi pri tiaj problemoj sen scio pri fonemiko, t.e. scienco pri fonemoj. Fonemo estas aro da interrilataj parolsono, nome alifonoj, centrigantaj ĉirkaŭ la plej frekvente uzata sono de la aro. Ekzemple, fonetikistoj elmontras, ke la k-sono en la angla "kill", "cool" kaj "skill" estas malidentaj laŭ voĉprodukta maniero.

Sed pro tio, ke la tri k-sono, nome alifonoj de k, centrigas por anglaj oreloj ĉirkaŭ komuna k-sono, la k-sona aro nomiĝas k-fonemo. La oreloj de koreano aŭdus tri tre malidentajn parolsonojn, ne tri alifonojn, sed tri fonemojn.

Lau fonemaj kriterioj ekzistas: (1) en parolata Esperanto.—

(a) 5 unuobla - vokalaj fonemoj: a, e, i, o, u.

(b) 7 duobla-vokalaj aŭ diftongaj fonemoj: aj, ej, oj, uj, eu, au, ou.

(2) En la parolata angla lingvo—laŭ la prononcmankiero de la Brita Brodkasta Korporacio kaj la aŭstralia:

(a) 12 unuobla-vokalaj fonemoj,

kiel en skribe: beet, bit, bet, bard, bat, bob, bought, boot, foot, but, bird kaj (a)bout.

(b) 9 duobla-vokalaj aŭ diftongaj fonemoj, kiel en la skribe: boy, bay, by, boat, bout, beer, bear, tour kaj drawer.

(c) 5 triobla-vokalaj aŭ triftongaj fonemoj, kiel en la skribe: cower, fire, player, lower, coir.

(3) En la parolata franca:

(a) 16 unuobla-vokalaj fonemoj, kiel en la skribe: patte, pate, tant, fêe, de, bette, vingt, cri, dome, vole, ton, oeuf, oeufs, un, tout, tube.

(4) En la parolata itala:

(a) unuobla-vokalaj fonemoj, kiel en la vortoj skribe: venti (twenty), venti (winds), tosc (poisonous), tosc (Tuscan), chi, fa, un.

Sumigi do, oni povas diri, ke, analizataj foneme, la itala havas vokalojn 7, Esperanto 12, la franca 16, la angla 26 (aŭ nur 21 se oni eliminis la kvin triftongojn, konsiderante, ke ili estas kunmetoj de la kvin diftongoj de "bay, by, boy, boat, bout", plus la neutra vokalo (a)bout).

Neniuj el la nomitaj lingvoj posedas eĉ dufoje tiom, kiom havas Esperanto, escepte la angla certaokaze. La diraĵo de la Shorter Oxford English Dictionary aludas "normajn" plus regionajn prononcmankierojn. La unua frazo de Meillet estas nepre malprava, kaj lia dua frazo estas tre diskutibla.

—Kevin L. G. Smith,
Balgowlah, N.S.W.

JACK LONDON.

"Estas egale, kion vi studas. Vi povas studi la francan, la germanan, aŭ ĵeti tion tutan kaj profundigi en Esperanton. Vi atingos la saman kulturenivelon".—"Martin Eden", ĉap. 13.

U.E.A. & SOVETIO.

"La reto de UEA-delegitoj en Sovetunio plivastiĝas. Oni povas trovi ilin tra la tuta Sovetio".—"Hungara E-isto", 6/61.

(La jarlibro de U.E.A. listas 24 personajn nomojn.—Red.)

"Sennacieca Revuo", N-ro 80. Ĉu havebla al la red. kontraŭ pago?

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrews Ave., Rosanna, N.22, Vic.
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 24 (104).

MELBURNO

Sept. - Okt., 1961.

"OTHELLO" IN ESPERANTO.

The Thirteenth Work of Shakespeare Appears in the International Language.

When Reto Rossetti formed the intention of translating "Othello" this tragedy was more appreciated abroad than in England itself, because of its intense passion, which had wide appeal for less inhibited peoples, as it once had for the lusty Englishman of the great poet's day. The emotionally phlegmatic of our time, however, still sensed certain reticences regarding it.

Rossetti finished the work in 1951. It was presented at the Scottish Esperanto Congress at Dundee in that year, with Wm. Auld as Othello, Rossetti as Jago, and Carola Rossetti as Desdemona.

In the last decade Othello in England took on a new significance, partly because the race problem it mirrored became more topical, and partly because modification of sex tabus there brought the erotic element into wider social toleration.

Of the 37 dramas of Shakespeare, Othello is the 13th to be translated into Esperanto. The most diligent translator was S. A. Andrew, who rendered four works into prose. The others followed the form of the originals. With the exception of Hamlet (trans. Zamenhof) and The Tempest (Motteau), all have been translated by those with English as their mother tongue.

How do the Esperanto translations compare with the national language

renderings? The question first arose when De Beaufront declared Hamlet superior to the best French translations. Read Fraser-Tytler's condemnation of Voltaire's translation of the work ("Principles of Translation": Dent's Everyman). The query was raised again with the publication of "Sinjoro Tadeo" (Pan Thaddeus), La Infero, Peer Gynt, La Floroj de l'Malbono and other classics. The coming "complete Heine" in Esperanto will evoke it anew.

Some competent critics rank them high in the scale of clarity and fidelity. One such wrote in "La Nouvelle Revue Française" (11/58) of The Rubaiyat of Omar Khayyam (trans. Prof. G. Waringhien): "There are hundreds of translations of the Quatrains in the many languages... the most exact that I know is the Esperanto translation by Gaston Waringhien". Dr. I. Lapenna says: "La Infero is superior to the best English translations, owing in part to the poverty of English in feminine rhymes". Here Dorothy Sayers: "The heavy thump of the masculine rhymes, which predominate in English": Introduction to her translation of The Divine Comedy. Marjorie Boulton's remarks on Hamlet (Zamenhof's trans.) are restrained, measured, but just: "It is perhaps competent rather than brilliant, but it is a good translation—readable, speakable, actable, generally a fair

rendering of the original." Similarly Waringhien, having mentioned certain defects, remarks on its fine style and outstanding fitness for stage presentation. We await the day when a Britisher—a Gregor, Auld, Newell, Rossetti—shall give us a new version, textually complete in all its expressive fullness.

One hears it said: "I learned Esperanto to read original Esperanto works, which I could not otherwise read. We have foreign classics in our own language." But others can say with good cause: "I learned Esperanto to read works from Czech, Danish, Hungarian, Bulgarian, Estonian and other tongues because I simply can't get them in English." For instance, only one of the Polish Mickiewicz's works—Pan Thaddeus—seems procurable in English. And where could you now get "The Inspector" by the Russian Gogol (1)? Walter Scott Ltd. published it in 1892. Many of the relatively few English translations from the vast non-English literatures are uninspired, poorly rendered, and even misleading. The best of the rest are the work of a few chosen masters in two tongues. How many translators meet the postulate of Fraser-Tytler that beside a full mastery of his own tongue a translator must have a perfect mastery of the language of the original and a competent acquaintance with the subject of which it treats?

Now, the Esperantist possesses an incalculable dual advantage in that the translation is made by one having mastered equally the language of the author (being himself of that speech) and of Esperanto, the medium. Inversely, several original Esperanto books, and a few translations into Esperanto, have been rendered into national languages, Esperanto thus serving as a "bridge" language.

Esperanto litterateurs would do well to make a frank assay of the comparative value of our wealth of translated poetry. Every traceable comment or judgment, made objectively, should be garnered and worked into a clear pattern of general appraisal, each work of importance being given a short chapter. This documentation could then be

presented in fitting form to such circles as are ready to weigh honest evidence.

High qualifications in their own field have not enabled some of our academic disparagers to see the obvious, namely, that it is necessary to know Esperanto well in order to fairly judge an Esperanto work. This blinkered attitude evoked the criticism referred to in a letter from Rossetti to G. B. Shaw: "Today in Britain it seems an absolute axiom that to assess Esperanto one must know it. If one masters Esperanto in order to judge it, one's testimony automatically becomes invalid, for then one is an 'Esperantist'" ("British Esperantist," July, 1960).

(1) Translated by Zamenhof in 1907 under title "La Revizoro".

See La Rondo 3/48, 6/46, 3/50, 11/50, 6/51, 7/51, 9/56. The A.E. 10/60.

LA GARDISTO.

Nokt' malvarma kaj malluma
regas sur la ter'.

Ĉiu jam de longe dormas;
frostas la aer'.

Sole vagas nur gardisto
sur la kota strat'—
je la domoj li rigardas,
muta kun maŝat'.

Tie ĉiu dolĉe dormas
en molvarma lit'.

Ho, se li ripozus tiel,
laca de rigid'.

"Vidu, mi nenion havas,"
plendas li al si—

fremdan bonon kaj ripozon
gardi devas li.

—Speciale verkita por ni de D.
D. Raĥinoviĉ - Tajc, Herchel
str. 18, Hadera, Israel.



Jen la grandioza havenponto
en Sidnejo, kongresurbo.

Australia Kroniko

SECOND LIST OF CONGRESS MEMBERS:

39. Mr. F. Franjic (Sydney)
40. Mr. R. Springer (Sydney)
41. Mrs. M. Springer (Sydney)
42. Mr. A. Murdoch (Sydney)
43. Mrs. B. Murdoch (Sydney)
44. Mrs. M. McMullen (Sydney)
45. Mrs. G. Kirkwood (Mylstom, N.S.W.)
46. Dr. K. Bowling (Sydney)
47. Miss N. Farms (Sydney)
48. Mr. H. Webber (Sydney)
49. Mrs. R. Carruthers (Sydney)
50. Mrs. M. Duncan (Manly)
51. Mr. K. J. Hirschel (Melbourne)
52. Mr. R. Harry (Canberra)
53. Mr. I. Maddern (Morwell, Vic.)
54. Mrs. E. Maddern (Morwell, Vic.)
55. Miss M. Maddern (Morwell, Vic.)
56. Miss D. Maddern, Morwell, Vic.)
57. Miss P. Maddern (Morwell, Vic.)
58. Dr. G. K. Rutherford (Canberra)
59. Mr. N. Gamble (Canberra)
60. Mrs. J. Torr (Canberra)
61. Mrs. E. M. Hill (Melbourne)
62. Mr. E. Crowe (Melbourne)
63. Mr. J. Davidson (Canberra)
64. Mrs. A. Davidson (Canberra)
65. Miss K. Davidson (Canberra)
66. Miss M. Drake (Sydney)
67. Miss B. Drake (Sydney)
68. Mr. F. Dash (Sydney)
69. Mrs. W. Begg (Manly)
70. Mr. T. Perry (Sydney)
71. Mr. F. R. Banham (Melbourne)
72. Mr. K. Smith (Sydney)
73. Dr. R. Robbins (Canberra)
74. Miss B. M. Henderson (Manly)
75. Mr. W. Chandler (Sydney)
76. Mrs. Rita Aagard (Auckland, N.Z.)

The Mayor of Manly will receive visitors at a Civic Reception at 10.30 a.m. on Sunday, January 7. After the Civic Reception the members of the Manly Esperanto Club will be hosts to the visitors for lunch and entertainment will be arranged for the afternoon. Congress members contact the Hon. Secretary, Mrs. B. Cleminson, 20 Sturgess Avenue, Harbord, N.S.W. (XF 1854).

Please Note: Cheques, money orders, postal notes should be made payable to "13th Australian Esperanto Congress".

Congress Poster Competition.

The Congress Committee invites Esperantists and their friends to a Poster Competition. Posters of any medium, not larger than 30in. x 40in. are eligible. Theme: Esperanto, the International Language. Six cash prizes will be awarded for the best posters. Entries will be judged by the well-known Sydney artist and winner of the Blake Prize, Mr. Stanislaus Rapotec. Winners will be announced and cheques presented at the official opening of Congress at Anzac House on Tuesday, January 2, 1962. Posters remain the property of A.E.A. and the Sydney Esperanto Society.

Entries close on November 30, 1961, and should be sent to "Esperanto House", 143 Lawson Street, Redfern, N.S.W., carefully rolled in a cylinder.

GENERALA KUNVENO DE A.E.A.

La Generala Kunveno de A.E.A. okazos en Esperanto House, 143 Lawson Street, Redfern, N.S.W., je Merkredo, 3-an de Jan., 1962.

Tagordo:

- (1) Jarraportoj de la Asocio
- (2) Proponoj de la membroj
- (3) Elekto de Estraro
- (4) Estonta agado de la Asocio
- (5) Loko de la 1964-a Kongreso
- (6) Eventualaj

Klubo kaj individuaj membroj sendu proponojn por la Generala Kunveno antaŭ la 15-a de Dec., 1961, al: A.E.A.—Box 2122 T., Elizabeth Street P.O., Melbourne, Vic.

—HERBERT KOPPEL,

Hon. Landa Sekretario de A.E.A.

● **BRISBANE:** Sola aktiveco de nia Societo konsistas el instruado de lernantoj; estas 4 klasoj, gvidataj de S-ro Guenster, S-ino Beck, S-ino Sandford kaj S-ro Grant. Pro la maloftaj kunvenoj (dufoje monate) la Prezidanto decidis ke pli bone estas koncentrigi je instruado.

Eminenta vizitanto, kune kun sia edzino, estis S-ro P. Schwerin (Sydney), kiujn Ges-roj Gunster gastigis vespermanĝe ĉe ilia hejmo, kaj post kelkaj tagoj, Ges-roj Behncken veturigis ilin al la Ora Marbordo kaj aliaj lokoj, antaŭ ol la vizitantoj foriris por ferio ĉe Caloundra.

Novajo pri S-ino V. Fraser sciigas ke ŝi luis automobilon kaj forvojaĝis al Skotlando, post ĉeesto de la Kongreso en Harrogate.

F-ino Scaroni, kune kun kvar fraŭlinoj, faras vojaĝon en Europo, kaj la Delegito ricevis poŝtkarton de ŝi el Aŭstrujo, kie ŝi vizitis la Esperanto-Muzeon kaj konversaciis kun S-ro Steiner. Ŝi intencas vojaĝi en Europo dum 9 semajnoj kaj aĉeti automobilon por fari la vojaĝon.

—S.L.P.

● **PERTH:** Vizitis (20/7) nin S-ro P. Holmes, el Seymour, Viktorio, kies ŝipo (survoje al Europo) haltis dum kelkaj horoj en Fremantle. La 3-an de Aug. ni gastigis S-inon B. Bennett el Sidnejo, kiu rakontis al ni multajn interesajn pri siaj vojaĝoj. Ŝi estis intervjuata de 6 Wf Radio-Stacio en la Virina Horo. Kvankam tro malmultaj ligoj ĉeestis dum ĉi tiu vespero, tiuj kiuj renkontis S-inon Bennett volas danki al D-ro kaj S-ino Einihovici pro la oportuno renkonti tiel ĉarman virinon. Samvespere ni ĝojis revidi S-inon G. Pollard, kiu antaŭ nelonge eliris hospitalon.

Kun bedaŭro ni devas raporti la morton de S-ro Stanley Hicks, kiu mortis la 7-an de August.

● **SYDNEY:** Oportunvendado (1/7) enspezis £22. Tombolvespero (24/7) enspezis £12/6. La sola prelego estis de F-ino Rita van Ryswyk, kiu parolis pri Esperanto en Nederlando (10/7). Dum debatvespero (31/7) la anoj diskutis du tre gravajn temojn, unue, ke malplena stomako estas pli bona ol malplena cerbo, kaj due, ke la formiko estas pli feliĉa ol la aglo. En sonbendprogramo (14/8) S-ro J. Matasin disaŭdigis Poul Thorsen legantan siajn poemojn, kaj Ivo Lapenna prelegantan pri la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. La plej ofta programo estis prelegetoj de la anoj:—vivanta gazeto, sed efektive prelegetoj (17/7); prelegetoj pri eŭropaj kongresoj de Esperanto (7/8); prelegetoj pri internaciaj organizaĵoj de Esperanto (2/8).

La prelegetoprogramoj estas ĝin-daj se sufiĉe de la partoprenantoj sin preparis antaŭe. La debatvesperoj same, sed oni povus diskuti temojn almenaŭ iomete pli gravajn. La sonbendprogramo, ĝuata de la spertuloj, kaj tre forte efikanta sur la lingvonivelo de la anoj, estas iom

kotaŭstarata de kelkaj anoj.

En la Esperanto-Domo du klasoj, komenca kaj daŭriga, kunvenis lunde antaŭ la klubkunveno. En Ashfield, Parramatta kaj Hornsby daurigaj kaj komencaj kursoj en la Vesper-Lernejoj.—P. M. Dunn.

● **MANLY:** La anoj de ĉi-tiu nove fondita klubo kunvenas ĉiun trian dimanĉon en la monato ĉe 5 Esplanade, Manly. Kutime ĉeestas ĉ. 30 el la 40 anoj. Lastatempaj aranĝoj estis:

Marto: Gast-parolantoj el Sydney E.-Societo (Rita v. Rijswijk el Nederlando, Milan Sudec el Jugoslavujo).

Aprilo: Ludoj kaj Kantoj.

Majo: Tuttaga pikniko ĉe Lane Cove Nacia Parko (ĉeestis 60).

Junio: Generala Kunveno, elekto de estraro, akcepto de Konstitucio kaj Regularo.

Julio: Prelego pri "Nov-Gvineo" kun diapozitivaj de S-ino M. McMullen.

Aŭgusto: Prelego de Kevin Smith pri "Mia vojaĝo Eŭropon".

Krom la dimanĉaj kunvenoj okazis ankaŭ aliaj aranĝoj ekz. (a) 3 kant-vesperoj en la hejmo de S-ino R. Carruthers; (b) Film-Vespero (angla-lingve) de Urbkonsilisto F. Preacher pri vojaĝo al Sud-Ameriko; (c) Film-Vespero (Esperantlingve kun traduko) en la granda halo de la Vespera Kolegio. S-ro Schwerin prelegis pri Europo, ĉeestis 60. Tagjurnalo "Manly Daily" regule raportas pri niaj kunvenoj kaj nun eldonas ĉiusemajne E-lecionojn en "Esperanto Corner".

Daŭras 2 kursoj en la Vespera Kolegio. Feliĉe por ni S-ro Kevin Smith translokiĝis al Balgowlah kaj nun instruas elementan kurson.

Marjorie Duncan.

● **CANBERRA:** S-ro Jim Davidson prelegis (12/7) pri vojaĝo al Sovetunio. S-ro Harry prezentis (19/7) filmon pri Nova Gvineo, kie li vojaĝis dum 3 semajnoj dum Junio. Poste li respondis al demandoj pri Papuo, Nov-Gvineo kaj aliaj lokoj en Sudorienta Azio. Ĉeestis vizitantoj el la Internacia Kunveno pri Antarktiko, inter ili S-ro Gielb, bona Esperantisto. D-ro Ross Robbins (26/7) aranĝis "Kvizon", laŭ la amuzaj konkursoj de S-ro Linton dum la lasta Kongreso.

● **MELBURNO:** La Melburna E-Klubo fine translokiĝis en Aŭgusto al la Esperanto-Centro. Dum jaroj Merkredo estis la tago de niaj kunvenoj, sed ĉar alia klubo luas la domon dum tiu tago, kaj la Kooperativo ankoraŭ dependas de la enspezo, ni nun kunvenas ĉiun London.

Sajne neelĉerpeblan provizon da lumbildoj posedas nia mondvojaĝanto S-ro Frank Taylor kaj li uzis ĝin trifoje por distri nin (4/8, 18/9 kaj aŭgusta Rendevuo). El la AEA "sonbiblioteko" ni audis 4 paroladetojn de D-ro Privat (21/8); S-ino Fay Koppel gvidis (28/8) Demandar-Vesperon. El Centra Aŭstralio revenis D-ro A. Fridenbergs kaj je 4-a Sept. li prelegis kun lumbildoj pri sia vojaĝo. Interesan prelegon provis S-ro Linton (11/9) — pri De Beaufront kaj la Ido-Krizo.

Bonvena gasto estis Jack Hawks el Perto, kiu je 2-a kaj 3-a Sept. paŭzis en Melburno survoje al Europo. Per inspekto de la E-Centro, vespero ĉe Ges-roj Koppel kaj rondveturado kun S-ro Cohen li pasigis sian restadon en Melburno.

Pardonpete al S-ro Linton, kies nomon oni ellasis el la listo de parolantoj okaze de la solena Memor-Servo honore al D-ro Fred Williams (22/7).

Literatur-Amantoj atentu!

En la lasta numero de nia gazeto (p. 117) aperis konsilo ke oni mendu librojn rekte ĉe la Stafeto-Eldonejo. Bonvole notu ke tiaj libroj estas PLI FACILE haveblaj pere de la AEA-Libro-Servo. Sendu viajn mendojn kaj ĉekojn al S-rino I. Milligan, 274 Mont Albert Road, Surrey Hills, Vic.

LA UNUA E.-GRUPO.

En "Nuntempa Bulgario", 4/1961, A. Verŝinin (Odesa Domo de Scienculoj) impres defendas tezon, ke Odeso, ne Nurnbergo, estas la lulilo de la unua grupo de E-o. Sub V. Gernet grupo fondiĝis en Odeso en Septembro 1889. La aŭtoro asertas, ke nur surpapa estis la transiĝo en Decembro 1888 de la Nurnberga Weltsprache-Verein al Esperanto; nur dek anoj deklaris sin E-istoj, kaj post la "aliĝo" la Verein eĉ ne ŝanĝis sian nomon.

Recenzoj

"Sekretoj de la Marestaĵoj", de Petar Guino. El la kroata lingvo tradukita kaj reverkita de Lic. Marinko Givoje.

Eldonis Kroata Esperanto-Servo, Zagreb 1960, sub la aŭspicio de UEA. 144 paĝoj, 73 bildoj. Prezo 20 steloj.

La libro enkondukas nin en la misteran mondon de la enmara vivo. Ĝi estas kvazaŭ beletra sciencajo, vera frandaĵo por ĉiu, kiu admiras la miraklojn de la naturo. Fakte ĝi povas doni tiom da malkonataj—sed vere konendaj—detaloj al ĉiu homo, ke miaopinie neniu povas legi ĝin sen valora plivastigo de sia spirita horizonto.

La aŭtoro estis laŭprofesie ĵurnalisto kaj fariĝis Esperantisto antaŭ kvin jaroj. Li skribis en sia gepatra lingvo multajn popularsciencajn legaĵojn pri temoj el historio, geografio, naturscienco, fiŝbredado, kaj precipe el marbiologio kaj ornitologio. Tial li disponas pri tiom da faka lerteco, simple klarigi sciencajn faktojn kaj teoriojn, ke la teksto nepre devas kapti eĉ leganton, kiu kutime ne okupiĝas pri naturstudado.

Jam la titoloj de la 31 mallongaj ĉapitroj devas akriĝi ĉies apetiton. Mi ne povas ne citi almenaŭ kelkajn kaj malkaŝi iom de la surpriza enhavo:

"Kiel ekestis la maro kaj la vivo en ĝi"

(Marakvo, laŭ konsisto tre simila al mamula sango, estis la lulilo de la tuta vivo surtera.)

"Nevidebla martrezoro."

(En unu litro da marakvo ekzistas kelkfoje milionoj da vegetaĵetoj formantaj la planktonon, la unuan eron en la ĉeno de la enmara vivo, kiu fine produktas la grasajon en la baleno.)

"Interesaj kooperativoj."

(Stranga reproduktado de sponĝoj, ties artmaniera bredado; la deveno de la vorto 'koralo'.)

"La plej granda konkono de la Adria Maro."

(La duvalvulo 'pinao'; la fadenojn, kiuj ligas ĝin al la marfundo, oni uzas en suda Italujo por fari tri-kajojn.)

"Zorgoplena patro."

(Marĉevaleta, same nomita en ĉiuj lingvoj, povas movi ĉiun okulon ĉiufanken kaj ŝanĝi la koloron de la korpo. La femalo dejetas ovojn en ventran saketon de la masklo, kiu surprenas la pluan zorgadon pri la idaro.)

"El la rivero Neretva en la profundojn de la oceano."

(Misteroj en la vivo de la angilo kaj ties migradoj, kiuj cerbumigis sciencistojn dum jarcentoj. La fina solvo estas en aldono al la libro, ĉar ĝi estis trovita nur post komenco de la presado. Alia surprizo: angilo havas en sia sango fortan venenon, similan al tiu de serpento, kiu feliĉe solviĝas ĉe temperaturo de 60 d. C.)

La lingvo de la traduko estas bongega, neniu komplikaj frazoj, ĉio estas en flua klara stilo kaj facile komprenebla. Kelkaj preseraroj troviĝas, sed ne multaj, ankaŭ kelkaj eraroj (p. 7: konsulti anstataŭ konsili; p. 113: postsekvo anstataŭ sekvo; p. 118. 11.500 m anstataŭ 11500 m.) La libro enhavas liston de neologismoj kaj fakterminoj, kiu estas necesa en tia libro kaj granda helpo por nefakuloj. La ilustraĵoj, kaj la koloraj kaj la blanknigraj, plejmulte estas artistefaritaj kaj ili abunde klarigas la tekston.

Mi mem kiel konkologiisto posedas iom da scio pri maraj estaĵoj kaj certe grandan intereson por ili, kaj mi ne hezitas, tutkore rekomendi la libron al ĉiuj samideanoj. Valora aldono al nia popularscienca literaturo.—P. E. Schwerin.

TOPAZE: Marcel Pagnol. **LA SIPEGO TENACITY:** Charles Vildrac. El la Franca trad. Roger Bernard. Stafeto: J. Regulo eldonis, en Tenerife, Kanaria Insuloj. 292 p. 2 Us. dol.

Trafis grandan sukceson la du teatraĵoj de tiuj famaj literaturistoj. Por ĉiu Prof-o G. Waringhien verkis enkondukon. La unua estas amuza prezento pri Topaze, naive honesta instruisto, kiu perdas oficon pro nevolo perforti sian senton de l'justo antaŭ absurda plendo de bonsocieta klientino de la lernejo. Troviĝas publika administristo, kiu uzas sian aŭtoritaton, por postkulise manovri komercajn aferojn profite al si.

Senintence Topaze kontaktiĝas kun tiu ruza fi-farulo, kaj post duboj de la konscienco, lasas sin uziĝi kiel formala subskribisto de dokumentoj, kaŝa "pajlohomio". Fine tamen, ŝajne pro ekfloro de latentaj talentoj, li akiras aplombon kaj memfidon, kaj surprizas sian uzanton per efektiva transpreno de la tuta sekreta koncerno.

Ĝen la trunko de la "arbo", kies branĉoj estas spritaj scenoj entirantaj aliajn rolulojn, aliajn situaciojn. Nur ŝoketas la fina "kurteno", kiu ŝajnas iom malforta; mankas kulmina efiko. La teatraĵo niaopinie atingas klimakson, plej frapan punkton, kun sceno en kiu Topaze la mastron uzake senposedigas.

En la lasta sceno (4) Topaze babilas kun kolego Tamise. Jam cinikiĝinta, Topaze rebatas ties riproĉojn pri la malhonesto, kaj ŝajne impresas sian alparolaton, kiu "eliras penseme", kun novaj konceptoj pri la ideala kaj la realisma en la vivo. "Instrui moralon al infanoj, direkti ilin sur ĝustan vojon, ne plu respondas al la realo. Malatenti al etikaj proverboj estas la komenco de riĉiĝo". Ironio efektala!

Sub masko de amuzo Pagnol mokas la malhoneston, kiu pli-malpli rodas rilatojn de homoj en ĉiu vivtavolo ĝin ebliganta, kaj Bernard trafte tradukis la verkon, kies dialogoj, en sia nova vesto, dolĉe odoras la parfumon de la originalo.

Admirinde klara, esprimtrafa, la traduko estas rimarkinde libera je neologismoj. Notindaj: kapuĉo de fontplumo. P. 246 (pri vundita fingro) "la karno agas sub la ungoj". Ŝajne influo de Franca "agir, agissant". 279: "Li estas homo unupeco". "Peco" devas signifi: parto, do "unupeco" estas dubesenca. Ĉu "integra"—sen morala nuanco?

La dua estas rakonto simpla, sed riĉa je vivobservoj kaj atentinde inteligenta prikomento. Du Parizanoj, Segard kaj Bastien, survoje al Kanado, serĉas ripozon en havena restoracieto. Ili renkontiĝas kun laboristo Hidoux, kaj kun li diskutas la elmigran. Sekvas bona konversacio, kiu jetas lumon pri tio. Bastien, firmopinia viro, muldas la decidojn de Segard, kiun li cetere inklinigis iri al Kanado. La ŝipo

devas pro riparo resti kelkajn ekstraĵojn tagojn ĉehavene, dum kiu tempo la du viroj loĝas ĉe la restoracio. Segard, preninte laboron ĉe Hidoux, vundas la manon kaj sin izolas en sia ĉambro. Bastien amimplikiĝas kun la servistino Tereza, kaj kun ŝi kaŝe forkuras. Restanta sola, Segard fine trovas sin sub neceso uzi la propran volon, kiun ĝis tiam direktigis por li Bastien. Ĉu iri transmare, ĉu reiri Parizon?

Ĉar temas pri la volo, la decidkapablo de homoj direkti la propran vivkuradon. "Estas homoj, kiuj estas kiel korkoj sur rivero. Ili iras re-vante, restas en golfeto au kanoj; au, kiam venas kirlo, ili denove ekfloras pluen. Aliaj estas ventvergetoj; havante pivoton, ili estas firmaj". Tamen, kio ĝuste estas la pivoto? Certe ne la volo, kapablo direkti ventofluon, nome la vivovoĵojn, ĉar la ventoj mem faras tion, kaj la "pivoto" obeas ilin. Ĉu do vere ĝustas tiu analogo de riverfluo au ventoblovo? Kontraste kompari senvolaĵojn "korkojn" kun "ventokokoj" ne trafas, ĉar ambaŭ tipoj restas figure influataj de la elementoj—ĉu akvo, ĉu vento.

Sed ekzistas tria kategorio. Churchill elstare reprezentas ĝin, sed ankaŭ simplaj homoj povas ekzempligi ĝin en sia malpli larĝa vivkadro. La vivo de la granda Anglo montras kion homo povas fari, por direkti la kuron de l'istorio, au modifi la forton de persona destino. Bazita sur la "pivoto" de klara celo kaj fera volo, li, vorte kaj age, tranĉis kanelojn laŭ kiuj la cirkonstancoj fluadis. "Eĉ la ventoj lin obeis." Deterministoj agas saĝe, se ili reprenus siajn teoriojn kaj funde ilin revizius.

Valora kontribuo al nia teatra literaturo, kaj rekomendinda por ĉiu amanto de bonflua kaj tuj-komprenebla legaĵo.—F.R.B.

Book Service: Mrs. I. Milligan, 274 Mont Albert Road, Surrey Hills, Vic.

TRI LIBRETOJ.

PAGENSTECHEK, Johanna. "Sageoj kaj Rakontoj Laŭlonge de l' Rejno." Pagoj 47. Prezo 4/6.

Pecetoj de rakontoj kaj legendoj, iuj feaj, iuj teraj, pri okazintoj laŭlonge de la Rejno dum la mezepoko, bone rakontitaj en lingvo glata kaj bela. La koverto, tipografio kaj de-

segnoj ĉiuj plaĉas. La evitinda neologismo "sageo" ne venas rekte de la islanda "saga", por kiu oni preferu "sagao", sed de la germana "Sage", kiu signifas nur "legendo".

BERGER, Joseph F. "Niko kaj Nina: Postkurso Legolibro Originala. Pagoj 70, prezo 4/3.

Knabo kaj knabino kreskas en Germanujo. Okazas renkontoj kaj aventuroj; disiĝo, miskompreno kaj geedziĝo. El tiaj banalajoj, kunigitaj en simpla, bela, iom lirika lingvo, la aŭtoro faras sian idilieton. Ĉiu "ĉiam estis surradiita de sincera ĝojo kaj gaja sereneco". Mankas nur vidi la rolulojn kontraŭstari veran malbonon. Sed eĉ dum la milito, neniu estas kruela au mensoga; neniu ŝtelas, batas au trompas. Tamen tre bona lernlibro, ĉiam interesa, eĉ pro la stranga moralo:—Estu bonaj kaj ordemaj: fermu la okulojn al malbono.

WIECZOREK, Klemenz. "Kiel Aŭtodidakto al Pedagogia Scienco." Pagoj 39. Prezo 2/9.

Oni vane atendus de tiu libreto ion pri la memeduka scienco. Estas io pri la historio de pedagogio; io pri la virtoj de Esperanto; multfoja ripetado, ke eduko devas esti religia. Multe da predikado, sed preskaŭ nenio pri au logika teorio au praktika instruo. Mi ne povas diveni la celon de la aŭtoro—se efektive celon li havis. La lingvo estas iom arkaika kaj tute ne bela.—F. M. Dunn.

Eldonis la tri libretojn Limburger Vereinsdruckerei, Diezer Str. 17-19, Limburg/Lahn, Germany.

GEOGRAFIA REVUO

N-ro 4, raportas pri ok milionoj da kanguruoj en Novsuduelso, kaj ankaŭ mencias ekstermon de leporoj en Aŭstralio. Fakte temas ne pri leporoj sed pri kunikloj. Ankoraŭ kredante, ke pri la geografo la revuo meritas fidon koncerne sian propran fakon, ni tamen konsilas, ke ĝi pliiĝu sian scion pri la ĉi-landa faŭno.

Uzante "Novsuduelso", la revuo ne helpas al la lingva unueco, ĉar la formo ĝenerale uzata en Aŭstralio estas "Novsud-Kimrujo".

POR VIN DISTRI.

La homo, kiu amas nur sin mem, malamas nenion pli multe ol esti sola kun si.—Pascal.

Recenzantoj! Se verko edifas vian spiriton, purigas vian pensadon, kaj instigas vin al nobla strebemo, ne serĉu plu alian regulon por ĝin juĝi. Ĝi estas bonega, farita de majstra mano.

Televideo ŝanĝe faras al geknaboj, ke ili ne plu estas nerezisteblaj fortoj, sed fariĝas nemoveblaj objektoj.

INDIKU PRONONCON!

Nepre transskribu nacilingvajn proprajn nomojn per Esp-a ortografio post la nacia formo, celante kiel eble plej helpe redoni la prononcon. Ekz., Carlyle (karlaji); Heine (hajne); Herriot (erjo).

KIO OKAZIS EN BERNE.

Ĉe la Kongreso en Berne (1913) D-ro Olšvanger aranĝis, ke sabate okazu preĝado en la Berna sinagogo. Li insistis, ke Zamenhof ĝin partoprenu. Tiu unue rifuzis, por ne demonstri sian religi-apartenon, supozinte, ke tio ĉi povas iel malutili al E-o, ĉu pro ebla malŝato al Judoj (kiu povus influi al la ne-Espa publiko); ĉu pro la postulo de nacia kaj religia senpartieco de li propagandita. Sed Olšvanger argumentis, ke tiel aŭ alie, la Majstro ne sukcesos (eĉ ne demonstrante sian nacian apartenon) depreni de la malŝatantoj de la Judoj ilian sintenon al E-o, se ĝi estas anticipe negativa. De alia flanko, demonstri prireligian indiferentecon ankaŭ estas malkonvene al la aŭtoro de "Preĝo Sub la Verda Standardo".

Zamenhof ja aperis en la sinagogo. Alestis Judoj kaj ne-Judoj. Olšvanger "sidigis lin sur la honoran sidlokon, ĉe la orientdirekta preĝeĵmuro, kaj donis al li la silkan blankan preĝtukon kun bluaj strioj, per kiu la Majstro sin envolvis. Dum laŭtleĝo de la Biblio li estis honorita per alvoko al la ambono, de kiu li aŭdigis la konvenajn bendirojn de "Maftir". Sed la kulmina surprizo estis la rabena prediko, farita en Esperanto." Estis Olšvanger, kiu instruis al la rabeno la lingvon, kaj helpis al li verki la predikon, bazitan sur Cef-

anja 3/9: "Tiam mi redonos al la popoloj lingvon puran."

Tute mutis la tiamaj E-gazetoj, kaj ankoraŭ ĝis nun ne aperis raporto pri tiu signifa evento. Nia informinto estas D-ro J. Kohen-Cedek, kiu ricevis ĝin konversacie kun d-ro Olšvanger.

FILATELIO.

La Aŭstria okpenca p.m. "tigro-kata" ricevis de la Londona Postmarkkolekta Jarlibro aprobon, kiel unu el la dek plej bone desegnitaj de 1960j.

(Ĝi bildas marsupialan mamulon karnmanĝan, ŝajne Dasyure (Gr. dikvosta) maculatus.)

Nova verko de la Pola aŭtoro Jean Forge (Jan Fetke) kiu antaŭmilite ĉarmis nin per siaj Abismoj; Saltego Trans la Jarmiloj kaj Mr. Tot Aĉetas Mil Okulojn. Ĝi originala novelaro—La Verda Raketo—amuze rigardas "la verdajn batalantojn".

Eldonis: KOKO, Randbolvej 4, Copenhagen F.. Prezo 30 steloj.

INDONEZIO.

Spell it that way, says the Indonesian Esp. Assoc., which held its first general conference April 1-3 in Djakarta. The governor of the town, the ambassador from Poland and an education department representative attended the conference.

Address: Indonezia Esperanto-Asocio, Pintu Besi 39, Djakarta.

LILIPUTO, la unua parto de "Gulliver's Travels", aperos (trad. Ethel M. Prent). Angla prezo, 7/-. Adreso por sciigo al niaj agentoj: 3 Ashdown Rd., Epsom, Surrey.

EDUCATION.

The Tasmanian Education Dept. includes Esperanto in the School Board Exam. scheme. Its manual for 1961 has a chapter on Esp. exams., courses and teaching aids.

The annual conference of the N.S.W. Teachers' Federation voted for a resolution on teaching Esperanto preparatory to studying languages.

(Ĉu interesatoj povus pli-informi nin pri tiuj aferoj?—Red.)

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15\$ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 25 (105)

MELBURNO

Nov. - Dec., 1961

PAUL NYLEN

Swedish Editor and Esperantist.

He died in 1958, aged 57, after 66 years of Esperanto activity, having learned the language at Uppsala in 1892. He ardently and with honor served the movement till his death. The following was originally in Swedish; translated into Esperanto and thence into English, we give a resume of the latter text ex "Amerika Esperantisto," Dec., 1960.

The language situation in Europe and the world is not only highly unsatisfactory, but, to quote Professor Bjorn Collinder of Uppsala University, "outright humiliating". Here in Sweden an attempt has been made to solve the problem by intensive teaching of English. Competent teachers are now trying hard to acquaint our elementary school children with this language. Formerly we studied foreign languages only in high schools and universities. With what results? At the close of extensive university studies, a scholar was finally able to read foreign books, but not—except in very rare cases—to write the language correctly, and even less to use it extemporaneously and convincingly in a debate. Will elementary pupils have better luck? Shall we persist in a course that leads nowhere for an overwhelming majority of our scholars and for practically all the common people? Why not try out new ways and means?

The need is for a second language for all, as a supplement to every-

one's tongue. The ideal solution would be for all educated persons and those with any business outside their own nation to become bilingual, using their mother tongue at home and the second language abroad.

There are, of course, many who wish to study the language and literature of some other nation. Very good. But in our unifying world we need a channel of understanding for global use, a simpler means than any of the complicated national tongues. Many scholars and others have reached the firm conclusion that only a specially constructed, planned language can fulfil the requirements of a world auxiliary tongue.

More than this conclusion was needed. In 1877 Dr. L. Zamenhof published his International Language. A few years before, Schleyer had constructed Volapuk on the basis of artificial words which were unable to strike root in the living ground of language. Zamenhof, however, started out from the living words of the vocabulary of Western civilisation. From the rich reservoir of Europe's languages he selected a basic vocabulary necessary for everyday life. Since "international" words are automatically part of Esperanto, and largely of Latin origin, Zamenhof's language became in fact a modern Latin. Prefixes and suffixes, with fixed meaning, multiply the words available and give to Esperanto the means of expressing fine shades of meaning. Grammar has

been cut to the bone, dispensing with the complications of national tongues. Despite this, Esperanto has proved that it can be used effectively, even for oratory and poetry.

Hundreds of thousands of people from the most different nations of the world have given life, growth and stability to a language which is no one's mother tongue, but which one learns in order to converse with others on a basis of equality. For over 70 years Esperantists have used it among themselves, so producing indisputable evidence that a planned language has become a living fact.

EDUCATION

The Polish State approved introduction of Esperanto in 50 schools as from September 1, 1961, as a compulsory subject. In Gdansk runs a State-born course for teachers, two years with three hours a week.

At Wedgwood Memorial College (Stoks-on-Trent) two courses, as in 1960.

In Hungary a course for teachers, who will teach Esp-o in coming term. The language may be taught as a separate faculty in Hungarian middle schools. Three such in Budapest and several in the provinces have included it.

The Austrian State supports Esperanto Teachers with S.1000.

In Finland, Esp-o is taught in 11 high schools; in France in 14 teachers' seminaries; in Japan circles in more than 25 universities and secondary schools; in Spain at Valencia University and some State schools; in Vietnam Esp-o is making way in the schools and press.

The Education Dept. of the Victoria Univ. (Wellington, N.Z.) in August held an intensive course for teachers who are to run Esperanto classes in N.Z. schools.

In Denmark Esperanto is now an optional subject in Classes 8 and 9 in schools and evening institutes.

Esp. Glumarkoj-interŝanĝo au kontr. dezirajoj serĉas: VANA V., Krizikovy sady I, PLZEN, C.S.R.

Alumet-etikedoj-interŝanĝo au kontr. dezirajoj serĉas: MOJZISEK M., ul. odboje 340, VRATIMOV, C.S.R.

KRISTNASKO DE KOMERCISTOJ.

Vidante homojn uzi sanktajn lokojn kaj objektojn, por gajni pli da riĉo kaj profiti fi-projektojn, ekflamis Vi, sur Templu grund', per indignego Dia, kaj vipan ŝnuron svingis Vi per forta mano Via. Rigardo Via, fulme fajra, en pekulojn brule boris, kaj voĉo Via, tranĉe, akre, kontraŭ ili plenstentoris.

Se venus Vi Kristnaske sur nian nunan teron, pro sama kaŭzo sentus Vi la saman Di-koleron.

MEMORE — 1943.

Jen denove Kristnaskfesto—
sankta tag' por l'homoj venas—
sed influ' de l'militpesto
ĉiajn hejmojn trudvenenas.

Jara kvino jam forpasis
kun amikoj en silento
kvazaŭ ilin viv' forlasis
tra Eŭropa kontinento.

Tie longe mutis homoj,
homoj lertaj je la plumo;
ĉesis verkread', poemoj—
koroj larmas en mallumo.

Totsche, Baghy, Jung, Kalocsay—
kie vi tristpaŝe tretas?
Ĉu vin venkis troaj streĉoj?
Male, ĉu vi batalpretas?

Ĉar espero revigliĝas
en korar' multmilionaj!
Grince pordoj malrigliĝas
de Karcer' vastregiona.

Ho, se or-epoko venus,
epok' de la Homaj Homoj;
ili reciproke benus,
strebus al la veraj bonoj.

Tiam en Kristnaskaj tagoj
preĝoj estus spontaj agoj—
ĉie bonfarad-laboro:
for malsat', malam' kaj ploro.
(spontaj: spontaneaj estas la oficiala
formo. Prononcu: kaloĉaj.)

PLAĈA REVUO!

Petu pronumeron sendante resp. spondkuponon al: KULTURA J. KAJEROJ, 5 boulevard Buisson, Rochefort sur Mer, France. Organo de La E-ista Kulturdomo de Gresillon, Bauge (M. et L.), France. Tre interesa.

Australia Kroniko

● **PERTH:** D-ro Caldera gvidis (21/9) Diskut-Vesperon pri la temo "Ĉu la Eŭropa Komuna Merkato povos influ la disvastigon de Esperanto en la malnova kontinento". Kelkaj ĉeestantoj subtenis la ideon ke la lingva problemo kaŭzos serĉadon al rapida kaj simpla solvo; kelkaj anoj dubis kaj opiniis ke pli grandaj problemoj okupos la mensojn de komercistoj—ke la lingva divers-eco ne gravos kompare al mongajno.

La ĉeestantoj de la oktobra lud-vespero elektis paroli anstataŭ ludi. Ili ĝuis neformalan interparolon, speciale pro la ĉesto de F-ino Longson, kiu ĵus revenis el Eŭropo.

● **MELBOURNE:** Nia mondvoj-aĝinto S-ro F. V. Taylor denove provizis 2 interesajn vesperojn (18/9, 20/11), montrinte diapozitivojn pri Francujo kaj Anglujo. S-ino I. Fink revenis al la klubo post longa foresto kaj rakontis pri vizito al Saigon (Vietnamo). Kvankam ŝi ne povis montri lumbildojn, ŝi tamen kapablis pentri al ni vivantajn bildojn pri la vivo en tiu urbo. S-ro K. Linton, nia regula prelegisto, je 2/10 prelegis pri J. Baghy kaj K. Kaloscy kaj pri vizito de Marjorie Boulton al tiuj 2 poetoj en Hungarujo; kaj je 6/11 li prelegis kaj diskutis poezion de Shakespeare, majstre tradukitan de nia S-ano L. Newell (Adelaide).

Centra Aŭstralio kaj indiĝena arto plenigis 3 interesajn vesperojn. D-ro A. Fridenbergs parolis pri la indiĝena arto je 9/10 kaj 16/10 kaj F-ino Hearn montris belegajn diapozitivojn pri la "Centro". Nia redaktoro, S-ro F. R. Banham, provizis interesan vesperon je 23/10 kiam li prelegis seriozajn kaj bonhumorajn rakontetojn. Bonvena gasto dum Oktobro kaj Novembro estis S-ro Magel el Deventer (Nederlando). Li prelegis al ni je 13/11 pri "Socia Kredito".

En la Septembra kunveno de la Rendevuo, S-ro J. Matasin el Sidnejo gvidis nin tra Italujo per belaj lumbildoj. En Oktobro D-ro Fridenbergs parolis pri la "Beleco en la naturo" kaj S-ro E. Hanks provizis diapozitivojn, kiuj ilustris la vortojn de D-ro Fridenbergs. En Novembro, F-ino Elsie Godfrey prezentis pensinstigan prelegon pri "La Vivo kaj la vulgareco".

● **BRISBANE:** Daŭras la instruado ĉe la Brisbana Societo, kaj inter la lernantoj oni esperas kandidatigi kelke da personoj por la Pyke'a Ekzameno.

La 16an de Oktobro, laŭ peto de Radio 4BC, la U.E.A. Delegito por Brisbano faris dek-minutan prelegon pri kaj en Esperanto.

En Rockhampton, S-roj H. V. Petley kaj N. Russell starigis novan Klubon, kie ili, la 26an de Oktobro, komencis instrui al ĉirkaŭ 30 lernantoj.

La kurso havas lokon en la kuneveno de Fako de Edukado por Plenaĝuloj. La ĵurnalo, 'Matena Bulteno' disponigis du kolumnojn pri Esperanto kaj la novfondota grupo Radio 4QR ankaŭ dissendis informon.

—S. L. Parry.

● **HOBART:** Ni raportas kun bedaŭro la transloĝigon al Melburno de nia Prezidanto, S-ro M. Leereveld, kaj lia familio. De post la starigo de nia grupo Ges-roj Leereveld estis ĉiel helpemaj kaj gastigemaj. Ni forte sentos la mankon de ilia kuneesto.

Ĉe niaj monataj kunvenoj ni kelkfoje diskutis kaj komparis la Esperantan poezion Sekvis kantoj kaj parolado. La ĉiusemajnaj klasoj studas la tradukadon kaj gramatikajn punktojn. La E-lernantoj ĉe la Kvakera Lernejo havas sian propran klubon, kaj aranĝas parolekzercadon, ekskursojn, teatraĵetojn ktp. Kelkaj el la instruistoj lernas Esperanton kaj jam du el ili instruas la lingvon en la lernejo. Pli kaj pli da geknaboj interŝanĝas leterojn kun geknaboj en aliaj landoj.

Ni anticipas kun plezuro la alvenon el Anglujo de S-ro J. Gibson, kiu migros al Hobarto en Decembro. Li estas sperta E-isto, kaj sendube multe helpos al la movado en Tasmanio.

—Aldo.

● **SYDNEY:** La Ko-op-Komitato aranĝis (14/10 kaj 15/10) "Artan kaj Metian Ekspozicion"; profesiaj artistoj kaj membroj el nia Societo provizis per diversaj objektoj kaj sukcesis formi vidindan ekspozicion.

S-ino K. Morrison gvidis (18/9) "Tombolon". "Vojaĝo kun lumbildoj" prezentis (25/9) S-ro J. Matasin. S-ro F. Dunn prelegis (9/10) pri Ekonomio. S-ro S. Drake aranĝis (16/10) debatvesperon pri la temo:

"Ĉu per Esperanto oni povas sekurigi la pacon en la mondo?" La debato estis vigla kaj vekis la intereson de la membroj. F-ino R. V. Ryswyk aranĝis (23/10) vortludon, per kiu la ĉeestantoj povis pruvi siajn sciojn pri nia lingvo. Dum la letervespero (30/10) montriĝis, ke ne multaj klubanoj regule korespondas; tamen estis tralegataj kelkaj interesaj leteroj.

Oportun-vendado okazis (23/9). La amuz-vesperoj, la unuan sabaton en ĉiu monato, estis bone vizitataj.

POR VIN DISTRI.

Ni aŭdis pri iu homo, kiu abonas du ekzemplerojn. Li bindigas la numerojn en du volumojn, el kiuj li donacas unu al la loka klub-arkivo. Ĉu imitantoj?

Oni diras pri viro, kiu, trovinte la edzinon enlute mortinta je tagiĝo, kriis malsupren de la stuparo en la kuirejon: "Anjo, nur unu ovo ĉi-matene!" Ankoraŭ pri li, kiu kreskigis terpomojn sur la tombotero de l'karulino. Sekvante tiun pensolinon, ni ekrememoras pri homoj, kiuj flegme akceptas Esp. gazetojn sen intenco reboni...

Ce la kunveno de la Akademio la temo estis: La senpera verbigo de adjektivoj kaj la principo de neceso. "La unua parto kaŭzis viglan diskuton, ĉe kies fino multaj restis pli-malpli konfuzitaj. La valoro de tiaj publikaj diskutoj estas dubinda." ("Brit. Esp.")

En "Brit. Esp." 7/61 konata amiko en Perth kontribuis poemon pikan pri la relativa modesto de l'moderna virino. Sur taga tramo ŝi ruĝiĝe vualas siajn sentovekajn konturojn; sub lumo balĉambra ŝi ilin ĝislime paradas. "Por ĉia afero estas ĝia tempo kaj maniero..."

En "Espero Katolika" (10/61) aperas du eraroj: "La originalaj lingvoj de la Malnova Testamento estas la Hebrea kaj la Greka". Zamenhof tradukis en Esp-on almenaŭ parton de la Malnova Testamento. Pro kio instruita homo implicas, ke Zamenhof ne tradukis la tutan tekston de la M.T.? Kaj la vorto "Greka" devas esti ŝanĝita.

S-RO RALPH HARRY REZIGNIS

Per cirkulero de 18-a de Septembro S-ro Ralph Harry informis nin ke pro multokupiteco li devas rezigni de la postenoj de Prezidanto de A.E.A. kaj de la Canberra E-Klubo. Krome, pro personaj kaj familiaj respondecoj li ne povos partopreni la venontan kongreson en Sydney.

Jen, post la morto de D-ro F. Williams, nova forta bato por nia aŭstralia movado. Ni, kiuj konas bone S-ron Harry, scias ke li estas "ĝisosta" Esperantisto kaj ni estas certaj ke spite de la fakto ke li ĵus fariĝis la Vic-Direktoro de la Departamento por Eksterlandaj Aferoj, li tamen estos preta helpi nin kiam helpo estos necesa.

Estos do la tasko de la venonta kongreso trovi taŭgan anstataŭanton por Ralph Harry. Ni ĉiuj scias ke tio estos preskaŭ ne solvebla tasko.

—Herbert Koppel.

W. HAMILTON WEBBER

Miss Penny Ferguson sends us a tribute to this gifted musician, together with citations from the Melbourne and Sydney press of the 20's. An Esperantist for 50 years, he died from heart failure on October 10, 1961.

Miss Ferguson says: "It was Hamilton Webber who knew Mr. J. G. Pyke, who crossed to France to attend the Paris Esperanto Congress of 1914 (prevented by the outbreak of war), who helped me consistently with translations and corrections of drafts, who loved Esperanto, who looked forward to the 13th Australian Congress in Sydney, and who planned to visit Esperanto House, Redfern, on October 9."

Our sincere condolence to those bereaved.

Oskar Berman (fakdel jurnalismo) donas novan adreson: Beit Berlin, Jarna Str., Hadera, Israel.

GAZETOJ KAJ ESPERANTO.

La ĉefa ĵurnalo en Normandio presas rubrikon en Esperanto! "Paris-Normandie", kiu tage aperas po 180,000 ekzempleroj, eldonas semajnan Esp-kurson. Sendu gratulon al "Paris-Normandie", Junulara Rubriko, Rouen, Seine Maritime, France. Ĉiu ricevos respondon.

Recenzoj

La Turo de Londono: Sooseki Nacume. El la Japana tradukis Seiho Nishi. 55 paĝoj. 0.27 Us. dol.

En 1905 la aŭtoro, vizitinte la Turon, priskribis ĝin per fantazia plumo. Li donis intiman rigardon en la animon de Orientano simpatia, arte sentema kaj dotita per literatura esprimemo. Liaj vortoj egale validas hodiaŭ, kiel en la verktempo. Li malvualas la hororon de tiu antikva muzeo de l'kruelo kaj homa besteco per la naiva nuddirado de homo sen ajna iluzio pri la terura temo. Liaj okuloj rimarkis multajn interesajn detalojn nevidatajn de la gapantaj simpluloj, kiuj ekskursas tien, por regali sin malkare en liberaj tagoj.

Aldone estas elĉerpo el libro de Yaeko Nogami, kiu kvazaŭ enmasonis mankantajn brikojn en la donitan koncepton de la ĉefa aŭtoro. Mendebila nur ĉe Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati I, Tokio.

"Bulgara Prozo": eldonita de Fremdlingva Literaturo str. Levski I, Sofia, Bulgaria. Prezo?

Deknau rakontoj de diversaj aŭtoroj, tradukitaj de dekkvin bonstiluloj. La plej longa, 35-paĝa, estas Sura Bir, kiu temas pri Makedonio sub la Turkoj. En ĝi troviĝas multaj vortoj Turkaj aŭ -devenaj. Tia uzado, klarigita per piednotoj, evitigas neceson ripeti longajn parafrazojn: ekz. fereĝeo (larĝa vesto kun tuko, kaŝanta vizaĝon); pomakino (mahometanigita bulgarino). Nargileo, kiu cetere sidas en la Aldono al la Plena Vortaro, ricevis trilinean klarigon.

Regas tra la kompilo mirinda egaleco de stila bonkvalito, kiu elokvente parolas pri la altevoluinta esprimovo de la tradukintoj. Serĉante homojn, kiuj rajtus kompariĝi kun la Pola majstro Kabe, oni ne bezonus iri aliloken ol al la Bulgaraj rondoj. Intime natureca, tujkomprenebla frazfarado efikas rekte sur simpatiajn kaj taksipovajn legantojn.

Precipe tenis atenton de la recenzanto la kortuŝa Ĉu Li Venas? la tragika Hatiĝe, pri ruza perfido kontraŭ rabisto, kaj la komika La Kazo Penleve, en kiu simplaj soldatoj, mortiginte la dorlotan kokon de feroca majoro, elartifikas solvon. Vera juvelo de l'sprita humuro.

Zorge kompilita listo de preseraroj faciligas legon. En tiu 251-paĝa libro oni devas streĉi la okulojn por rimarki kritikindojn. Gratulon al la koncernatoj.—F.R.B.

Nur Tri Koloroj: Eli Urbanova Beletraj Kajeroj 3, eld. Stafeto, Tenerife. 136 p.

Recenzi kolekton de liriko, kies prezentanto portas la nomon Julio Baghy, estas tasko tre delikata. Jen nova bedo en la florgardeno de la E-a poezio! En ĉiuj poemoj ŝprucas la vervo kaj sincera sentemo de la aŭtorino, kaj la diverseco de temoj faras legadon alte plaĉa. En la serio "Pri mi mem" ŝi regalas per majstra portreto de la propra mio, dum en la moka liriko "Laŭ mia Edzo" ŝi satiras plej efike la edzan kritikemon. En "Curriculum Vitae" ŝi skeme priskribas sian tutan vivon, kaj pli multe ŝiaj vibraj sentoj evidentiĝas en "Gutoj de Intimo". "Diktis Dankemo" formas laŭrokronon por eminentaj E-istoj al ŝi bone konataj, kaj la kolekto finiĝas per "Hejtaro Dancas", en kiu aperas la plej allogaj floroj de la tuta ĝardeno: en "Nupta Nokto" kaj "Ekstazo" ekflamas la fajro de pasio; en "Kiam Doloro Kulminas" ŝi invitas fizikan suferon por mildigi la animan honton de hejtaro.

Teknike la aŭtorino montras esceptan kapablon esprimi detale per plej simplaj rimodoj. Mi ĝuis la legadon, kaj certigas, ke ĉiu aĉetinto de la verko trovos, ke ĝi valoras la koston.—C.C.C.

"Elektitaj Poemoj": Castro Alves. Tradukis el la Portugala de L. H. Knoeldt. Eld. Brazila E-Ligo, Rio de Janeiro. 184 p.

En sonore klasika antaŭparolo Pedro Calmon, rektoro de la Uni. de Brazilo, kunarigas la kvalitojn de profeto, protest-anto, lirikisto, kies poemojn rekreante tradukis juna talentulo. El la 1459 rimoj, 1402 estas absolute puraj: meritinda faro. El la 58 poemoj, 21 temas diversaspekte pri La Sklavoj: Alves flame kriegis por la abolicio de l'sklaveco, kaj mortis ok jarojn post la liberiga proklamo de Lincoln. Lia vivo cetere estis unu jaron malplia ol tiu de la glora Keats, kiu mortis 25-jara.

La sincera kaj bellingva tributo de Prof-o Calmon, kaj la atesto de la poemoj mem, indikas, ke Alves estis homo de granda literatura staturo. Strange, kaj bedaŭrinde do, ke ne mencias lin la grava "Encyclopedia Britannica".

Leganto ricevas impreson, ke la traduko redonas la buntan riĉon kaj vervan vortlereton de mirinda originalo; nur vera poeto povus tiel transporti la koloron kaj sencon tiel senperde en ilian novan lingvoformon. La kosto estas kelke da neologismoj, klarigitaĵoj en glosaro kun notoj.

La verkon oni eldonis celebre al la Zamenhofa centjaro, kaj portas la nomon de la Ministerio de Edukado kaj Kulturo, Uni de Bahía. Monumento al du noblaj filoj de pensa kaj spirita libreco.

"Pluk": Poul Thorsen. Poeminiaturaj originalaj. Eldonis Dana Laborista Esperanto-Asocio. 96 paĝoj. 9 UL-steloj.

La aŭtoro, premiita je multaj Belartaj Konkursoj, donas liberan bridon al sia gaja petolemo, observe monkante la morojn kaj manierojn. Antaŭ la "regalo" li avertas legantojn:

Sekaj geonkloj kaj gelibertinoj,
tenu vin for de malaltaj inklinoj.
For la pasiojn!

Nepre ne legu la parajn foliojn!

Tial ĉar ni ne estas unu nek la alia speculo, ni aŭdacis. Li ne tro riskas ofendi la prudemon, tamen plure ofendetas kontraŭ la lingvo, perfortante vortojn por ricevi rimon. Ekz., 8:

Se oro kreskus sur arboj,
mi konus kelke de "harpoj"
el superklasde de nia socio
pretaj fariĝi edzin' de simio.

"Harpoj" (harpioj?). Ni penis traduki:

If gold on lofty trees did grow,
some so-called high-class dames
I know,
who idly spend their grasping
lives,
would make for monkeys splendid
wives.

p. 83: Zorge konsideru, televidamuloj:

La homo trovas vojon
tra l'space ĝis stelaroj,
sed tre maloftan fojon
al domo de najbaroj.

Mankind, we read, has found a
way
through space unto the moon;
how seldom, though, his feet
now stray
towards his neighbour's home!
"Gemela" libreto kun lia tradukita
"Gruk" (La Rondo, 7/57).

LONDONO.—Ed. Ockey, konata Brita sam-o, verkis en E-o trafe impresan skizon de ĝiaj vidindaĵoj. Sep bonaj fotoj. I stelo. 15 Upper Pines, Banstead, Surrey.

Nia anonctarifoj estas malkara; uzu la servon. Eldonata 300-ekzemplero, nia gazeto estas vaste legata en Aŭstralio kaj iras en ĉ. 60 alilandajn E-centrojn, kiuj foje uzas ĝiajn informojn

UNIVERSITIES.

Fifty eminent scholars in 20 countries signed this address "to all university students and academic staff" after having studied the language problem in the world today. Their findings are given in six languages. The definitions of the subscribers' scholastic standing here given in some detail are of value to all Esperantists engaged in publicity. The raison d'être of the pamphlet, however, is to open the eyes and minds of university personnel ignorant or indifferent to the achievements of Esperanto, vouched for by a significant body of their far-seeing and progressive colleagues. Price 2d. plus postage. V. Sadler, 1 Poets Road, Highbury, London, N.5.

BELAJ KARTOJ.

La Nederlanda Mondfederalista Asocio eldonis belaspektan duoblan karton, kiu montras kvin diverskolorajn infankapetojn—simbolon de la homara unueco—kun trafe konvena teksto en Esp-o. Oni povas uzi ilin ĉe Kristnasko, Novjaro, Pasko, naskiĝtagoj kaj ankaŭ por leteroj, ĉar restas sufiĉa spaco por skribo. Kvar kartoj kun kovertoj (minimumo) kostas 2/9 inkl. afranko. Ne fiasku tiu iniciativo de granda mondasocio! Mendu ĉe U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam.

IL-MAŜINOJ.

Helpon al kompilo de Il-maŝina Fakterminaro petas: K. McLennan, 30 Lower King's Av., Exeter.

LA FLUGO EN LA UNIVERSON.

Bruno Burgel verkis la sekvantan en 1923; La traduko de P. Schwerin aperis en La Rondo, Dec. 1944. Ni donas resumon, kiu tuŝas temon tre aktualan.

"En 1920 mi verkis fantazisciencan romanon La Stelo de Afriko . . . en kiu mi provis versaĝnigi konstruadon de grandioza flugraketo, per kiu homoj ekflugas de la tero en la universon . . . Mi surpriziĝis do, kiam antaŭ ne longe D-ro H. Oberth publikigis verkon La Raketo al la Planed-spacoj, kiu havigis la pruvon, ke nia nuna scipovo ebligas al ni fari raket-aparatojn per kiuj oni povus moviĝi en la universon.

"Prof-o Goddard de la Clark-kolegio en Worcester (Usono) jam faras eksperimentojn pri de li eltrovita raketo, kiu same kiel mia en la romano estas forpelita en la spacon per rapide sinsekvaj eksplodoj. . .

"Transe de la ŝirma aermantelo ekzistas kondiĉoj, kiuj unuavide ŝajne sekurigas la universon por eterne kontraŭ invado per la homoj. Komenciĝas la vakuo, kiu ne plu portas iun balonon, ne plu donas al iu helico medion, en kiu aerŝipo povus forŝraubi sin. Homo ŝvebus tie meze de absoluta vakuo, ĉiun spiron da aero li devus kunporti en taŭgaj ujoj, la rigidiga malvarmego de la malplena spaco ĉirkaŭas lin kaj devus esti venkita en lia fluganta malliberujo. Nenio renkontus lin dum lia flugado krom meteorŝtonoj kaj falantaj steleroj, kiuj pafiĝas je kvincentobla rapideco de ekspresvagonaro kaj eventuale povus detrui lian ĉielvojaĝ-veturilon kaj lin mem. La plej eta averio de lia maŝino rejetegus lin de malproksimo al la terglobo. En ĉiam pliiĝanta rapideco li devus falegi malsupren sur ĉi tiun planedon, kaj simile al meteoro li kun sia aerŝipo arde konsumiĝas kaj disŝpruciĝas en la aermaro de la tero. Sed ĉion tion la eltrovintoj de la spacraketo mem tre stoike pripensis kaj prikalkulis. . .

"Ĉu iam ebligos, celpafi per tiaj raketoj kaj spacŝipoj, tiel ke oni povus viziti la lunon au aliajn stelojn kaj ankaŭ reveni al la tero?"

"D-ro Oberth donas la pruvojn por tio. Liaj konstruopanoj estas tute pretaj. Cetere: absolute ne estas intencite, tuj flugi al la luno au Marso.

Unue senpasaĝeraj raketoj suprenfluĝu ĝis trans la aerlimo kaj servu por sciencaj esploroj; poste oni volas progresi, eksperimenti je kunhoma flugoj por esplori, ĉu la homo toleras ilin. Se ĉio tio sukcesus, nur tiuokaze oni povus riski la eksterordinaran: la flugon al la luno."

LIBERA FORUMO.

Al la Redaktoro: Interesas min kelkaj linioj el via ĉefartikolo (Sept-Okt.), nome pri la postulo de Fraser-Tytler rilate tradukadon: "How many translators meet the postulate of Fraser-Tytler that beside a full mastery of his own tongue a translator must have a perfect mastery of the language of the original and a competent acquaintance with the subject of which it treats".

Ĉu vi samopinias? Kion pensas pri tio aliaj Aŭstraliaj ekzamenistoj? Jen mia opinio pri la postulo por la Norma Supera Ekzameno (Aŭstralia): Kiel oni traduku en E-on, aŭ eĉ en la gepatran lingvon, paragrafon pri teknikaj temoj, pri kiuj oni havas eĉ ne elementan scion en la propra lingvo? Por traduki pri tiaj temoj oni bezonas pli ol fakterminarojn—kiuj cetere ne estas ĉiuj disponeblaj al ĉiuj ekzamenotoj—Oni bezonas ankaŭ scion kaj komprenon, kiuj rezultas nur post longa studado. Ĉu celantoj al ordinara diplomo devas sin ekipi per tiom da antaŭa studado pri ĉiu ajn teknika temo, nur por esti ekzamenata malgrande pri unu?

Teknikaj temoj apartenas al teknikistoj. Dum mia tuta studado pri la Angla, Franca kaj Latina lingvoj (inkluzive de universitaj niveloj) oni neniam postulis traktadon pri teknikaj temoj. La literaturo provizis sufiĉe grandan terenon por lingvistudado, kaj eĉ en la Angla lingvo neniam oni devigis kandidatojn verki versojn: jen arta talento, kiun posedas ege malmultaj, kaj pri kiu—eĉ mezgrade—oni aŭ emas nature aŭ tute ne kapablas.

Ĉu ne iom absurde, starigi tiel alt-nivelajn, por la granda plimulto ne plenumebajn postulojn por ekzameno pri ĝenerala kapableco en E-o? Tiel longe kiel tiaj postuloj restas, niaj ekzamenistoj ne miru, ke sin prezentas malmultaj ekzamenotoj.

—Fay Koppel.

ESPERANTO EN IBERIO.

En Portugalujo la diktatoro malfavoras E-on; mi ja renkontis E-istojn en multaj urboj dum mia kvarmonata restado tie. Salazar ne absolute malpermesas la uzon de nia lingvo al individuoj; tamen lia polico malfidas kaj ofte persekutas E-istojn, kaj ĉiu petskribo por ke oni permesu instrui la lingvon, aŭ propagandi per ĝi, aŭ starigi E-ajn grupojn (eĉ kiam ĝi estas apogita de Ministroj) neeviteble renkontas finan malsankcion de la diktatoro: "Jes", li diras, "mi konsentas pri la meritoj de E-o, pri ĝia taŭgeco k.t.p., sed . . . mi timas, ke oni uzos ĝin por propagandi kontraŭ mi reĝimo". Ŝajnas, do, ke ĝis li konvinkiga, ke ĉiu E-isto estas Salazaristo, aŭ ĝis li mem malaperas, la sorto de E-o en Portugalujo estas "senespera".

En Hispanujo la situacio estas tute alia, dank'al influo de E-istoj inter la korteganoj de Franco. Je mia alveno en Madrid la E-grupo estis ĵus translokiĝinta en belan domon kun sufiĉe alta luprezo, ĉe la centro de la urbo.—G. Marin en Worker E-ist, 7/61.

13th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

1 to 7 Jan., 1962, Sydney.

Congress Secretary: Miss Penny Ferguson, Box 54, King St. Post Office, Sydney. Congress Fee for A.E.A. members 30/-, for others 35/-.

Third List of Congress Members:

77. Mrs. A. S. Mullen (Sydney)
78. Mr. Rex Hanney (Adelaide)
79. Mrs. L. M. Tobin (Sydney)
80. Mr. Vic. Rutland (Sydney)
81. Mrs. M. Morgan (Manly)
82. Mr. F. G. Wall (Earlston, Vic.)
83. Mr. Vlaho Demovich (Sydney)
84. Miss O. Stempel (Perth)
85. Miss L. Greene (Sydney)
86. Mrs. Betty Cleminson (Manly)
87. Mr. R. Parbery (Grafton, N.S.W.)
88. Mr. J. S. Ryding (Melbourne)
89. Miss M. Chamberlin (Melbourne)
90. Mrs. V. Rutland (Sydney)
91. Mrs. J. S. Ryding (Melbourne)
92. Mrs. M. Varkevisser (Sydney)
93. Mrs. L. S. Dekrom (Sydney)
94. Mr. Sid. Grant (Port Lincoln, S.A.)
95. Miss M. McCarthy (Sydney)

96. Mrs. N. Gillespie (Manly)
97. Mrs. H. P. Brady (Melbourne)
98. Mrs. H. M. Cohen (Melbourne)
99. Master Evan Jones (Sydney)
100. Miss Bronwyn Jones (Sydney)

STOP - PRESS**Last Congress Announcements****Fourth List of Congress Members:**

101. Mrs. G. Kennedy (Manly)
102. Mr. R. Capstick (Greenwich, N.S.W.)
103. Mrs. M. Capstick (Greenwich, N.S.W.)
104. Mrs. E. MacGillivrey (Manly)
105. Miss F. Cardale (Sydney)
106. Miss G. Fink (Melbourne)
107. Miss M. Fink (Melbourne)
108. Mr. M. Leereveld (Hobart)
109. Mrs. A. Leereveld (Hobart)
110. Miss L. Leereveld (Hobart)
111. Master R. Leereveld (Hobart)
112. Mrs. Barabennett (Manly)
113. Miss A. Curtis (N. Tambourine, Qld.)
114. Miss B. Williams (Morwell, Vic.)
115. Miss M. de Jardine (New Plymouth, N.Z.)
116. Mr. P. E. Schwerin (Sydney)
117. Mrs. K. R. Schwerin (Sydney)
118. Mr. E. E. Thompson (Melb.)
119. Mrs. E. E. Thompson (Melb.)
120. Mrs. J. Murray (Sydney)
121. Mrs. A. Sedgely (Perth)
122. Mr. W. Helem (Melbourne)
123. Mrs. I. Betts (Manly)
124. Mr. S. Figgs (Guildford, NSW)
125. Mr. R. Asselin (Sydney)
126. Miss S. Olsen (Sydney)
127. Mrs. P. Rayner (Berowra, NSW)
128. Mrs. L. Wheatley (Berowra, NSW)
129. Mrs. A. Huett (Berowra, NSW)
130. Mrs. Van der Pol (Sydney)
131. Miss G. Lorimer (Hobart)
132. Mrs. A. Hintze (Melbourne)
133. Mr. W. J. Drummond (Melb.)
134. Mr. E. McKenzie (Melbourne)

Bowles Hotel informs that people are making bookings without sending a deposit. **No booking is valid without a deposit.**

NOVA ADRESO !

Malgraŭ nia averto, iuj E-centroj ankoraŭ sendas al mia malnova adreso. Bv. nepre NOTU la adreson sur la frontpaĝo. Dankon.

—La Redaktoro.